Heleco

Pres-organo de:
Astura Esperanta Asocio

Numero 90 Oktobro 2014



Centjaro de la Unua Mond-Milito



Heleco

Numero 90 Oktobro 2014

Astura Esperanta-Asocio

Sidejo: Universitata Kampuso de Vieskes
GIJÓN (ASTURIO-HISPANIO)

Interret-paĝo: http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/

Retadresoj: easturias@telecable.es
mailto:esperanto@uica.info

Astura Esperanto-Asocio estas esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la **Internacia Lingvo** unualoke en nia urbo, Gijón, kaj ankaŭ, leŭeble, en tiuj partoj de la Asturia regiono, kie ne ekzistas lokaj grupoj de **Esperanto**.
Nia agado disvolviĝas kadre de: **Cátedra JOVELLANOS de Extensión Universitaria**

Enhavo .	Paĝo

La enhavo de la tekstoj de ĉi-tiu revuo ne esprimas oficialan opinion de **Astura Esperanto-Asocio**: pri ili respondecas la verkintoj mem.
Leĝa Registro 0/319/85

La graveco de ***Interreto***

En la prezentado de nova numero de Heleco, kiel ĉi tiu, proksimume unu jaron post la publikigo de la antaŭa, decas ke oni priskribu la agadon de la E-grupo dum la koncerna tiujara periodo. Tia ag-ado estis intensa kaj tamen ne-kontentiga. Intensa ĉar estis plendediĉigo al taskoj celantaj la disvast-igado de la Internacia lingvo, kiu estas la alvok-iĝo de ĉiu esperantista rondo. Sed ankaŭ ne-kontentiga tial ke inter la realigitaj laboraĵoj ne estis tio kio estas la ĉefa dediĉo de ĉiu E-asocio: la instruado de Esperanto. La malabundo aŭ eĉ kompleta manko je gelernatoj de la internacia lingvo estis, dum la lastaj jaroj, tre ĝenerala fenomeno preskaŭ ĉie.

Kaj tamen, laŭŝajne, la esperantistaro kreskas, kaj ankaŭ ĉi ties produktado je E-materialo, kiel oni povas konstati per ***Interreto***. Ja, sufiĉas traesplori de tempo al tempo la ttt-reton por rimarki ke senĉese kreskas la nombro da ret-paĝoj, la eldonado de novaj libroj per kaj por Esperanto, la vorto-provizo en la Esperanta branĉo de Vikipedio, la esperantistaj kongresoj kaj eventoj… Nedudeble, malantaŭ ĉiuj-ĉi signoj de esperantista aktivado devas esti ankaŭ kreskado de la homa kolektivo dediĉita al tia aktivado. La ekspliko de tiu ŝajna kontraŭdiro estas ***Interreto*** mem. La tradicitipaj E-grupoj kaj asocioj ĉesis esti la ĉefa ilo de varbado de novaj esperantistoj. En ***Interreto*** ekzistas ĉiutipa materialo por la instruado de Esperanto, per-reta instruado.



Tio sendube okazas ankaŭ por aliaj lingvoj kaj por aliaj lerno-objektoj kaj multaj aliaj homaj aferoj. En la nunaj cirkonstancoj ne estas necese reliefigi la gravan rolon kaj egan influon kaj utilon de ***Interreto*** ĉiunivele. Sed indas mencii ian gravan procezon okazintan en nia lando dum la lastjara periodo. La temo ne rilatas al Esperanto sed al la politika tereno. Kiel sciate, en la ĉi-jara printempo okazis balotado por la Parlamento de la Eŭropa Unio. En Hispanio estas ega surprizo la elŝpruco de tute nova politika forto kiu jam dekomence atingis konsiderindan sukceson kaj prestiĝon. Temas pri la politika formacio **PODEMOS** (kio en la hispana lingo signifas: «**Ni povas**»), kiu, post tiu relativa venko pasintprintempe, daŭre famiĝis/as de tiam kadre de la situacio de la endemia malsano de nia demokratio: la senĉesa koruptado de la hispanaj politikistoj de la sistemo. Sed tio kion ni deziras substreki nun estas ke la promociiĝo de tiu kontraŭsistema politika forto okazis pere de ***Interreto***. La popola bazo apoginta tiun formacion generiĝis, antaŭ kelkaj jaroj, ene de la spontana mobilizo de la indignitoj pro la krizo, la t. n. 15-M, kiu siavice formiĝis, ankaŭ ĝi, pere de ***Interreto*** kaj aliaj similaj digitalaj komunikiloj.

Nu, revenante al nia Esperanta afero, ni menciu la por-Esperantajn laboraĵojn kiujn ni, jes ja, povis realigi. Per antaŭaj numeroj de ĉi tiu revuo kaj de ***AEA-Informilo*** ni komunikis la dediĉon de nia E-grupo al la esperantigo de kelkaj komiksoj. Konkrete, ni faris jam la tradukon de la du ĝisnun eldonitaj numeroj de la komikso pri la ***Kapitano Alatristo***. Ankoraŭ oni ne disponas je la koncernaj laŭleĝaj rajtigiloj por la eldonado de la esperantligva versio. Sed la tradukaĵo ekzistas, eĉ se nur je la nivelo de eldonprojekto. Pluraj tagoj antaŭ la apero de ĉi tiu numero de Heleco tiu projekto estis prezentita en la sidejo de HEF. La ĉi-paĝa foto apar-tenas al tiu okazaĵo. Ver-ŝajne la eldono de tiu ver-ko, se ĝi okazos, estos ne laŭpresite sed digitale, denove ***Interreto***. Multaj verkoj kaj dokumentoj ekzistas nun nur pere de tiu reta medio.

Kaj same oni povas diri pri revuoj kaj ĵurnaloj, multaj el ili, esperantistaj aŭ ne, ekzistas nur, aŭ ĉefe, en ties digitala formo en ***Interreto***. Kiel sciate tia estas la kazo de nia Heleco de antaŭ kelkaj jaroj.

En kio rilatas al ĉi tiu 90-a numero de la revuo, ni prezentu ĝin dirante ke la ĉef-temo elektita ĉi-okaze estis la Unua Mond-Milito. Kiel sciate, ĝuste antaŭ unu jarcento komencis milito kiu daŭris kvar jarojn kaj kiu okazigis pli ol naŭ milionojn da mortintoj kaj kromajn kvin milionojn da militkriplitoj. En nia raportaĵo ni atentis ne nur pri la disvolviĝio de la militaj operacioj sed ankaŭ pri la kaŭzoj kiuj provokis la konflikton kaj la rezultoj de la milito mem kaj de la pac-traktatoj per kiuj oni metis finon al ĝi. Estu ĝi nia kontribuo al la kompreno de tiu homa fiasko esperante ke la homaro lernu eviti tiajn tragediojn.



De la 1-a ĝis la 4-a de majo ĉi-jare okazis la 73-a Hispana Kongreso de Esperanto en la andaluza urbo Arundo (Ronda en la hispana lingvo). Tiu esperantista evento estis samtempe la 18-a Kongreso de la E-organizaĵo de tiu andaluza regiono. La kongresa urbo kaj ties ĉirkaŭaĵo estas tre bela kaj interesa terzono de geologia, historia, kultura… vidpunktoj, tre inda fono por la menciindaj kongresoj de Esperanto. Sed ĉi tie ni ne priskribos tiun scenejon de la esperantista kongresado de 2014 kaj ankaŭ ne priraportos la disvolviĝon de la kongresaj sesioj. Pri ambaŭ aferoj estas sufiĉe da informo en interreto kaj estis en aliaj E-informiloj publikigo pli trafa kaj detala ol tiu kiun ni povus fari. Konkrete, en la 406-a numero de Boletín de HEF estas ampleksa prikongresa raporto verkita de Ángel Arquillos. Krome, oni povas trovi informon pri tiuj hispanaj E-kongresoj en du interretaj paĝoj, estas en Vikipedio, adresoj:

http://eo.wikipedia.org/wiki/73-a_Hispana_Kongreso_de_Esperanto

https://www.dropbox.com/sh/8ud5e8si6nw8khd/AABeoHKEt2s3mtWLgfdxZWqZa

La alia, elŝutebla en PDF-dosiero, estas en la ret-paĝo koncerna al la 138-a numero de la revuo Eŭropa Bulteno de monato majo, en la ret-adreso:

http://www.europo.eu/documentloader.php?id=421&filename=eb-138-2014-05.pdf

Sed se ni ne alportas plian raportan informon pri tiuj esperantistaj eventoj de nia lando, ni, ja, volas reliefigi la gravecon kiun, de antaŭ pluraj jaroj, pli kaj pli akiras en Interreto la informado pri tiuj E-kongresoj en Hispanio pere de filmetoj kaj videoj. Pri la aktoj de la E-Kongreso en Arundo estas en la reto multenombraj el tiuj filmetoj. Jen iuj, kiujn ni trovis:

73a Hispana Kongreso de Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=jV_p_3r1E68**
Al vi, Don Juan, kiu, laudire, mortis - Miguel Fernández: **https://www.youtube.com/watch?v=TfbrfRtRN9w**
Anna - William Auld – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=-VKidBZ3c78**
Ĉe Montpellier - Rosa López kaj Manuel Pancorbo – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=uGh9wJX13DA**
El nia nio inta - Miguel Fernández - Kanto en Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=8MlRH7jAxEM**
Esperantigitaj voĉoj de andaluzaj poetoj - Miguel Fernández: **https://www.youtube.com/watch?v=YDjulVtk3BI&feature=youtu.be**
Esperanto, lingvo por Eŭropo, projekto Tuj - Therry Saladin: **https://www.youtube.com/watch?v=AYqp1ww6er0**
Eŭropa Unio, paŝo post paŝo - Rafaela Urueña: **https://www.youtube.com/watch?v=1ax86yKpTo8**
Feo de la Luno - Kvaropo Sinkopo – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=shTfFzn5BOk**
Gabriel García Márquez - Eta omaĝo – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=ScrRA3OVyvA**
Komuna tosto - Vivu la teatro – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=OwcKbT-OkN0**
Kongresa inaŭguro - Inauguración del Congreso – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=AliL_Y-lrYk**
Konsilu min, doktoro Zamenhof - Liven Dek – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=2rjSkPVE0gE**
La aŭtuno - Juan Ramón Jiménez – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=SOiiv8v_A3c**
La bona lupeto - Agustín Goytisolo - Carmen Cidoncha: **https://www.youtube.com/watch?v=BGPVgZA0O-I**
La enkonduko - Vivu la teatro 2014 – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=f3Sp8RfykYg**
La franca lingvo nordafrike - Eduardo Berdor: **https://www.youtube.com/watch?v=RinfdFC3uhE**
La plenumo - Kvaropo Sinkopo – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=5FayNJFjzrs**
La pluvo - María Villalón – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=fOBkKcbJUAE**
La taŭrofelo - Salvador Espriu - Abel Montagut – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=Jrqoe0dj_ng**
Mansignado por Esperanto - Victor Solé: **https://www.youtube.com/watch?v=Mvc6EoW4iG4**
Mediteraneaj eroj kaj pli - Ángel Arquillos – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=oniKITSbj5E**
Mi ne plu... - Liven Dek – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=Gg7IP_cnUIk**
Neforgeseblaj vortoj - Vasilij Jakoblevič Eroŝenko – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=CfeojwfZ1zA**
Noche flamenca 1 - Flamenka nokto 1 - Congreso de Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=7wqJjFjtDds**
Noche flamenca 2 - Flamenka nokto 2 - Congreso de Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=ArdQGMgvRRY**
Oficiala instruado de Esperanto - Katalin Kovats: **https://www.youtube.com/watch?v=pBSaxD9KUuk**
Se havus mi martelon - Pablo Carrascal – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=JOD_gHiAcxI**
Se mi ne kapablas diri belan vorton - Ángel Arquillos – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=POawbet95w8**
Se vi forestos - Kvaropo Sinkopo – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=cx0MluDgelw**
Ses leteroj - Jean Forge – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=vGzVDhw6Eeg**
Somnambula romanco - Federico García Lorca – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=GO9ZgDBd_yY**
Tempo - Miguel Fernández - Victor Solé – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=4BnlU546YwA**
Turat Al Andalus - La Tarara - Congreso de Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=PKR_elb-U9U**
Turat Al-Andalus - Qum tara - Congreso de Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=BhKLdjZFLPU**
Turat Al-Andalus en el Congreso de Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=boFnOJ1NThc**
Virina rideto pli kaptas ol reto - Cezaro Rossetti – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=31GD1UgXR4Q**
Viviga pluvet' - María Villalón – Esperanto: **https://www.youtube.com/watch?v=FvfrhDy-Ins**

Kongresa inaŭguro

Ĉi tiu video, filmita de Manuel Parra kaj Miguel G. Adúriz, daŭras iom pli ol 28 minutoj. Ĝi montras la inaŭguran sesion de la kongreso, ĉiam simila al tiuj de la antaŭaj E-kongresoj, kaj tamen, ankaŭ ĉiam malsama, kun ties specifaj trajtoj kaj cirkonstancoj. Notinda karakteraĵo de la lastaj E-kongresoj kaj ĉefe la nunjara, estis la apliko de elektronikaj iloj proviz-itaj de la moderna teknologio. La filmoj mem, kiujn ni pri-komentas, estas unu el tiuj rimedoj; krom montri la disvolv-iĝon de la kongreso al tiuj ni, kiuj ne povis ĉeesti ĝin, ili provizas al la estonteco de nia movado historian –filman– dokumentaron pri nia E-nuntempo. Sed la inaŭgura sesio vi-dis alian aplikon de la elektronika filmado. Ĉiam estis salut-ado al la E-kongresoj, sed ĉi-foje la gekongresanoj povis vi-di sur la ekrano, en la fono de podio, kelkajn filmetojn mon-trante la salutadon de fremdaj esperantist(in)oj. Jen ĉi tiu es-tas filmeto kiu, interalie, traprezentas aliajn filmetojn.



Oficiala instruado de Esperanto - Katalin Kovats

La hungara doktorino Katalin Kovats, krom matematikist-ino, estas ankaŭ lingvistino, kaj inter aliaj lingvoj ŝi instruas Esperanton. En la E-kongreso en Arundo ŝi prelegis dum pli ol unu horo pri sistemoj de instruado de la E-lingvo. La fil-mo prezentas la tutan prelegadon. En nia E-movado oftas la teoriuloj serĉantaj solvon al la problemaro de la disvastigo de Esperanto aŭ pretendante esti trovinta tiun solvon. Iliaj receptoj konkretiĝas en du planoj: atingi egan popolan apo-gon al Esperanto por ke al la regantaroj interesu la instruado de tiu lingvo, aŭ igi ke la aŭtoritatoj oficialigu tiun instru-adon por ke la E-lernado estu profita por la amasoj. Doktor-ino Kovats apartenas al ĉi dua tipo: la konkludo de ŝia prele-go estis ke… ***oni devas enkonduki Esperanton en la ofi-cialan instrusistemon***. Sed mankas la saĝuloj kiuj dirus al ni kion fari kiam mankas la popola intereso pri Esperanto kaj la oficiala apogo al ĝi, kia estas la kazo de nia lando.



Esperantigitaj voĉoj de andaluzaj poetoj - Miguel Fernández

Miguel Fernández prezentis sian libron de esperantigitaj po-emoj ***Poezio, armilo ŝarĝita per futuro***. Verdire, tiu verko jam estis prezentita en la E-kongresoj okazintaj pasintjare en Hispanio. La ĉi-prelega mencio al tiu libro centriĝis en la poemoj tradukitaj el verkoj de aŭtoroj el la andaluzia regio-no, kio, ja, estis la vera temo de la prelego. Do, estis ankaŭ, kaj ĉefe, raportado pri E-tradukoj de verkoj de Federico García Lorca, Gustavo Adolfo Becquer, Rafael Alberti, Luis de Góngora, Juan Ramón Jiménez, Vicente Alexander, Luis Cernuda… tradukitaj al Esperanto far diversaj personoj kiuj kunigas sian konon de la internacia lingvo kun sian sentem-econ pri la poezio, inter ili Fernando de Diego, Antonio Alonso Núñez, Jorge Camacho, samkiel Miguel Fernández mem kaj Miguel Gutierrez Adúriz, kiu prezentis la prelegon. La akto kaj ĉi ties filmo daŭras iomete malpli ol unu horo.



Eŭropa Unio, paŝo post paŝo - Rafaela Urueña

Rafaela Urueña estas doktorino pri Internacia Juro. En la kongreso ŝi prelegis pri afero rilate al tiu fako, konkrete pri la Eŭropa Komunumo. Fakte, la prelego estis la prezentado de ĵus eldonita libro verkita de ŝi, titolita ***Eŭropo paŝon post paŝo***. La libro, laŭ la priskribo de ties aŭtorino, rakontas la historion de la superŝtata organizo "Eŭropa Unio" ekde ĝiaj unua paŝoj, la Traktato pri la Karbo kaj la Ŝtalo far Francio kaj Germanio, en 1952, al kiu aldoniĝis poste kvar novaj membro-ŝtatoj. De tiam la afero plikomplikiĝis per postaj intertraktatoj kaj la aliĝo de novaj eŭropaj landoj. Fiaskis la plano de tiu organizo sin provizi je Konstitucio kaj nun la afero restas en duonprovizora stato sen ia ebla ideo pri la posta disvolviĝo. R. Urueña reliefigis la fakton ke multegaj eŭropanoj ne konasa la rajtojn kiujn ili povus ĝui kiel civit-anoj de la Unio. La prelego estis tre interesa kaj la video bone prezentas ĝian tutan enhavon.





Esperanto, lingvo por Eŭropo, projekto Tuj

La franca esperantisto Tierry Saladin prelegis dum tri horkvaronoj propagandante pri iu lia kampanjo, favora al Esperanto, titolita ***Esperanto Komuna Lingvo por la Eŭropa Unio. Tuj***. La morfemo "tuj" kiel parto de la nomo de la projekto igas pensi ke temas pri plano realigota dum malgranda tempo-daŭro por atingi la celon "tuje" aŭ kiel eble plej rapide. Tamen dum la disvolviĝo de la prelego li asertis, tutprave, ke por sukcesi ke la eŭrop-uniaj politikistoj agnosku Esperanton kiel komunan lingvon necesas ke grandamaso da eŭropaj civitanoj apogu la projekton kaj tio ne venos rapide, devos pasi jaroj, eble jardekoj… Malfeliĉe, nuntempe, ne la amasoj sed nur iuj etaj rondoj da kleraj idealistoj revas pri komuna lingvo. T. Saladin asertis, eble tute prave, ke se Esperanto sukcesos fariĝi komuna lingvo en la Eŭropa Unio, tio estos faktoro por posta rapida sukceso en aliaj mondpartoj kiuj komercadas kun Eŭropo.



Flamenka Nokto

Ne ĉiuj kongresaj programeroj estas seriozaj laborkunsidoj kaj prelegoj. Estas ankaŭ distraj programeroj. En tiu E-kongreso en Arundo estis kelkaj el tiaj spektaklaj aktoj, kaj unu el ili estis ĉi tiu nomata ***Flamenka Nokto***. Pri ĝi oi faris kelkajn filmetojn, kies retadresoj aperas en nia listo. La apuda foto koncernas al parto dediĉita al kantado (estis ankaŭ danco). La kantado ne estis esperant-lingva, sed en ties originala hispanlingva formo. La artistoj partoprenintaj la kongresan spektaklon apartenas al organizo nomata ***Flamenka Rondo*** (***Peña Flamenca***, en la hispana lingvo). La "flamenka" dancado kaj kantado apartenas al la tipa folkloro de tiu andaluzia regiono kie okazis la E-kongresoj de la nuna jaro, sed ne estas bone konata ĝia origino kaj deveno. Oni pensas ke en ties formado estis influo de la maŭroj dumlonge loĝintaj en tiu parto de Hispanio, kaj de la ciganoj, kiuj alvenis poste al tiu teritorio.



Virina rideto pli kaptas ol reto

Matilde Montero kaj Félix Manuel Jiménez Lobo intervenis en la kongresa sesio "vivu la Teatro" organizita de Miguel Fernández kaj prezentita de ĉi tiu kaj Ana Manero. Ilia interveno ne estis ĝuste teatra aktorado sed deklamado. La temo, ***Virina rideto pli kaptas ol reto***, estas parto el la romano, de Cezaro Rossetti, ***Kredu min, sinjorino***, kiun iam oni difinis kiel tabuaj kaj insultaj esprimoj en Esperanto. La apuda foto apartenas al tiu parto de la menciita spektaklo pri la teatro. Pri la sama kongresa spektaklo estas aliaj filmetoj inter la menciitaj en nia listo: ***Tempo***, ***La bona lupeto***, ***Neforgeseblaj vortoj***, ***Mi ne plu***, ***La aŭtuno***, ***La taŭrofelo***, ***Ses leteroj***, ***Somnambula romaco***... Se iuj el la eroj de tiu spektaklo estis nura deklamado, aliaj estis vera teatr-ludado, sed komunaj trajtoj al ĉiuj ili estis ilia esperant-lingveco kaj la mallongdaŭro de la pecoj, ĝenerale ne pli ol kelkaj minutoj.



Viviga pluvet'

La fama arunda pop-kantistino María Villalón kantis en la hispana lingvo kaj en Esperanto en koncerto sur la scenejo de la ***Flamenka Nokto***. La ĉi-apuda bildo apartenas al filmeto ***Viviga pluvet'***, titolo de kanzono preskaŭ kvin minutoj daŭra, kiun ŝi fajne interpretis en Esperanto. Tiu kanzono estas traduko, far Svena Dun, de la hispanlingva kanto ***Agüita de abril***, verkita de Carlos Matari.

Alia kanzono, de la sama artistino, ankaŭ en Esperanto, kaj en la sama koncerto, estis la titolita ***La pluvo***, ankaŭ ĝi verkita de Carlos Matari kaj esperantigita de Svena Dun el la hispana kanto ***La lluvia***. Ties daŭro estas 4:23 minutoj. En la tiukoncerta kantado de María Villalón gitaris Susi Morla.

Tiu grandioza koncerto, kadre de la fermo de la ĉi-jaraj hispanaj kongresoj de Esperanto en Arundo, kun la brila interveno de la fama kantistino, estis inda kaj apoteoza kulmi-no de la evento.

99ª UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO

Bonaero, 26 julio – 2 aŭgusto 2014

La ĉi-jara **Universala Kongreso de Esperanto**, okazinta en la Argentina ĉefurbo de la 26a de julio al la 2a de aŭgusto –vintre en la suda hemisfero– ne troviĝas, precize, inter la plej brilaj de la E-movado. Pro la malproksimeco de la kongresa loko el la grandaj esperantistaj centroj de la mondo, la ekonomia krizo kaj eble kromaj aliaj cirkonstancoj, la partoprenintoj en la Bonaera E-kongreso estis la plej malgranda el la Univesalaj Kongresoj de Esperanto ekde 1920. Sed spite al ĉiuj malfacilaĵoj, nia diligenta kolegaro en laboro paca ne laciĝas, persistas en sia strebado favore al niaj idealoj, la internacia lingvo kaj ĉio ligita al ĝi sub la koncepto de «interna ideo». Tion montras, kromanfoje, la kongresa rezolucio, kiun ni prezentas ĉi-paĝe. Por plia informo pri la kongreso en Bonareo oni povas konsulti jenan ret-paĝojn:

http://www.espero.com.cn/2014-07/31/content_33109354.htm
http://eo.wikipedia.org/wiki/UK_2014
http://sezonoj.ru/2014/08/bonaero-3/
https://www.facebook.com/uk2014
http://www.liberafolio.org/uk-2014
http://esperantaretradio.blogspot.com.es/2014/08/universala-kongreso-de-esperanto-en.html
http://esperanto.cri.cn/621/2014/07/28/1s164707.htm

Ankaŭ oni povas vidi, en ***Interreto***, videojn pri la kongreso aŭ en ia rilato kun ĝi, en la jenaj ret-adresoj:
https://www.facebook.com/video.php?v=10204428406257756&set=vb.1459241357&type=2&theater
https://www.facebook.com/video.php?v=10204413392442420&set=vb.1459241357&type=2&theater
https://www.youtube.com/watch?v=lGIUMQHFkHI
https://www.youtube.com/watch?v=_hf8fZVt7Uk
https://www.youtube.com/watch?v=ewoC5Utggp0
https://www.youtube.com/watch?v=m-EKPiDm53A
https://www.youtube.com/watch?v=KlsqdOnYfLg
https://www.youtube.com/watch?v=itkUETdPo-8
https://www.youtube.com/watch?v=z9ke2nfu3Zw
https://www.youtube.com/watch?v=wCYwrqZNYuk
https://www.youtube.com/watch?v=vP6tmsL5aj0
https://www.youtube.com/watch?v=fZRwYmany6o
http://vimeo.com/102486252
https://www.youtube.com/watch?v=aodzJtE-GGg
https://www.youtube.com/watch?v=bdnXlM9R4kE
https://www.youtube.com/watch?v=0PzDhtsbS_w

Rezolucio de la 99-a Universala Kongreso de Esperanto

Ni, 706 partoprenantoj en la 99-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj el 57 landoj de ĉiuj mondpartoj al Bonaero, Argentino,
Diskutinte en pluraj sesioj pri la temo "Ĉu la nepoj nin benos? Streboj al daŭripova estonteco";
Konstatinte,
Ke Esperanto reprezentas plene aktualan strebadon, kun evidentaj ligoj al aliaj esencaj agadoj kadre de la nuntempaj tutmondigaj tendencoj,
Ke la celado al sanaj, daŭripovaj socioj, bazitaj sur paco, justeco, demokratio kaj ekonomio servanta al la homoj kun respekto al la vivosubtenaj sistemoj de la naturo, kongruas al la interkultura solidareco kiu ĉiam motivis la Esperanto-movadon,
Kaj ke en la diversaj aliroj al daŭripovo ofte mankas sufiĉa atento al la ligo inter la lingvaj demandoj kaj aliaj esencaj agadoj, kio donas al ni la taskon daŭre kaj pli efike labori tiukampe;
Alvokas
Ĉiujn subtenantojn de Esperanto fari ĉion eblan por plenumi nian apartan rolon kiel movado por justa, konscia multlingvismo, kaj viciĝi inter la diversaj sociaj movadoj por interkultura kaj kontraŭdiskriminacia edukado, homaj rajtoj, naturprotektado, popola klerigado, rimedoŝparaj vivstiloj kaj aliaj;
Deklaras,
ke la valoroj necesaj al la konstruado de daŭripova monda socio estas kernaj valoroj de nia movado, ĉar mondo, en kiu Esperanto daŭre havos sencon, estos mondo, kiu ekonomie kaj ekologie, politike kaj kulture, konservas diversecon, pacon kaj justecon.

FOTOJ DE LA UNIVERSALA E-KONGRESO EN BONAERO





Komence de oktobro la urbo Salou situanta proksime de Tarragono en Hispanio gastigis la kvaran fojon Internacian E-Semajnon. Jam de kelkaj jaroj la nombro de ĝiaj partoprenantoj superas 140. Ĉi-foje ili venis el dekdu landoj. Alloga loko ĉe la maro altiras geesperantistojn por komuna unusemajna restado en bona etoso. Multaj jam konas unu la alian, sed ĉiam aperas novuloj, kiuj bone integriĝas al la grupo de fideluloj. La plej aĝaj estis la geedza paro el Katalunio: Trini García 97-jaraĝa kaj Joseph Colom baldaŭ 100-jaraĝa! Al ili estis ĉi-jare aljuĝita la premio "Ada Sikorska Fighiera" pro ilia meritplena laboro por Esperanto.
En la solena inaŭguro ĉeestis kaj bonvenigis nin la urbestro de Salou S-ro Pere Granados Carillo. Li prezentis al ni la urbon el la vidpunkto de turismo, substrekis gravecon de Esperanto kaj deziris al ni sukcesplenan restadon kaj fruktodonan laboron. Poste okazis komuna fotado.
Dum la Semajno okazis E-kursoj. Progresantojn gvidis la sperta instruantino Rodica Todor el Rumanio. Ĉi-foje ŝi proponis tre interesan temon: "Esperanto - Ponto inter kulturoj en multlingva, pluretna socio". Ŝi klarigis FLAM-analizon, laŭ kiu ni poste en grupoj diskutis kaj faris konkludojn. FLAM temas pri: Fortoj-Lamaĵoj-Avantaĝoj-Minacoj. Pluraj partoprenantoj en tiuj diskutoj rakontis pri siaj spertoj rilate la instruadon, redaktadon de lokaj bultenoj aŭ organizadon de diversaj aranĝoj kaj staĝoj. Ili dividis siajn sciojn kaj spertojn kun aliaj.
Pri komencantoj okupiĝis Thierry Saladin. Li ankaŭ prezentis prelegon kaj klarigis pri la internacia peticio titolita "Esperanto, oficiala lingvo de Eŭropa Unio Tuj!" iniciata de 16-jaraĝa junulo en februaro 2013. La deziro estas akcepti Esperanton TUJ! Tiucele estis fabrikitaj T-ĉemizoj, kiujn Thierry vendadis dum la aranĝo.
Gian Carlo Fighiera regalis nin per la verko de Alexander Puŝkin "La Neĝoŝtormo" kaj "La Damo de Piko". Fine ni ĝuis la novelon "Palto" de Nikolaj Gogol.
Floreal Gabalda projekciis filmon el Nepalo pri la "Speciala Renkontiĝo", okazinta tie ĉi-jare komence de marto. Ni partoprenis en ĝi. Multaj aprezis la filmon kaj demandoj pri niaj spertoj ne mankis.
Marcel Delforge parolis pri siaj vivspertoj kaj rakontis pri kelkaj el siaj multnombraj vojaĝoj en Esperantio ilustrante ilin per kelkaj bildoj.
Rafaela Urueña prezentis sian libron "Eŭropo paŝon post paŝo" el jura vidpunkto. Intereso pri kelkaj ekzempleroj kiujn ŝi kunportis estis granda kaj la stoko rapide elĉerpiĝis.
János Petik prezentis la temon "La disvastigo de Esperanto", sed antaŭe li parolis pri kelkaj gramatikaĵoj.
Vesperaj programeroj inkluzivis du interkonatiĝojn. María Ferigle Danti prezentis per DVD operon "IL TROVATORE". Ŝia edzo Luis Serrano Pérez animis du vesperajn debatojn: "Kiun influon havas nia movado en la socio?" kaj "Ĉu la Semajno bone funkciis?". Oni povas diri, ke "jes" malgraŭ kelkaj malglataĵoj. Luis ĉefe okupiĝis pri libroservo. Je dispono de la partoprenantoj estis ankaŭ fotoalbumoj. La ĉeestantoj povis trarigardi ilin kaj ekmemori antaŭajn E-Semajnojn kaj aliajn E-eventojn. Unu el la plej atendataj kaj ŝatataj eventoj estas la folklora vespero kun la ensemblo *Montjuic*, kiu ĉiam regalas nin per belaj havanaj kantoj instigaj al dancado. Tiuokaze ne mankas *Cremat* - bongusta trinkaĵo el bruligita rumo kun aldonaj spicaĵoj.
Okazis unu tuttaga kaj du duontagaj ekskuroj. Pri la gvidado zorgis Rosa López kaj Antonio Martinez. Ni vizitis groton de Maravelles. Kuriozaĵo en tiu groto estas, ke el la plafono pendas kelkaj kalkaj formaĵoj kreskantaj ĉiudirekten. Partoprenantoj de la alia duontaga ekskurso vizitis la urbon Tarragono. Kelkaj profitis belan veteron por refreŝiĝo en la hotela naĝejo aŭ en la maro, aliaj promenis tra la urbo Salou, iuj vizitis la amuzparkon "Bona Aventuro". Grupeto de piedirantoj promenis ĝis novkonstruita lumturo situanta ne tro malproksime de la *Cap Best Hotel,* en kiu ni loĝis. Survoje al ĝi Antoni Comellas atentigis nin pri kelkaj botanikaj plantoj kaj kompetente informis pri ili. La tuttaga ekskurso gvidis nin al la urbo Amposta, kie ni enŝipiĝis kaj navigis sur la rivero Ebro ĝis la maro.
Koran dankon al la katalunaj samideanoj pro ilia fervora laboro kaj okazigo de tiu-ĉi plaĉa aŭtuna evento al kiu ni jam sopiras venontjare.

Liba Gabalda



2014

Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

La Unua Mond-Milito




Ĝuste antaŭ unu jarcento, en la jaro 1914, komenciĝis milito kiu estis daŭronta ĝis 1918. Grava karakterizaĵo de tiu konfliko estis la multenombro da homoj batalintaj kaj landoj implikitaj en ĝi. Jam dekomence militis grandparto el la eŭropaj landoj, la ĉefaj potencoj de la kontinento, poste intervenis kromaj eŭropaj landoj kaj eĉ ekster-eŭropaj potencoj: Usono, Japanio… Do, tiu milito estis la unua kiu ricevis la titolon: "Monda".
Alia karakterizaĵo de ĉi tiu milito estis la fakto ke en ĝi interfrontiĝis, unuafoje en la historio, industriaj potencoj kiuj havis koloniajn interesojn ligitajn al la disvolviĝo de la industrio. Kompreneble, estis aliaj kontraŭdiroj inter la batalantoj: vekiĝo de la naciismoj en la Balkana regiono, franca reklamaciado de la teritorioj Alzaco-Loreno okupitaj de Germanio ekde antaŭa milito…, sed la ĉefa kaŭzo estis la emo de la imperiismaj potencoj kontroli la riĉfontojn postulatajn de la industria progresado.
Oni povas aldoni trian karakterizaĵon, kiu ĝis nun eble ne estis sufiĉe priatentita de la historiistoj. Temas pri la fakto ke, almenaŭ en la unua fazo de la milito, estis granda popola entuziasmo favore al la milita interveno. Amasoj da civitanoj alkuradis volonte rekrutiĝi por esti sendataj al milit-frontoj. Tiutipa popola militema fervoro ne estis vidita en la eŭropa kontinento ekde la unuaj kruc-militoj. Tiu socia fenomeno meritas ian analizon. Percepteblas ke la tiamaj eŭropanoj tre malsimilis el la eŭropaj homoj de la antaŭaj jarcentoj. Dum la jarcento pasinta ekde la Granda Franca Revolucio okazadis en Eŭropo, kaj ankaŭ en Ameriko, kun aŭ sen liberalismaj revolucioj, interesa socia evoluo: la homoj ĉesis esti nuraj regatoj por fariĝi civitanoj kaj ili konsciis pri sia ĵus akirita civitaneco. Tiu realaĵo respeguliĝis en la popola teniĝo rilate al la militoj. Dum la antaŭrevoluciaj jarcentoj la popoloj suferadis la militojn deklaritajn de la tiamaj povoj: feŭdismo, reĝa absolutismo… Sed komence de la 20-a jarcento, la popoloj, akirinte civitanan protagonismon, generis siajn proprajn alvoiĝojn. Movadoj kiel la anakiismo kaj la marksismo estis esprimo de tiu popola rolado. Kaj estis alitipaj popolaj mobiliziĝoj: la naciismoj furorintaj dum la tuta 19-a jarcento estis alia signo de tiu fenomeno. Nu, specifa varianto de tiu naciismo estis, ĝuste, tiu identiĝo de la amasoj de la alte industriigitaj landoj kun la ekonomiaj interesoj de siaj respektivaj landoj. Sed la suferitaj malvenkoj, la alta kosto je sango de la akiritaj venkoj, la senĉesa postulado de plua rekrutado, la grandnombro da mortintoj kaj ceteraj ruinigaj rezultoj de la milito: urb-detruado, malsato kaj ĉiutipaj malfacilaĵoj, elrevigis la popolajn amasoj kaj malvarmigis ĝian militan entuziasmon. En Rusujo tiuj ruinigaj militaj sekvoj estis speciale gravaj kaj provokis revolucion en kiu dronis la carisma reĝimo.
Tial ke interbataladis industrie potencaj landoj, ĉi tiu konflikto distingiĝis ankaŭ pro la abundo da novaj armiloj: submarŝipoj, aviadiloj, tankoj, mitraloj, grenadoj… Multaj el ili disvolviĝis kaj perfektiĝis dum la milito mem: venenaj gasoj, flam-ĵetiloj…
Por ni, unu jarcenton post la konflikto, la afero havas pli ol nuran historian intereson ĉar la sekvoj de tiu milito tre influis sur la lasta jarcento (ĝi estis la semo kaj radiko de la Dua Mond-Milito), kaj eĉ sur la nuntempo: la nova potenco kiu elŝprucis tiam, Usono, estas la ĉefa nuntempa superpotenco en la mondo ĉar ĝi rezultis plifortigita ankaŭ de la rezulto de la Dua Mond-Milito kaj de la Malvarma Milito.
La studo de la historio de la jarcento post la Unua Granda Milito estas interesa ankau pro la nunaj cirkonstancoj, kiam multaj signoj ŝajnas anonci Trian Mondan Militon. Ĉu nia generacio scios eltiri el la lastjarcenta historio instruon por eviti tiaspecan katastrofon? Tiu-ĉi raporto celas esti kontribuo –eĉ se tre modesta– al la kompreno de la kaŭzoj (kaj la rezultoj) de tiaj militoj por eviti ties generiĝon kaj eksplodon.

La radikoj de la Konflikto



Ĉiuj historioj pri la Unua Mond-Milito komenciĝas per la priskribo de la atenco de Sarajevo de la 28-a de junio de la jaro 1914 per kiu estis mortigita la aŭstria Arkiduko Francisko-Ferdinando kaj ĉi ties edzino far iu fanatika bosnia aktivulo kiu celis la enkondukon de tiu regiono en la serbia lando.
Tamen tiu atenco ne estis la kialo de la milito sed nur ĝia detonaciilo. Plejparto el la eŭropa loĝantaro tute ne sciis kiu estis la Arkiduko Francisko-Ferdinando, kaj preskaŭ neniu estis aŭdinte antaŭe la nomon de la urbo Sarajevo nek estis konante la inter-balkanajn politikajn streĉitecojn. Krome, al la registaroj de preskaŭ ĉiuj landoj kun eble la escepto de la Aŭstria-Hungara Imperio, kaj malpligrade Rusio, estis tute indiferenta ĉu Bosnio unuiĝu aŭ ne kun Serbio. Kaj eĉ tiuj landoj, iomgrade implikitaj, ne konsideris tiun aferon kiel ***casus belli***, t. e. milit-kialon.
Se, tamen, la konflikto estiĝis, kaj atingis tiel grandan amplekson (14 landoj partoprenantaj, 70 milionoj da batalantaj soldatoj, 10 milionoj da mortintoj…), estis pro tio ke la cirkonstancoj estis pretaj por tia disvolviĝo de la afero. Oni povas diri ke la bruligeblaj materialoj estis amasigitaj, pretaj por ties incendio. La atenco de Sarajevo estis nur la alumeto kiu estigis la bruladon. La veraj kialoj manifestiĝis dum la ĝuste unumonata periodo pasinta ekde la mortigo de la Arkiduko kaj la komenciĝo de la militaj operacioj. Indas, do, ke ni iomete pristudu la tiamajn politikajn cirkonstancojn en la mondo kaj ĉefe en Eŭropo, kie troviĝis la ĉefaj potencoj de la epoko kaj protagonistoj de la konflikto.
Inter la plej potencaj landoj de Eŭropo jam tra longa periodo antaŭ la milito pliakriĝadis la konfliktoj pri interesoj. Ilia ĉefa ekonomia kaŭzo estis la neegala evoluo de la kapitalismo en tiuj landoj. Ekzemple en Britio la moderna ekonomio evoluis jam frue kaj tiu lando povis ekregi grandan parton de la mondaj merkatoj kaj krudaj materialoj. Kontraste, la germana ekonomio sekvis malfrue sed tre dinamike en tempo kiam la "kolonia kuko" estis jam preskaŭ komplete dividita inter Britio kaj Francio.
Ja, fine de la 19-a jarcento, Britio estis dominanta en la tereno de la teknologio, la financoj, la ekonomio kaj, ĉefe, la politiko. Germanio kaj Usono disputadis al ĝi la industrian kaj komercan hegemonion. Dum la dua duono de la 19-a jarcento kaj la komencaj jaroj de la 20-a okazis la disdivido de Afriko (kun la escepto de Liberio kaj Etiopio) kaj Suda Azio, samkiel la laŭgrada pliiĝo de la europa ĉeesto en Ĉinio, iu ŝtato kiu tiam troviĝis en evidenta dekadenco.
La ĉefaj koloniaj potencoj, Britio kaj Francio, interfrontiĝis en 1898 kaj 1989 pro iu incidento en Sudano, sed la rapida plipotenciiĝo de Germanio igis ke ambaŭ landoj interkonsentu per la t. n. ***Entente Cordiale***. Germanio, kiu posedis nur malgrandajn kaj malgravajn koloniojn en Afriko kaj iujn insulojn en la Pacifika Oceano, ambiciis pli kaj pli laŭmezure ke kreskis ĝia ekonomia kaj militista potenco post ĝia politika reunuiĝo en 1871. En la diplomatiaj cirkonstancoj de la epoko, Germanio povis kalkuli nur kun la alianco kaj apogo de la Aŭstria-Hungaria Imperio. Dume, la Rusa Imperio kaj Usono kontroladis ampleksajn teritoriojn, ligitaj per longaj fervoj-linioj.
Politike formiĝis du diplomatiaj kaj militistaj alianco-sistemoj, kiuj pli kaj pli evoluis al antagonismaj blokoj. Dume okazis la ĝis tiam plej enorma armado kaj floris naciismo kaj samtempe malpliiĝis la preteco pace solvi la konfliktojn pri interesoj.
Ekzistis kompleksa situacio inter la monarkiaj imperioj en Eŭropo. Kiel dirite, iuj el la eŭropaj imperioj havis ankaŭ transmarajn koloniojn. La pioniro de tiu politiko estis Britio sub la regado de Benjamin Disraeli okazinta inter 1874 kaj 1880, Poste, eĉ la iam heziteme imperiisma Otto von Bismarck finfine konstatis la valoron de kolonioj por sekurigi –laŭ liaj vortoj– "novajn merkatojn por la germana industrio, la ekspansion de komerco, kaj novan kampon por germanaj agado, civilizo kaj kapitalo". La absolutismaj ***Centraj Potencoj***, gvidataj de la ĵus unuiĝinta, diname industriiĝanta Germana Imperio, kun ekspansianta mararmeo, kiu duobliĝis laŭ grando inter la Franca-Prusa Milito kaj la ***Granda Milito***, estis

strategiaj minacoj al la merkatoj kaj sekureco de la pli establitaj Aliancaj Potencoj kaj Rusio.
La ***Kora Akordo*** estis neformala konsento inter Britio kaj Francio planita por malrapidigi la germanan ekspansion. Kune kun la franca-rusa alianco, ĝi servis komunan geopolitikan intereson. Francio kaj Britio estis do devigitaj fini sian jarcent-daŭran malamikecon. Britaj politikistoj timis la eblecon de ankoraŭ unu germana milita venko kiel en la Franca-Prusa Milito, el kiu racie povus rezulti germana preno de la transmaraj kolonioj de Francio. Ĉi tiu ebleco estis speciale timiga konsiderante, ke la francaj kolonioj ĝenerale estis proksimaj al la britaj; Niĝerio, ekzemple, estis ĉirkaŭata de franca teritorio, Hindio estis proksima al Franca Hindoĉinio, ktp.
Post la morto de la germana imperiestro Vilhelmo la 1-a en 1888, lia filo, Frederiko la 3-a heredis la kronon de Prusio kaj la tronon de la Germana Imperio. Mallonge post lia ekregado, li mortis pro kancero, kaj sukcedis lin lia filo Vilhelmo la 2-a. Malbonega diplomato kaj pli malbona politikisto, Vilhelmo ĉefe malhelpis la provojn de la maljuna Kanceliero Bismarck konservi la diplomatian potenco-ekvilibron kiun tenis Francion izolita. Ankaŭ li malhelpis la enlandan realpolitikon de Bismarck, kiu tenis konservativajn partiojn en relativa potenco en la ***Reichstag***. Post la balotado de 1890, kiam la centraj kaj maldekstraj partioj atingis konsiderindan gajnon, parte pro la malŝato de tio, ke la imperiestro havis la saman Kancelieron kiel dum la regado de lia avo, Bismarck devis demisii. Li mortis post ok jaroj antaŭ ol li povus vidi Vilhelmon la 2-an detrui la diplomatiajn kaj militajn gajnojn de li atingitajn.
Strategia konkurenco inter la Brita kaj Germana Imperioj post la emeritiĝo de Bismarck pliintensigis la klopodon fortikigi la ekzistantajn influo-sferojn kaj preni novajn koloniojn. Ekzemploj de ĉi tiuj konfliktoj estis la Maroka Krizo de 1905 kaj la Krizo de Tanĝero. Ĉi tiuj konfliktoj komenciĝis, kiam Vilhelmo agnoskis la sendependecon de Maroko el Francio, la nova strategia partnero de Britio.
La specifa disfalo de la alianca sistemo, kiu estis konsiderita de Bismarck kiel ĉefa, estis preskaŭ tute kaŭzita de Vilhelmo la 2-a. Rusio estis interakordinta defendan pakton kun la Germana Imperio dum la regado de Bismarck. Vilhelmo rifuzis renovigi ĝin pro necertaj kialoj. Kiam Britio –kiu tradicie emis izolismon, sin limiganta regi sian transmaran imperion– ŝanĝis tiun izolitecan politikon, ĝi unue penis alianciĝi kun la Germana Imperio. Oni notu, ke la britaj monarkoj estis de la Domo de Hanovro, kiu estis parenca aŭ inter-geedza kun multaj germanaj noblaj domoj, inkluzive Hohenzollern, la regantoj de la Germana Imperio. Plie, Vilhelmo la 2-a, nepo de la reĝino Viktoria estis, do, nevo de ŝia filo, la reĝo Eduardo la 7-a. Ne profitante de tiuj ligoj, Vilhelmo ofendis sian onklon, kiu poste alportis sian helpon al la efektivigo de la angla-franca Entento, li mallaŭdis la "malestimindan etan armeon" de Britio, malakceptis ilian oferton, kaj komencis mar-armean armilkonkuron. Tiele Vilhelmo gajnis la malamikecon de du el la grandaj potencoj de Eŭropo, kiuj interalianciĝis poste kun Francio kiu, kvankam estis malforta, tamen estis la plej granda malamiko de Germanio ekde la antaŭa milito. Ja, Francio emis venĝon pro la malvenko kiun ĝi suferis antaŭ Prusio en la milito de la jaroj 1870-1871. Dum la sieĝo al Parizo la germanaj princoj estis proklamintaj la Duan Germanan



Imperion en la Palaco de Versajlo, kio signifis egan ofendon por la francoj. La Tria Respubliko perdis en tiu milito la teritoriojn de Alsaco kaj Loreno kiuj fariĝis parto de la nova Germana Imperio. La francaj generacioj de la fino de la 19-a jarcento nutris la ideon venĝi la ofendon rekuperante tiujn teritoriojn.
La Aŭstria-Hungaria Imperio kaj la Rusa Imperio, la du tradiciaj malamikoj de la Turka Imperio, estis impulsintaj kontraŭ-turkan politikon. Vieno volis daŭrigi sian ekspansion tra la valo de la Danubo ĝis la Nigra maro, submetante la slavajn popolojn. Sed la Rusa Imperio, ligita per rasaj, kulturaj kaj religiaj kialoj al la balkanaj slavoj, sin sentis natura aliancano kaj defendanto de tiuj popoloj kaj krome emis elireblon al la Mediteraneo.
Tiu politika streĉiĝo generis, depost la jaro 1882 la formiĝo de du aliancoj:
- La ***Triobla Entento***: Francio, Britio kaj Rusujo.
- La ***Triobla Alianco***: Germanio, Aŭstri-Hungario kaj Italio.
Do, komence de la 20-a jarcento estis en Eŭropo delikata forto-ekvilibro, kiun domaĝis iuj eventoj:
- Brita aliĝo al la franc-rusa alianco, instigita de la timo pro la minaco de la Germana Imperio al la brita mara supereco.
- Germanaj kaj aŭstria-hungariaj kontestoj al la angla-franca-rusa ***Triobla Entento.***
- Germana timo pro la rapida refortiĝo de Rusio post ĝia malvenko en 1905 antaŭ Japanio kaj la tiujara revolucio.
- La estiĝo de potencaj naciismaj aspiroj inter la balkanaj ŝtatoj, kiuj laŭvice implikis Berlinon, Vienon aŭ Peterburgon per diplomatia subteno.
La balkanaj landoj liberigitaj el la Turka Imperio iĝis celo de la ambicioj de la grandaj potencoj de Eŭropo. Al la iama granda Turka Imperio restis nur la urbo Istambulo en Eŭropo post la perdo de Grekujo, Serbio, Bulgario, Romanio, Albanio… La novaj balkanaj landoj ekspansiis tra la la teritorioj de la najbaroj, kio okazigis plurajn konfliktojn, nomatajn la **Balkanaj Militoj**, inter 1910 kaj 1913. La regiona prisekureca interesiĝo de Aŭstrio kreskis pro la preskaŭ-duobligo de la teritorio de la najbara Serbio rezulte de la balkanaj militoj de 1912-1913.
Tiuj jardekoj antaŭ la Granda Milito estis konata kiel la "Armita Paco" ĉar tiam la ĉefaj eŭropaj landoj estis destinantaj grandajn monsumojn por la akumulado de armiloj kvankam ne estis fakta milito, sed oni sciis ke baldaŭ estiĝos konflikto. Estas klare ke, en kio rilatas al meĥanismoj por eviti militajn konfliktojn, la tiama situacio de Eŭropo kaj la mondo ĝenerale povas esti difinita kiel «internacia anarkiismo». Estis epoko de necerteco ĉar tiam ne ekzistis en Eŭropo ia diplomatia kaj politika kadro de interakordo, sed nur ia konfuza reto de nefirmaj kaj neperfektaj militistaj aliancoj, kiuj povis nur subteni dum iom da tempo ian malstabilan ekvilibron bazitan ne sur vera internacia komunumeco, sed sur ia tipo je socio kiu estis formiĝanta ekde la granda Franca Revolucio, en kiu superregis la sekretismo de la politikaj kaj militistaj decidoj de la ŝtatoj.
Sed, krom la ĝis nun priskribitaj kontraŭfrontitaj interesoj de la landoj, estis, inter la kialoj aŭ radikoj de la milito aliaj sociaj kaj soci-politikaj elementoj kiuj povas esti konsiderataj kiel faktoroj favoraj al la eksplodo de la konflikto. Ĉar la ekonomia prospero de Germanio ne estis akompanita de politika nek socia progreso, tio generis fortan internan streĉiĝon. Oni atribuis al la prusia aristokrataro kaj al la imperiestro (kajzero) la volon provoki la militon por malhelpi la socialan evoluon starigante en la eŭropa kontinento la germanan hegemonion. Tamen ne nur en Germanio sed ĝenerale en ĉiuj landoj estis psikologiaj kialoj por la milito. La ekonomia progreso kontrastis kun politiko centrita en nacionalismaj celoj. Estis ega kontraŭdiro inter la ekonomia internaciismo kaj la politika naciismo. La naciisma sento tre disvastiĝis inter la eŭropa burĝaro laŭlonge de la 19-a jarcento kaj evoluis al ksenofoba ŝovinismo. Ĉiu lando trovis en sia historio kialojn je rankoro al la najbaraj landoj.
La agresemo kontraŭ la fremduloj estis komuna sento de ĉiu-klasaj civitanoj. En la ĉefaj eŭropaj urboj la soldatoj emis partopreni en la milita batalado. La amasoj kantadis patriotajn himnojn kaj la rezervanoj amase alkuradis al siaj kvartiroj, la virinoj ĵetadis florojn al la soldatoj defilantaj destine al la milit-frontoj. La junularo entuziasme ricevis tiun «liberigan militon». La junuloj timis ke la milito finiĝus antaŭ ol ili povos partopreni en ĝi ĉar ĉiuj pensis ke ĝi estos mallonga. Neniu povis imagi kiom tragike estus finiĝonta tiu naiva ĝojo. Temis pri la deziro de emocioj, aventuroj… kiel reago kontraŭ ia monotona kaj materiisma civilizacio. La junulara entuziasmo pri tiu milito povas esti eksplikata per la fakto ke, krom batali favore al la realaj interesoj de la nacio, por la junuloj de la malaltaj klasoj, vivantaj en la sociaj getoj, la milito estis ankaŭ iu solvo kiu anstataŭus la revoluciajn celojn kaj permesus al ili instaliĝi en pli konvenajn sociajn ŝtupojn. Estas klare ke per tiu erara pripenso, la superregantaj klasoj sukcesus malmobilizi ĉiun eblan revolucian procezon. Oni prikonsideru ke en la jaroj antaŭ la milito la situacio pli kaj pli fariĝis neeltenebla en multaj el la grandaj potencoj. Rusujo estis minacita de socia revolucio jam ekde la jaro 1905, la Aŭstro-hungara imperio estis disŝirata per bataloj inter la naciecoj kiujn la registaro ne kapablis kontroli. La parlamentaj registaroj, kiel tiuj de Britio kaj Francio, devis alfronti la plendojn de la laboristoj kaj la mezklasanoj kiuj postuladis pliajn politikajn rajtojn kaj pli bonajn vivkondiĉojn.
Fine, la milito estis rezulto ankaŭ de iu longa evoluo. Ĝia origino estis ligita al la Franca Revolucio kiam estis kreitaj la «armita nacio», la universala militista servo kaj la naciaj militoj.



La krizo de julio-1914

Matene, la 28an de junio-1914, la arkiduko Francisko Ferdinando, heredonto de la imperiestra krono de Aŭstrio-Hungario, kaj lia edzino, estis en oficiala vizito en Sarajevo, ĉefurbo de Bosnio, balkana regiono submetita al la Imperio. La loĝantaro de tiu regiono, plejmulte slav-etnia, abomenis la politikan dependecon de la Aŭstria-Hungaria Imperio kaj emis unuiĝi al la najbara lando Serbio, ankaŭ ĝi slava. Tiu tut-slava emo povas ŝajni al ni stranga nuntempe, kiam ni konas la rezulton de la milito de Jugoslavio okazinta antaŭ 20 jarojn, kiam dispartiĝis tiu lando far la premoj de la naciismoj de tiu teritorio.

En tiu mateno de la vizito de la aŭstria arkiduko al Sarajevo, dum la irado de tiu princo el la fervoja stacio al la urbodomo, oni ĵetis al lia aŭtomobilo bombon far aktivuloj de terorista grupo de slavaj naciistoj. La atenco ne trafis la arkidukon sed el ĝi rezultis vunditaj kelkaj personoj de lia sekvantaro. La oficiala ceremonio estis suspendita kaj la arkiduko adresiĝis per aŭtomobilo, kune kun lia edzino, al la hospitalo por viziti la vunditojn de la atenco. La polico estis arestinte la teroristojn partoprenintajn la atencon, sed unu el ili, Gavrilo Princip, sukcesis eskapi el la polica operacio kaj hazarde troviĝis en strato tra kiu pasis –ankaŭ hazarde- la aŭtomobilo de la aŭstria princo kiu devojiĝis pro eraro de la ŝoforo. La bosnia aktivulo profitis la okazon pafi kontraŭ la aŭstria geparo; la arkiduko kaj lia edzino mortis tie, en la veturilo, post malmultaj sekundoj.

Tiu ĉi alrangul-mortigo estis unu plia kaj tre simila al multaj regnestro-murdoj okazintaj en la epoko, kaj komence ŝajnis ke ĝi ne havus pliajn sekvojn ol la ceteraj, sed post malmultaj semajnoj komenciĝis militaj operacioj de konflikto kiu daŭrus kvar jarojn kaj kies sparko estis ĉi tiuj pafoj en Sarajevo. Tiu monata procezo de diplomatia kuirado de la konflikto estis nomita de aliaj historiistoj «La krizo de julio-1914». Ni trastudu tiun procezon.

Kvankam la mortigita arkiduko estis speciale amata nek en Aŭstrio nek en Hungario, la murdo de la heredonto de la habsburga regno vekis en la Aŭstria-Hungaria Imperio egan kontraŭserbian senton kiun oni perceptis jam dum la funebra ceremonio. Tiam ŝajnis klare por ĉiuj ke la bosniaj teroristoj ricevis apogon de la serbia ŝtato. Sed la regantaro de Vieno dubis pri la maniero alfronti la situacion: la maljuna imperiestro Francisko-Jozefo estis kontraŭa al la apliko de milita puno al Serbio timante la reagon de Rusujo. Tiorilate la germana ambasadoro, grafo de Hoyos, esprimis al la aŭstria registaro la apogon de la imperiestro Vilhemo la 2a, asertante ke la armeo de de la caro tute ne estis preta por aliri defende al Serbio. La grafo de Hoyos kunsidis la 4an de julio kun la kajzero Vilhemo kaj la germana subsekretario pri Eksterlandaj Aferoj. La imperiestro montriĝis preta apogi ĉiun ajn agadon iniciatontan de Aŭstrio, sed antaŭe li volus koni la opinion de la kanceliero Bethmann. Ĉi tiu, sekvinttage, apogis la sintenon de la kajzero kaj aldonis ke ĉiu ajn agado de Aŭstrio devus okazi kiel eble plej rapide por prezenti al la ceteraj potencoj ian plenumitan fakton kaj tiele kontroli la konflikton evitante ĝian ekspansion. Sed la aŭstria mobilizado ne povis esti rapida: multaj soldatoj de Aŭstrio-Hungario troviĝis en forpermeso pro la agrokultura rikoltado kaj ne revenus al siaj kazernoj ĝis la 15a de julio.

Ĉiukaze, julio de 1914 laŭŝajne ne estis la plej konvena okazo por la komenciĝo de milita konflikto inter la plej potencaj landoj de Eŭropo. Estis epoko de feriado de la reĝaj kaj ministraraj familioj. La germana imperiestro, post certigi al la kanceliero kaj al la ministro pri Milito ke estis neniu perspektivo de militaj operacioj, li forvojaĝis por navigi per sia vel-ŝipo en la Norda Maro dum tri semajnoj. Dume, en Vieno, kalkulante je la germana helpo, progresis inter la regantaro la ideo ataki Serbion. En Britio estiĝis atento pri la ebleco de milito sed ĝenerale la timo tiurilate ankoraŭ ne estis granda.


La 13an de julio la registaro de Aŭstrio-Hungario ricevis informon laŭ kiu la murdistoj de la arkiduko estis ricevinte neniun apogon el la Serbiaj aŭtoritatoj. Tiu informo devus senaktivigi la preparadon de agresa respondo, sed la regantoj de Vieno decidis teni ĝin sekreta ĉar la deziro puni Serbion pezis sur ili pli ol la volo agadi laŭ la realaj faktoj. La ministroj, pensante ke neniu potenco alkurus defendi Serbion, konvinkis la maljunan imperiestron Francisko-Jozefon sendi ultimaton al la serbia registaro. Pro la avertoj de la rusa ambasadoro en Vieno, la imperiestro hezitis konsenti pri la sendo de tiu dokumento, sed fine la aŭstria ambasadoro en Belgrado prezentis la ultimaton en kiu estis dekkvin postuloj kaj kies respondo devus esti prezentata dum la sekvontaj 48 horoj. La Serbia registaro montriĝis preta akcepti plejparton el la aŭstriaj postuloj, sed estis iuj neakcepteblaj kaj humiligaj por ili kiel tiu ke estu aŭstriaj funkciuloj la juĝantoj de la serbiaj civitanoj implikitaj en la komploto. Sekvinttage, la rusa registaro dekretis mobilizadon de 13 armeaj korpusoj kaj ankaŭ en Aŭstrio-Hungario komenciĝis militista mobilizado. Eŭropo ekis gliti tra la deklivo de la milita abismo.

Pro la evoluo de la situacio, la reĝo Petro de Serbio ordonis mobilizadon, samtempe ke li komunikis al Vieno

la akcepton de la ultimato kiam restis nur dek minutoj por la finiĝo de la fiksita tempo-limo. La serboj akceptis ĉiujn kondiĉojn, eĉ tiujn humiligajn, kun la sola escepto de la postulita jura interveno de Aŭstrio, sed ili montriĝis pretaj negoci pri la afero. Spite al la akordiĝema teniĝo de Serbio, la aŭstri-hungaria registaro rifuzis la proponon je interparolado: la aŭstria ambasodoro ricevis ordonojn el lia registaro tuj forlasi Belgradon por ke la serboj ne havu okazon rekonsideri sian decidon; kelkajn horojn antaŭe jam oni estis translokiginte al Aŭstrio la sekretajn arkivojn de la ambasadejo. Pli ol ultimato, ĉio ŝajnas indiki ke oni serĉis nur pretekston por deklari militon al Serbio.

La 16an de julio la rusoj kaj la britoj entreprenis planon por malfermi procezon de konversaciado cele eviti la konflikton, sed la germanoj rifuzis tiun pacoiniciaton asertante ke ĝi estis nerealigebla.

La respondo de la germanoj estis interpretita kiel minaco, tial la brita Ministrejo pri Milito ordonis protekti la plej feblajn lokojn de la sudo de la lando, antaŭzorgante eblan germanan atakon.



La establitaj aliancoj inter la eŭropaj imperioj kaj la manko de diplomatiaj sekurec-meĥanismoj, igis ke iu konflikto pri interesoj pelis la ĉefajn potencojn en la abismon de la milito.

Dume la regantoj de Berlino daŭre efektivigadis premon sur tiuj de Vieno cele de ke ĉi tiu tiuj entreprenu atakon kontraŭ Serbio, spite al tio ke la aŭstria mobilizado ĵus dekretita ne estus finplenumata antaŭ du semanoj. Siaflanke, la brita registaro daŭre estis planante sensukcese ĉiutipajn formojn je mediacio.

Subite, la 28an de julio ŝanĝiĝis la teniĝo de la kajzero, kiu sendis al sia ministro pri Eksterlandaj Aferoj noton per kiu li asertis ke la serbia respondo al la ultimato povus kontentiĝi la aŭstrian registaron kaj ne estos necese provoki militan konflikton. Tamen, ĉi tiu neatendita akordiĝema sinteno de iu el la ĉefaj instigintoj de la pormilita procezo alvenis tro malfrue. Tiam, en la stratoj de Vieno la loĝantaro esprimadis entuziasmon pri la perspektivo de la milito. En la tagmezo de tiu 28a de julio, ĝuste unu monato post la atenco en kiu mortis la arkiduko en Sarajevo, Aŭstrio-Hungario deklaris militon al Serbio. La milito estis jam neevitebla, sed en la tiama stato de la aferoj nenio ŝajnis indiki ke la konflikto evoluus al tiel ampleksa interfrontiĝo kiu fine fariĝis Mond-Milito. Oni alvenis al tiel katastrofa disvolviĝo de la afero pro la fiasko aŭ kompleta manko de diplomatiaj sekurec-meĥanismoj.

La 29an de julio okazis en ĉiuj eŭropaj Ministrejoj pri Eksterlandaj Aferoj intensa diplomatia aktivado. Germanio mobilizis sian mararmeon, malgraŭ la porpaca interakordo kiun la brita monarĥo, Georgo la 5-a, estis espriminta al la germana imperiestro pere de ĉi ties frato kiu troviĝis tiam en Anglio. Eĉ tiele, la brita mararmeo estis komencinta poziciiĝi en la Norda Maro por respondi al la germana milit-ŝiparo.

En la sama tago, Rusio dekretis partan mobilizon; en tute ses milionoj da soldatoj ekiris al la fortikaĵoj de la aŭstria land-limo, dum komenciĝis bombardado sur Belgrado. La caro, kiu deziris ne kontraŭfrontiĝi kun Germanio, sendis urĝan telegramon per kiu li petis al la kajzero –kun kiu li havis grandan amikecon– ke ĉi tiu haltigu la aŭstrian ofensivon. Vilhelmo respondis al li asertante fari ĉion eblan por starigi interkonsenton de la du batalantaj landoj. Fine de la vespero de tiu streĉiga tago, konfidante je la vorto de la germana imperiestro, la caro intencis nuligi la mobilizadon, sed lia registaro konvinkis lin ke tio estis neebla, ĉar la rusa militista maŝino jam estis ekmovigita. Nikolao la 2-a denove telegrafiis al Vilhemo la 2-a insistante pri la neceso je ĉi ties mediacio.

La sekvintaj tagoj estis simile deliraj. Spite al la porpacaj klopodoj de la kajzero, la registaro de tiu lando dekretis la 30an de julio partan mobilizon. Kiam la notico alvenis al Sankt-Peterburgo. la caro, konsternita pro la perspektivo de tuja milito, ne povis rifuzi subskribi tiuvespere ordonon de ĝenerala mobilizo.

Sekvintmatene, la estro de la germana stabo, Generalo Helmuth von Moltke, konsilis al la aŭstria registaro mobiliziĝi kontraŭ la rusa minaco. Konfidante pri la germana apogo, la aŭstriaj regantoj ordonis la sendon de tri milionoj da soldatoj al la rusia landlimo. Tiuvespere Germanio sendis ultimaton al la rusoj postulante ke ili ĉesu en siaj pormilita preparado, sed la postulo estis rifuzita.

Francio, kiu havis aliancon kun Rusujo, komencis mobilizi siajn trupojn cele deadmoni Germanion ataki ĝian orientan najbaron. Sed la popola entuziasmo preterpasis ĉion antaŭplanitan. La franca socialista movado, kiu poziciiĝis kontraŭ la milito, sin vidis tuj superita de la patriota fervoro de la laboristoj kaj de la tuta loĝantaro ĝenerale, kiuj emis venĝi la germanan humiligon al Francio en la antaŭa milito. Dum la soldatoj defiladis kun militista muziko tra la parizaj stratoj estis sekvitaj de la infanoj kaj kiŝitaj de la virinoj dum oni aŭdadis kriojn “Al Berlino!”. Simila popola entuziasmo kaj pro simila naciisma fervoro kaj similaj sociaj cirkonstancoj, estis en la ĉefaj urboj de la ceteraj potencoj implikitaj en la konflikto.


La 31an de julio daŭris la pormilita preparado en la eŭropaj ĉefurboj sur la fono de la entuziasmo de la amasoj kiu fariĝis la plej granda en Germanio la sekvintan tagon, kiam oni publigis tie la deklaron de milito al Rusio. La demarŝoj de la caro Nikolao intencante ke

la germana imperiestro revoku tiun decidon rezultis senutilaj. Pro la ĝenerala mobilizado de la rusoj, al Germanio rezultis neevitebla fari la samon por havi ian eblecon venki Francion unue, por kontraŭalfronti poste Rusujon. Do, la 1-an de aŭgusto Germanio dekretis la ĝeneralan mobilizon; tiutage mem faris la samon Francio. Vidante la aspekton kiun estis prenante la afero, la kanceliero Bethmann prezentis sian demision al la imperiestro, sed ĉi tiu respondis: «Ne!, vi kuiris ĉi tiun pladaĉon, nun vi devas manĝi ĝin».

La sekretaj planoj de la ĉefaj potencoj igis ke ĉiu ajn ne solvita krizo kondukus al ĝenerala milito. Iu fatala sinsekvo de eventoj kaj misaj decidoj, generis la plej grandan tragedion kiun la mondo spertis ĝis tiam. Al Germanio estis nepre necesa ataki Francion antaŭ la finiĝo de la rusa mobilizado. Tiucele, Germanio pretekstante francan aeran atakon sur Nurenbergo, deklaris militon al Francio la 3an de aŭgusto kaj invadis Belgion la sekvan tagon, kio provokis la anglan milit-deklaron al Germanio la 4an de aŭgusto.

Ĉiuj partoprenantoj en la konflikto pensis ke ĉi tiu estos mallongdaŭra. Fine ĝi daŭrus 51 monatojn kaj okazigus, laŭ ies kalkuloj, inter 10 kaj 12 milionojn da mortintojn. Neniu estis antaŭpensinta tiel detruigan kaj longdaŭran militon. Ĝi estis iu eraro kiu igus pagi altan koston al la eŭropaj ŝtatoj. Ĉi tiuj konstatis kun hororo la kolosajn rimedojn kiujn la modernaj kaj industriigitaj socioj povas meti serve de la milito dank' al la industria revolucio. Ĉi tie prezentiĝas la demando ne sufiĉe respondita de la historiistoj: ĉu eblis haltigi la maŝinaron kiun okazigis la eksplodon de la konflagracio? Ŝajnas evidenta ke en la komenciĝo de la Unua Mond-Milito ludis gravan rolon la horara prikonsidero; la germana mobilizado tute baziĝis sur la kunordigo de la landa fervojlinia reto por la transportado de la trupoj al la fronto, kaj de la sinkronigo de la horaro de la trajnoj por eltiri plej eblan profiton de la efiko de tiu transport-rimedo. Por la transportado de nur unu armea korpuso estis necesa preskaŭ milo da vagonoj por la infanterio, dumil por la artilerio, kaj preskaŭ trimil por la kavalerio, plus kromaj sesmil por la provizoj. Konsiderante ke Germanio havis kvardekon da tiaj armeaj korpusoj oni povas imagi la amplekson de la fervojan sistemon kiun oni devus organizi por plenumi la mobilizadon. La germanoj estis laborinte trozorgeme dum jaroj por organizi tiun meĥanismon kiun, post ties ekfunkciigo, jam ne eblus haltigi; la plej eta dubo en la aplikado de la plano igus la operación fali en kolosan ĥaoson. Ankaŭ la francoj, la rusoj kaj la aŭstrianoj dependis de kompleksaj mobiliz-planoj por certigi la koncentradon de la soldatoj kaj ĉi ties sekva sendo al la fronto. Ĉi tio klarigas la fakton ke en la cirkonstancoj de tiu epoko ne eblis haltigi la pormilitan procezon pere de simpla ordono.

Francisko-Jozefo kaj ties Aŭstria-Hungaria Imperio




Francisko-Jozefo de Habsburgo (1830-1916). Imperiestro de Aŭstrio kaj poste ankaŭ reĝo de Hungario, Bohemio kaj aliaj teritorioj konstituantaj, ekde 1867, la t. n. Aŭstria-Hungarian Imperion. Li estis nepo de la unua imperiestro de Aŭstrio, Francisko la 1-a. Post la kurta kaj kriza reĝado de lia mense malsana onklo Ferdinando kaj la sufoko de la revolucio de 1848, Francisko-Josefo, reĝadis de tiam dum 68 jarojn. Estante 24-jara, li edziĝis al Elisabeth de Baviera (Sissi).


La unuaj jaroj de lia regado estis signitaj de rigora absolutismo, kun subpremo kaj perforto al la opoziantoj. La plej ega subpremado okazis en Hungario; post la revolucio de 1848 oni altrudis tie centralisman kaj draste absolutisman konstitucion kun totala submetiĝo al Aŭstrio kaj sen ia ajn rajto. Sed en la jaro 1851, en la tuta Imperio, la absolutista konstitucio estis abolita, la kontraŭrevolucia reakcio iompostiom malaperadis kaj la reĝa aŭtoritatemo mildiĝis.

La naciismaj aspiroj de la submetitaj etnioj de la Imperio senĉese kreis problemojn kiujn la Imperio ne ĉiam sukcesis solvi. En Italio okazis ĝia unua fiasko, ĉar la italoj, kun la helpo de Francio venkis la aŭstriajn fortojn en Magento kaj Solferino en la jaro 1859, kaj la Imperio devis cedi Lombardion al la reĝo de Sardio. Estis ankaŭ disputo, kiu derivis al milito, kun Prusio pro la duk-landoj de Schleŝig-Holstein kaj la polemiko por la hegemonio de la germana Konfederacio. En tiu milito Aŭstrio estis venkita en Sadovo kaj pro la ***Traktato de Prago***, en 1866, ĝi estis ekskludita el la germanaj aferoj. En la sama jaro Aŭstrio perdis ankaŭ la Veneci-landon, kaj sekve ĝian povon en Italio. En la jaro 1867, dank' al la progresistaj kaj liberalaj ideoj de Sissi kaj ĉi ties apogo al la hungara afero, oni subskribis la ***Aŭstria-Hungarian Interakordon***, per kiu oni agnoskis Hungarion kiel aŭtonoman enton, kun propra registaro sed sub la aŭstria monarkio, kiu de tiam nomiĝis Aŭstria-Hungaria Imperio.

La sekvintaj jaroj estis malfeliĉaj por la imperiestro: en 1867 estis mortpafita en Meksiko lia frato Maksimiliano; en 1889 sin mortigis Rodolfo, la sola vira filo de Francisko-Jozefo, du jarojn poste mortis alia frato lia, kaj 1898 lia edzino Sissi estis murdita en Ĝenevo far iu anarkiisto. En 1908 estis aneksitaj al la Imperio Bosnio kaj Hercegovino, kio generis la apero de naciismaj movadoj en tiuj balkanaj regionoj. Estis ĝuste en Bosnio kie, en 1914, estis murdita per atenco, fare de iu slava naciisto, la arkiduko Francisko-Ferdinando, kuzo kaj heredonto de la imperiestro, kio estis la faktoro kiu provokis la Unuan Mond-Militon. Francisko-Jozefo mortis en 1916, dum la Granda Milito. Lia heredinto, nepo de lia frato Karolo, regis la Imperion dum nur du kromaj jaroj, ĝis 1918, kiam la malvenko en la milito okzigis la dismembriĝon de la Imperio, la finon de la monarkio kaj la deklaron de la Aŭstria Respubliko.

Spite al ĝia reletiva grando, la Imperio estis febla, pli malforta ol la ceteraj eŭropaj potencoj, kun kiuj ĝi ne kapablis konkuri. Ne eblis al ĝi sin oponi al la germanaj celoj kvankam iuj el ili kontraŭis ĝiajn interesojn. La etnioj konstituantaj la Imperion estis kaŭzo de problemoj: ili estis konstanta minaco kontraŭ la unueco de la lando kaj perturbadis la rilatojn kun la najbaraj landoj. La slavoj konstituis 46 procenton el la loĝantaro, kaj ankaŭ ĉekoj rumanoj kaj italoj postuladis naciajn rajtojn. La registaro ne povis garantii ke la imperia armeo, en kiu oni devis doni ordonojn en 15 malsamajn lingvojn, sin tenu lojala dum longdaŭra konflikto. Meze de la internaciaj streĉiĝoj, la strategia pozicio de la Imperio estis tikla. En la jaro 1916, kun nesufiĉaj fortoj, la Imperio havis batalantajn malamikojn en ĉiuj zonoj: Serbio kaj Romanio en la sud-easto, Italio en la sud-ŭesto kaj Rusio en la nord-easto. Ĝia sola forto estis la alianco kun Germanio.








La germanaj planoj por la milito estis ellaboritaj de la Grafo Alfred von Schlieffen, estro de la plejalta stabo ekde 1891 al 1906 kaj forpasinta en 1913. Laŭ tiuj planoj, Germanio ne kapablus militi samtempe en du frontoj dumlonge, do, estus necese venki rapide kaj draste unu malamikon cele koncentri la fortojn kontraŭ la alia. Schlieffen alprenis la politik-militistan doktrinon de Clausewitz, laŭ kiu la koro de Francio situas inter Bruselo kaj Parizo. Malfacila milit-celo ĉar en la irejo estas la obstaklo de Belgujo, kies neŭtraleco estis garantiita de ĉiuj landoj, inkluzive Germanio. Kaze de neevitebla milito, laŭ Schlieffen, Germanio devus atingi la plej konvenajn kondiĉojn por certigi al si la venkon nuligante la belgian problemon. La alternativo ataki tra la sudo, trairante Svision, estus neebla ĉar tiukaze la germana armeo devus kontraŭfronti la svisan armeon kaj poste la francajn fortresojn de Besançon, Sangres kaj Dijon.

La franca generalo Raymond-Adolphe Serè de Rivières estis elpensinte duon-subteran fortik-linion, sed lia sistemo baziĝis sur la fido pri la belga neŭtraleco; la limo kun tiu lando apenaŭ estis fortikigita. Tamen la germana plano ne kontemplis la eblecon kontraŭfronti la francan fortik-linion sed ataki Francion tra Belgio. La celo estis la konkero de Parizo kaj tute detrui la militistajn fortojn de Francio en la daŭro de ses semajnoj, kaj al ĝi oni asignis 7/8 el la milit-fortoj destinante ceteran okonon por haltigi dumtempe la rusoj en Orienta Prusio. La plano estis sufiĉe riska ĉar dependis de rapida venko en Francio kaj la necerteco pri kion fari se oni ne atingus tiun celon.

La sukcedinto de Schlieffen, Helmut von Moltke, estis tute diferenca. Li timis lasi malfortan la maldekstran flankon kio permesus al la francoj invadi Germanion, io kion la aŭdaca Schlieffen kuraĝus akcepti provizore, kaj decidis meti ok el siaj naŭ divizioj en la maldekstra flanko kaj nur unu en la dekstra, ĝuste la malo el tio programita de Schlieffen. La plano por la invado de Belgio estis simpla: detrui la fortresojn de Lieĝo kaj Namuro kaj rapidi konkeri Antverpenon kiel kroman havenon kun alireco al la Norda Maro. Oni ne prikonsideris la eblecon ke armita rezistado de la belgoj ĝenus la rapidan iradon de la germanoj al Parizo.

La franca plejsupera stabo ne kapablis interpreti la strategian situacion. Subinflue de la malvenko en 1870, la francaj strategiistoj konceptis militajn planojn bazitajn sur defensiva skemo en kiu grave rolis la landlimaj fortresoj. Sed tiu strategio estis tiam diskutita de la kolonelo Louis Loyzeau de Grandmaison, direktoro de Militaj Operacioj. Lia plano postulis ofensivan strategion cele rekuperi la regionojn Alzacon kaj Lorenon, el kie la germanoj eltiradis trionon el sia produktado je fermineralo. Tiu-ĉi franca plano subtaksis la germanajn fortojn, ĉar baziĝis sur la kalkulo ke Germanio disponis je 45 diviziojn kiam, reale, estis jam 83 batalpretaj divizioj. Reciproke, ankaŭ la germanoj mistaksis la malamikajn fortojn. La sperto indikas ke iu ofensiva atako eblas sukcesi nur se oni disponas je trioblo ol la malamikaj fortoj kaj, en tiu epoko, la proporcio favora al Germanio estis nur tri kontraŭ du, do la fortoj estis relative ekvilibritaj.

La germana plejalta stabo mobilizis 3.822.450 soldatojn kaj 119.754 oficirojn, samkiel 600.000 ĉevalojn. Tiu kolosa forto estis transportita al la fronto dum 312 horoj per 11.000 trajnoj. Pli ol 2.150 trajnoj trairis la ponton sur la Rejno-rivero en Kolonjo ĉiu dekan minuton inter la 2-a kaj la 18-a de aŭgusto. La ŭesta armeo, konstituita de 1.600.000 homoj organizitaj en 23 armeaj korpusoj kaj 11 kiel rezervo, krucis la Rejnon per 560 trajnoj ĉiutage. Tamen estis egaj limigoj por la germana rapideco ĉar Belgio estis la lando kun plej densa loĝantaro en la mondo. Preskaŭ 600.000 homoj, kun siaj ĉevaloj kaj ekipaĵoj devis trairi Lieĝon ĝuste en la sudo de la urbo, iu malgranda kaj tre loĝata zono. Kavaleri-patroloj kaj unu skolta-grupo alvenis al Luksemburgo la 3an de aŭgusto. Poste, la armeoj situantaj pli norde sin ĵetis kontraŭ Belgujon la 4an de aŭgusto. La Unua Armeo, subgvide de Alexander von Kluck, kun 320.000 homoj, estis la plej granda el la sep armeoj atakantaj en la ŭesto. Tiele, iu el la unuaj landoj kiuj suferis la militon estis Belgio, kies neŭtraleco estis rompita je la komenciĝo mem de la milito. Germanio prezentis al la belga registaro ultimaton, kiun oni devus respondi en la sekvaj dekdu horoj, postulante la cedon de ĉiuj fortresoj, fervojoj kaj trupoj, subminace je bombardado de la fortikigitaj urboj. La reĝo de Belgio deklaris ke la ultimato estis neakceptebla kaj ĉiuj ĵurnaloj de la lando informis pri la afero. La belgoj respondis indigne kaj patriotisme, kaj okazis ĝenerala mobilizado meze de granda popola entuziasmo.

Le germanoj, kiuj esperis konkeri Lieĝon post tri tagoj, devis batali dum dek tagoj pro la rezisto de la fortreso de tiu urbo. Lieĝo estis la unua eŭropa urbo kiu estis aerbombardita. La belgoj okazigis grandajn perdojn al la invadintoj kaj ĉi tiuj efektivigadis sangajn reprezaliojn. Post la kapto de la fortreso Loncin, la Dua kaj Tria armeoj komencis sian avancadon tra Belgujo.

Jam en tiuj unuaj tagoj de la milito okazis iuj neatenditaĵoj. La eksterlandaj potencoj ne atendis la furiozon per kiu Belgio sin defendis el la germana invado. Kaj la germanoj ne atendis la koleron kiun vekis en la brita loĝantaro la perforto kontraŭ Belgio. Ja, la krueleco de la germanoj estis enorma pro la fuŝiĝo de siaj planoj: oni detruis konstruaĵojn kaj masakradis civilulojn. La kajzero ne atendis tian rezistadon de la belgoj kaj lia kolero esprimiĝis postulante ke parto el la belga teritorio estu aneksata al la Germana Imperio kaj ke la tie loĝantaj homoj estu forigitaj.

La germana Unua Armeo, kiu avancadis tra la dekstra flanko de la fronto, ne povis trairi pli ol 23 kilometrojn ĉiutage. La fervojoj estis senutiligitaj pro la sabotado de la belgoj, kaj la ŝoseoj estis kolapsitaj pro la fluo de

rifuĝintoj. La transportado pere de kamionoj ne estis sufiĉe disvolvigita en tiu epoko, do la provizado al la armeo devis esti farata per ĉevaloj. La armeo de Kluck utiligis 84.000 ĉevalojn, kaj granda parto el la provizaĵoj estis destinita al la ĉevaloj mem. La soldatoj, post la laciga tuttaga marŝado kaj foje ankaŭ batalado, devis okupiĝi pri la serĉado de nutraĵoj ĉar la belgaj civiluloj ne pretis kunlabori tiurilate. La murdo de civiluloj estis konsentita kaj eĉ stimulita de la superuloj. Konsciantaj pri la neceso rapidi kaj timante insurekcion en la ariergardo, la komandantoj konsentis kaj gvidis la sufokigon de la civila rezistado. En Dinant, 612 viroj, virinoj kaj geinfanoj mortis per fusil-pafado en la urba placo. La belgaj rezistantoj eksplodigis la fervojajn tunelojn por limigi la fluon de la provizaĵoj kaj la helpo-trupoj. En la sufokado de la rezistantoj estis ekzekutitaj almenaŭ kvin mil personoj kaj pli ol dekok mil loĝejoj estis detruitaj. La 25an de aŭgusto unu germana kolono alvenis al Loveno kaj bruligis per fosforo la stacidomon kaj la universitatan bibliotekon kun ĝia altvalora kolekto de antikvaj libroj.
Moltke estis dubanta ĉu li devus plifortigi la atakon en la flanko de Loreno. Li disponis la translokigon de kelkaj divizioj de rezervo al tiu zono kaj ordonis al la Sesa Armeo, subgvide de la princo Rupprecht de Bavario, defendi ĝin ĉiurimede. Tamen Rupprecht, kiu estis agemulo kaj gvidkapabla, decidis ke la ordonoj defendi ne ekskludas ataki. La 20an de aŭgusto liaj trupoj igis retroiri la francojn en Loreno. La franca ĉefkomandanto, Joseph Joffre, venis al la konkludo ke se la germanoj tiel estis fortaj en la nordo kaj en la sudo estis pro tio ke ili estis malfortaj en aliaj sektoroj. Do, kiam malsukcesis sia avanco en Loreno li pensis ke la centro de la germana fronto estis pli febla ol ĝi ŝajnis, kaj tien li sendis siajn Trian kaj Kvaran Armeojn. Kiam la francaj soldatoj avancis la rezulto estis iu masakro; ili estis devigitaj retroiri ĝis la Mozo-rivero, suferante 300.000 perdojn. La germanoj avancadis nehaltigeblaj.
La 5an de aŭgusto, la brita ĉefministro Asquith decidis kun siaj kunlaborantoj ke la Brita Ekspedicia Forto devus sin turni al la nord-easto de la franca fronto. La brita komandanto estis Siro John French kiu estis priskribita kiel fanfaronema kaj venĝema homo. Plejparto el liaj kolegoj pensis ke li estas nekapabla por tiu posteno. La 23an de aŭgusto la britaj fortoj koliziis kun la trupoj de Von Kluck en Mons: 200.000 germanoj kontraŭ 75.000 britoj. La germanoj mistaksadis la britan armeon kaj disdegnis sinkigi la ŝipojn transportantajn la britajn trupojn al la kontinento. Ili konsideris ke estis prefere tutvenki ilin post ilia alveno al la fronto. Mons estis unu el la unuaj bataloj okazintaj en industria urbo kaj la unua kun konsiderinda interveno de la aer-forto. La britaj soldatoj rapide fosis defendajn poziciojn dum la germanoj, kun senpacienco malaperigi tiun neatenditan ĝenon, falis en la eraron de la frontaj atakoj. La britaj fuzilieroj, trejnitaj por pafi al iu celo ĉiun kvaran sekundon haltigis la germanojn dum tuta tago.
La 23an de aŭgusto, French sciis ke la franca Kvina Armeo, subgvide de la generalo Charles Lanzerac, ne nur ne kapablis bremsi la germanan avancon, sed krome haste retiriĝis sen averti la britojn. Ĉi tiuj ne povis fari alion ol akompani la francojn en ties longa retroiro suden antaŭ la nerezistebla germana avanco. Ili trairis 321 kilometrojn dum du semajnoj, vera prodaĵo por infanterio kiu marŝadis sub sufokanta varmo kun lanaj uniformoj dum dudek horoj ĉiutage. Unu el la britaj batalionoj retroiris 88 kilometrojn dum 36 horoj. Centoj da homoj el ĉiuj armeoj falis plenlacigitaj, pro la varmo, tifo, malsato aŭ soifo. La lasta semajno de aŭgusto kaj la unua de septembro estis por ambaŭ armeoj senĉesa maratono de lacigaj marŝadoj komenciĝantaj frumatene kaj daŭrantaj ĝis plennokto.
Komence de septembro, longaj kolonoj de infanterio adresiĝis norden, al la milito, aŭ suden, malproksimiĝante el ĝi. La kampoj plenis je restaĵoj de militista ekipaĵo kiun la soldatoj forlasis por iri pli rapide, agoniantaj ĉevaloj kaj forlasitaj kamionoj. Esceptante la lokojn kie la armeoj estis koliziintaj kaj kie restis la mortintoj, ankoraŭ ne estis tro da detruaĵoj. En Parizo la ĵurnaloj esprimadis pesimismon laŭ la germanoj alproksimiĝis al la ĉefurbo. Oni konstatis ke la situacio komencis simili al tiu de la franca-prusia milito de 1870. En la ŝoseoj, la civiluloj konkuradis por spaco kun la francaj vunditoj kaj la germanaj kaptitoj.
Tamen, ne estis 1870. La germana plejalta stabo estis apartiĝanta el la Schlieffen-Plano. Ne nur estis okazante ke Kluck perdadis homojn por sieĝi la fokusojn de belga rezistado, sed samtempe Moltke estis fortigante sian maldekstran alon en Loreno. La 25-an de aŭgusto Moltke sendis du armeajn korpusojn al Orienta Prusio por alfronti la rusan minacon. Tio estis grava eraro, ĉar ambaŭ korpoj vojaĝis ĝis la fino de aŭgusto por iri de la ŭesto al la easto kaj tial oni povis kalkuli kun ili nek por la Batalo de la Marno nek por la batalo kiun oni estis preparante kontraŭ la rusoj. Tiuj translokigoj kaj la neceso sieĝi Antverpenon signifis la depreno de 270.000 homojn el la dekstra alo de la okcidenta fronto. La “martelo” sur kiu la la Schieffen-plano bazis sian konfidon malgrandiĝis al triono. Ju malpli da homoj havis la germanaj Unua kaj la Dua Armeoj, des pli ili apartiĝis unu de la alia dum ilia trairado sur la franca teritorio. La 27an de aŭgusto, Moltke permesis mov-liberecon al Kluck, kiu moviĝis sendepende de la Dua Armeo kiu akompanis lin. Konvinkita ke la britoj estis sin retirantaj al la Manika Kanalo, Kluck deziris moviĝi norden por bari al ili la retroiron. Tamen la Brita Ekspedicia Forto retiriĝadis suden, ne ŭesten, kaj troviĝis multe pli proksima al Kluck ol ĉi tiu imagis. La brita Dua Korpuso toviĝis tro laca por daŭrigi la marŝadon kaj decidis starigi defendajn poziciojn en Le Cateau la 26an de aŭgusto. Sekve okazis tie la plej grava batalo en kiu intervenis la angloj post Vaterlo. Temis pri operacio de retroiro kontraŭ 140.000 germanoj. La britoj perdis 8.000 homojn, kio ne estis granda kvanto kompare al aliaj masakroj de tiu milito, sed estis troa por armeo konsistanta el 100.000 homoj. La brita artilerio estis tre efika kaj mortiga por la germanoj, kiuj ripetis la eraron de la frontaj atakoj.
Pro lia obsedo persekuti la britojn kaj la francojn, Von Kluck estis perdinta la kontakton kun la Dua Armeo de Von Bülow. Supertaksante sian venkon sur la britoj, li decidis iri ne al la nordo kaj easto de Parizo, laŭ la origina plano, sed al la sudo kaj ŭesto de la ĉefurbo. Tiele li tre subriske enmetis sin ene de la malamikaj linioj, ĉar maldekstre de li, Bülow troviĝis tre malantaŭe. Ju pli la germanaj armeoj alproksimiĝadis al Parizo, des pli estis necesa ilia kunordigado. Tamen, ia konfuza silento falis sur la germana Alta Komando. Ĝia Ĉef-

Stabejo en Luksemburgo ricevis eĉ ne unu solan komunikaĵon el la Unua kaj Dua armeoj la 1-an de septembro. En tiu momento de la kampanjo, kun armeoj de milionoj da homoj en retroiro aŭ en persekuto, la rolo de la komunik-servo estis esenca. La germana komando tute ne sciis tiam kie troviĝis la malamiko kaj kiomaj estis ĝiaj fortoj. La britoj penetris tra la breĉo kiu estis malfermiĝinta inter la du germanaj armeoj. Ili estus povintaj profiti tiun okazon por doni detruan baton al la germanoj. Tamen, French ne sciis agi laŭ la postulo de la cirkonstancoj. Timeme, li ordonis prepari la revenon al Britio cele restariĝi. Estis necese ke la brita registaro haste sendu la novan sekretarion pri Milito, la kampo-marŝalon Lordon Kitchener-n, kun instrukcioj ke la Brita Ekspedicia Korpo adaptiĝu al la movoj de la franca armeo. Kvankam ofendita pro la ĉeesto de Kitchener, French fine ŝanĝis sian teniĝon kaj la brita armeo alprenis defensivajn poziciojn easte de Parizo.

La 2an de septembro, troviĝante Kluck 50 kilometrojn proksime al Parizo, la franca registaro retiriĝis al Bordozo, alprenante la defendadon de la ĉefurbo la militista guberniestro de Parizo, Generalo Joseph-Simon Gallieni. Inter la germanaj trupoj estis granda espero pri venko; iuj kavaleri-patroloj estis alvenintaj ĝis nur dek kilometroj de Parizo. Tamen multaj aferoj ne estis rezultantaj laŭ estis antaŭplanite. La malbona komunikado estis ruinigante la germanan planon. En la Ĉef-Stabejo de Moltke komencis regi pesimismo. Evidentis ke la malamiko libere moviĝadis, kiel evidentigis la fakto ke oni ne kaptis homojn kaj kanonojn. Krome la troa moviĝo de Kluck metis la tutan germanan flankon subdanĝere de franca atako kaj malfermis breĉon kun la Dua Armeo je sia maldekstro. La plano estis rompiĝanta per ĝia plej febla ĉenero: la loĝistiko. La germanoj de la dekstra flanko de la fronto ne povus daŭrigi sian avanco-ritmon por trairi 480 kilometrojn al la ŭesto de Parizo dum 40 tagoj. Dum nur 40 tagoj, la artilerio estis konsuminta la po mil kuglojn por ĉiu kanono kiujn oni estis planinte. Ĉiu armea korpuso konsumadis 130 tunojn da manĝaĵoj kaj furaĵo ĉiutage, bezonante 1.168 trajnoj por ĝin provizi. La 84.000 ĉevaloj de la Unua Armeo de Kluck konsumadis 900 kilogramojn da furaĝo ĉiutage, kio postulis 400 vagonojn. Tiamaniere la ĉevaloj fariĝis esenca elemento por la rapideco de la plenumado de la plano. Ju pli distance, des pli necesaj estis pliaj transport-rimedoj por alporti pli da nutraĵoj, por la ĉevaloj, ne por la homoj batalantaj en la fronto. Ne eblis kalkuli kun la transporto tra la ŝoseoj: 60 procento el la germanaj kamionoj paneis antaŭ la alveno de la armeo al la Marne-rivero. Ĉiukaze, estus necesaj 18.000 kamionoj por movi la dekstran germanan alon, nepensebla nombro tiumomente. La Aliancanoj, male, sin movadis al siaj proviz-linioj kaj povis efike uzadi la fervojan sistemon centralizitan en la ĉefurbo.



La kajzero Vilhelmo la 2-a kaj siaj generaloj

La 4an de septembro Moltke limigis la moviĝon de la Unua kaj Dua Armeoj kaj avertis ilin defendi sin el iu ebla franca atako ekde Parizo. Kiam la ordono alvenis al Kluck, ĉi tiu jam estis movinta plejparton el sia armeo suden trans la Marne-rivero. La batalo estis alvenante al sia kulmina punkto. Por la germanoj, la tempo estis elĉerpiĝinta. Antaŭsentante la egan danĝeron minacantan siajn armeojn, Moltke sendis Richard-Hentsch-n, iun sub-kolonelon, por gvidi du veteranajn komandantojn, krom la neoportunaĵo ke ĉi tiu estis sakso en armeo en kiu plejabundis la prusoj. Trairante la fronton, Hentsch renkontis Bülow-n kaj Kluck-n kulpigante unu la alian pro la breĉo malfermiĝinta inter ili. Li alvenis al la komandejo de Bülow je la 8-a horo de la 8-a de septembro kaj ĉi tiu konfesis ke li sciis nenion pri la situacio de la Unua Armeo de Kluck. Sekvinttage Hentsch alvenis al la komandejo de Kluck. Survoje li estis vidinta grandkvanton da ekipaĵo forlasita de la Alianculoj dum ĉi ties retroirado, aŭ de la germanoj por rapidigi la marŝadon. Li eksciis ke la britaj fortoj sin ĵetis al la breĉo malfermita inter la du germanaj armeoj, kiun Moltke estus povinta kovri per la du korpusoj kiujn li sendis al Orienta Prusio. La Sesa Armeo de Maunory sin ĵetis kontraŭ la rezerv-korpuso kiun Kluck estis situiginta norde de la Marne-rivero. Hentsch uzis sian povon por ordoni la germanan retroiradon dum la tuta franca armeo kaj la britaj fortoj sin ĵetis al atako. Ĉi tiuj ne sukcesis rompi la germanan fronton kaj la ofensivo estis haltigata. Kiam Kluck igis retroiri siajn du korpusojn trans la Marne-rivero kaj sendis ilin kontraŭataki la trupojn de Maunory, li malfermis alian breĉon inter la du germanaj armeoj. Spit' al ĉio, la germanoj sukcesis repuŝi la francan Kvinan Armeon kaj igis retroiri la naŭan Armeon. Tamen la paniko kaptis la germanajn komandantojn. La 9an de septembro, Bülow ordonis al lia armeo retroiri. Kluck ne povis fari alion ol agi same kaj ordonis retroiron al Soissons. La tuta germana kampanjo troviĝis ĉe la rando de katastrofo. Dum kvin tagoj post la 9-a de septembro, la germanoj retroiradis trans la riveroj Marne kaj Aisne, al la linio Nojono-Verduno. La germanoj preparis solidajn defensivajn poziciojn elektante la plej altajn regionojn. La Aliancanoj devis rezignacii okupi la malplej altajn zonojn kaj, do, plej kotaj kaj malsekaj en la fronto.

Neniam oni informis al la germanoj pri la fiasko de la Marne-batalo. Ĝi estis vera malvenko por la germanoj. Vilhelmo la 2-a konfesis sin senti tre deprimita kaj konsideris tiun batalon kiel la «decidan momenton» de sia vivo. La plej grava aspekto de la afero estis ke la Plano de Schlieffen estis la sola germana recepto por la venko; ne ekzistis alternativa plano. La kampanjo de 1914 baziĝis sur iu rotunda kaj decida venko en la ŭesto en la 40-a tago post la mobilizo. Kiam ĉi tiu venko

ne okazis, la granda veto estis fiasko. La germanoj haltis kaj la francoj haste sendis tri mil soldatojn de la Sepa Divizio de infanterio per 600 parizaj taksioj, iu el la patriotaj simboloj de la milito. La germana revo pri rapida venko vaporiĝis. Oni evitis la germanan hegemonion kaj Britio konservis sian ponto-kapon en la kontinento. Long-perspektive la sekvoj de la Marne-batalo estis tragikaj ĉar ebligis kromajn kvar jarojn da monotona reciproka masakrado en la tranĉeoj.
La lideroj de la batalantaj landoj venis al la konkludo ke ŝajnas konsilinde eviti frontajn atakojn. Joffre akceptis la britan peton ke la tiulanda armeo situiĝu pli proksime al ĝia bazo en la Manika Kanalo. Fine de oktobro la germanoj fine estis kaptinte Antverpenon. Eliminita tiu minaco en ĝia ariergardo, ili decidis uzi kvin el siaj rezervo-korpusojn, kiuj estis blokitaj en Antverpeno, por rompi la malamikan linion en Ipro. Ĉi tiu urbo konstituis aliancanan angulon eniĝantan en la germanajn liniojn.
Moltke estis anstataŭita de Erich von Falkenhayn, ministro pri Milito. Ĉi tiu malestimis plejparton el siaj kolegoj kaj konfidis je neniu; devigis siajn kunlaborantojn kaj sin mem labori senĉese kaj sia strategia rigardo ofte estis brila. La plano por Ipro estis ataki la elstaran angulon kaj penetri ĝis la havenoj de la Manika Kanalo, Dunkirko, Kalezo kaj Bulonjo. Ĉi lasta estis la ĉefa haveno por la provizado de la brita armeo. La kajzero prezentiĝis en la fronto esperante konduki siajn trupojn enen de Ipro. Por plifortigi la atakon, Falkenhayn uzis diviziojn de rezervo konstituitaj de volontaj studentoj. Kiam la batalo finiĝis, preskaŭ kvardek mil viroj kaj junuloj estis mortintaj aŭ suferintaj terurajn vundojn. Iu el la supervivantoj de tiu masakro estis Adolf Hitler kiu, kvankam li estis aŭstro, estis asignita al la 15-a Bavaria regimento kaj ĉeestis la teruran buĉadon en kiu centoj da germanaj rekrutoj estis ekstermitaj far la veteranaj anglaj soldatoj. Siaflanke, triono el la Brita Ekspedicia Forto pereis en la batalo, kio devigis la britajn regantojn rekrutadi hindiajn trupojn.


La generaloj Hindenburg kaj Lindendorff

La britoj, konservante Ipron, atingis elstaran angulon kiun etendiĝis ekde la Manika Kanalo ĝis la Alpoj. Por Francio la jaro finiĝis kun la germana okupacio de plejparto el la industria zono de la nord-easto de la lando. La regiono enhavis dekonon el la franca loĝantaro, 70 procenton el ĝiaj naftaj putoj kaj 90 procenton el ĝiaj ferominejoj. Por meti finon al la okupacio estus necese entrepreni ofensivon, io kio en la lastaj monatoj montriĝis tre sango-postula.
Dum estis okazantaj en la okcidenta fronto la bataloj ĵus priskribitaj, Germanio, kaj ankaŭ Aŭstrio-Hungario estis batalante kontraŭ la rusoj kaj aliaj landoj en la orienta fronto. Kiel dirite, Germanio mobilizis kolosajn fortojn en 1914, sep el ĝiaj ok armeoj estis destinitaj venki Francion antaŭ la reago de Rusujo. Tio signifis ke Aŭstrio-Hungario devus kontraŭfronti la rusojn dum ses semajnoj. Ĉiu malfruiĝo en Francio signifus risko en la orienta landlimo. Aŭstrio-Hungario ne estis bone ekipita por la tasko haltigi la rusan tajdon. Kvankam ĝi havis 50 milionojn da geloĝantoj, ekonomie ĝi ne povis subteni armeon de pli ol 480.000 homoj. La Imperio evidentiĝis nekapabla rekruti armeon: tri el ĉiu kvar eblaj rekrutoj sukcesis eskapi el la ŝtataj planoj. Nur malpli ol triono el la rekrutitaj homoj estis komplete trejnitaj. La provizado de municioj kaj uniformoj estis senefika. La etniaj problemoj kiujn suferadis la Imperio perceptiĝis ankaŭ en ĝia armeo. La manko de komuna lingvo igis tre komplika la fakton doni ordonojn. Ekzistis ankaŭ etoso de malfido inter Germanio kaj Aŭstrio-Hungario. La germanoj malestimis la multetnian imperion kaj la aŭstroj ankoraŭ rankoris pro la malvenko de 1866 kontraŭ Prusio.
Rusio havis grandan loĝantaron kaj, laŭteorie, ĝi kapablis subteni armeon de unu miliono kaj duono da homoj. La armeo respegulis la socian realaĵon: malriĉeco, aŭtokratio, malevoluo… Grandparto el la rekrutoj ne scipovis legi, tamen, la rusa soldato kompensis la trejnado-mankon per kuraĝo kaj obstino. Ĉar 80 procento el la soldataro estis kamparanoj, ili estis homoj alkutimigitaj al la duraj kondiĉoj kaj al la malfeliĉaj cirkonstancoj. Ili estis soldatoj kiuj meritis pli bonajn oficirojn. Tamen, en la altrangaj sferoj, la komandantoj konkuradis celante gajni la favoron de la caro. La junaj oficiroj karakteriĝis pro ilia koruptado kaj krueleco, kaj estis rimarkinda manko je suboficiroj. La provizad-sistemo estis fuŝa kaj la transport-sistemo rudimenta. Tamen la plej grava problemo de la rusa milit-maŝino estis ĝia industrio, nekapabla respondi la enormajn postulojn de granda armeo kaj longa kaj multekosta milito. Sed rimarkindas ke la fervoja sistemo tre estis modernigita dum la antaŭa jardeko kaj estis pli efika kaj rapida ol supozite en la Schlieffen-plano. La fortikaĵoj posedis pezan artilerion sed la sinmovantaj trupoj ne havis kanonojn. La diferenco inter la kavalerio kaj la infanterio estis troa. La trupoj povis alveni baldaŭ al la fronto, sed alveninte tien ili dependis de tre nestabila transport-sistemo.
En ĉi tiu milito, helpi la francojn signifus ataki Orientan Prusion. Tamen, Rusio ne deziris tiun teritorion kaj ankaŭ ne havis malamikecon al Germanio sed al Aŭstrio-Hungario. La rusaj strategoj decidis dediĉi kvar armeojn al la suda fronto kaj du al la fronto de Orienta Prusio. Neniu el ambaŭ fortoj estis sufiĉe potenca por atingi la strategiajn celojn. La milito en tiu orienta fronto estis rasa kontraŭfrontiĝo, slavoj kontraŭ germanoj. Tie estis uzitaj unuafoje multaj el la hororoj de la milito de la 20-a jarcento: la venenaj gasoj, la amasaj forigoj de civiluloj, atakoj kontraŭ la judoj…

Komence de aŭgusto, la germana fronto en Orienta Prusio estis defendata de unu divizio de kavalerio kaj dek-unu de infanterio, kiuj kune konstituis la Okan Armeon de 135.000 homoj subgvide de Maximilian von Prittwitz. Antaŭ ili estis avancanta grupo da rusaj armeoj de 650.000 homoj subordone de la general Yakob Zhilinsky kaj konstituitaj de du armeoj komandataj de Rennenkampf kaj Samsonov. Multaj germanaj civiluloj fuĝis el siaj loĝlokoj pro la rusa invado de tiu prusia teritorio. La germana registaro troviĝis antaŭ dilemo: ĉu daŭre koncentri siajn fortojn por venki Francion aŭ devus endanĝerigi la Schlieffen-planon sendante trupojn el la ŭesta fronto por haltigi la rusan avancon? La 19an de aŭgusto Prittwitz komunikis al Berlino ke li ne kapablus rezisti la atakon de la rusaj armeoj avancantaj kontraŭ la prusia fronto. La du rusaj armeoj avancadis tre rapide portante nur la neprajn provizaĵojn kio signifis ke al ili tre mankos ĉio necesa post ilia alveno al sia destin-loko.
La Unua Armeo penetris en Orientan Prusion la 17an de aŭgusto, kaj post du tagoj faris la samon la Dua. Ĉiu el ili estis pli granda ol la germana Oka Armeo. La unua batalo okazis en Gumbinnen la 20an de aŭgusto kaj rezultis favora por la rusoj. La fronta alsalto de la generalo August von Mackensen kontraŭ la rusaj trupoj estis facile repuŝita kaj la germanoj perdis 14.000 homojn. La sesdeksep-jara generalo Paul von Hindenburg, kiu estis kalkulinta travivi la militon en plaĉa emeritiĝo, estis tuj sendita al la orienta fronto. Li alvenis al tiu fronto samtempe kiel la generalo Erich Ludenderoff, la heroo de Lieĝo, kiu fariĝis estro de lia stabo. Ambaŭ konstituis kapablan kaj efikan militistan asocion kiu atingis grandajn venkojn por Germanio.
Hindenburg kaj ties stabo konsciis ke la rusoj estis pli superaj laŭnombre: 485.000 rusoj kontraŭ 173.000 germanoj, do ĉi lastaj devus agadi ruze kaj aŭdace. Laŭ la plano ellaborita de tiu stabo, iu eta kavaleria forto restis antaŭ la avanco de Rennenkampf dum plejparto el la Oka Armeo adresiĝis suden por kontraŭfronti Samsonov-on. Estis granda risko, tamen la rusa Dua Armeo troviĝis en bedaŭrinda stato, disetendita en 100-kilometra fronto marŝadis blinde, sen la necesa esplorado. Sin movanta tiel malrapide, Rennenkampf ne povus aliri helpe de Samsonov. La rusoj estis malobeante unu el la fundamentaj reguloj de la militista doktrino: neniam dividi la fortojn antaŭ pli febla malamiko ĉar ĉi tiu povus koncentri siajn fortojn por venki unu post alian la separitajn partojn. La germanoj profitis tiun eraron altirante la rusajn fortojn norden. Ili lasis antaŭ la rusa avanco fronton formantan renversitan «U», kun malforta centro, kiu kuraĝigis la rusojn plu iradi norden, kaj du fortaj flankoj kiuj sin ĵetis poste kontraŭ la rusa armeo fermante tiele la ariergardon de Samsonov inter la lagoj kaj la densaj arbaroj de Orienta Prusio. Fine la rusoj restis tute sieĝitaj proksime al Grünfliess; la 30an de aŭgusto, la ruino de la rusa armeo estis totala. Tutaj du korpusoj, preskaŭ cent mil soldatoj, estis kaptitaj, kromaj 50.000 mortis aŭ restis vunditaj kaj oni perdis 500 kanonoj. Generalo Samsonov mortpafis al si. La germanoj perdis 15.000 homojn. Al tiu batalo la germanoj donis la nomon "Tannenberg" memore al iu mezepoka batalo en la sama loko. Por la germanoj, Hindenburg fariĝis la ĉefa heroo de ĉi tiu milito kaj lia famo daŭris dum la cetero de sia vivo.
Post la Tannenber-batalo, Hindenburg marŝis kontraŭ Rennenkampf plifortigita per la du korpusoj senditaj ekde la francia fronto. Li intencis apliki similan manovron sed la sukceso ne tiom estis granda. Ambaŭ armeoj kontraŭbatalis proksime al la lagoj Masurianoj la 7an de septembro. Post tri tagoj ŝajnis neevitebla alia katastrofo por la rusa armeo. Tamen Rennenkampf sukcesis kontraŭataki kaj poste gvidis rapidan retroiron trans la Nieven-riveron. La germanoj persekutis la rusojn, sed kvankam ĉi tiuj sciis prepari relative solidan defensivon, la trupoj de Hindenburg atingis plian gravan venkon kaptante 30.000 rusajn soldatojn kaj okazigante al la rusa armeo perdon de 70.000 homoj. Germanio estis savinta sin kaj ĉi ties orienta landlimo restis provizore sekura.
Sude de ĉi tiu fronto, la fortoj de Aŭstrio-Hungario troviĝis en malpli feliĉa situacio. La serboj, harditaj per la antaŭaj balkanaj militoj, sukcesis repuŝi la aŭstrian armeon al ĉi ties propra teritorio, sed poste la trupoj de la Imperio reagis kaj preskaŭ atingis la konkeron de Belgrado. Jarfine, spite al la dura batalado, la atingoj estis elrevigaj konsiderante la esperon de la aŭstri-hungaroj. Ili estis perdintaj 200.000 homojn kaj grand-kvanton da milita materialo, kiun la serboj sciis profiti.
En la norda flanko de tiu aŭstria fronto la situacio ne estis pli bona. La 3an de aŭgusto Moltke komunikis al Franz Konrad, estro de la plejsupera aŭstria stabo, ke ne eblis apogi per germanaj trupoj la aŭstrian ofensivon kontraŭ la pola elstara angulo. Konrad decidis entrepreni la ofensivon kontraŭ la kvar rusaj armeoj de tiu fronto en Galicio komanditaj de Nikolao Ivanov. Eĉ translokiginte trupojn el la serba fronto, Konrad ne atingis laŭnombran superon, kaj krome li ne disponis je sufiĉa artileria apogo. La situacio estus povinta rezulti katastrofa por la aŭstria armeo se, siavice, la stato de la rusaj armeoj ne estus simile bedaŭrinda. La mankoj de tiu armearo rilate al komunikado kaj esplorado estis similaj al de la prusia fronto; dank' al tio Konrad povis venki la rusojn en la Krasnik-batalo kaj avanci al Lublin. En la unua semajno de septembro, la rusaj fortoj plintensigis sian premon. Kun du armeoj alproksimiĝantaj de-easte, kromaj du de-norde kaj komanditaj de Aleksei Brusilov, iu el la plej kapablaj rusaj generaloj, Konrad estis devigita retroiri. Komence de oktobro, la aŭstro-hungaraj fortoj estis retiriĝintaj ĝis la Dunajec-rivero post la perdo de 400.000 homoj dum nur ses-semajna batalado. La ṣoldatoj supervivintaj la batalon devis alfronti krome ĥolero-epidemion. La rusoj evidentiĝis nekapablaj profiti sian sukceson kaj dediĉiĝis al la sieĝado de la fortreso de Przemśyl, defendita de 100.000 aŭstroj. La sieĝo daŭrus ekde la tria semajno de septembro-1914 ĝis la 22-a de marto de la sekvinta jaro, kaj post ties konkero far la rusoj, ĝi estis baldaŭ rekonkerita poste.
La enorma kosto de la milito kaj la manko je sukceso efikis malfavore sur la aŭstri-hungara armeo. La slavaj soldatoj de la Imperio emis ŝanĝi partion. Alie, dum la unuaj monatoj de la milito tre kreskis la rankoro kaj la malfido de la aŭstro-hungaroj al la germanoj. La dependeco de la Habsburgoj vekis la germanan malestimon al ilia ne-kompetenta aliancano. Germanio komencis pensi ke ĝi troviĝis «man-katenita al kadavro», dum Aŭstrio-Hungario komencis konsideri Germanion «sian sekretan malamikon».

Pluaj frontoj ene kaj for de Eŭropo



Komence de 1915, post pli ol kvin monatoj da militado, la situacio iome estis stagnita. Tiam jam neniu pensis, kiel en aŭgusto, ke la milito estus mallonga. Sed alia mito estis naskiĝanta: ke tiu milito metus finon al ĉiuj militoj. Post kelkaj jardekoj oni konstatus ke ankaŭ ĉi tio ne estis vero, sed tio temas pri alia historio…

En la bataloj de la antaŭaj monatoj, Germanio ne sukcesis venki per la Plano de Schlieffen, sed ĝi konservis la strategian iniciativon tiel en la easto kiel en la ŭesto. Pro la venko de la rusoj kontraŭ la aŭstroj en septembro, Falkenhayn timis ke Aŭstrio-Hungario estus tro malforta por batali sola kontraŭ Rusio. Tial li translokis fortojn el la franca fronto: post atako kun venenaj gasoj sur Ipro, la 22an de aprilo, li retiris el tiu fronto 11 diviziojn. Tiam la uzado de tia gaso estis ankoraŭ en la eksperimenta fazo. La Aliancanoj improvizis maskojn kaj la atakoj per gasoj fariĝis karakteraĵo de la milito. En la orienta fronto Falkenhayn planis ofensivon kontraŭ la pola Rusio. La generalo August von Mackensen gvidis la aŭstrian ofensivon en la ŭesto, en Galicio, kaj Hindenburg atakis en la nordo, al Kovno.

La 2an de majo la germanoj entreprenis ofensivon en la easto de Krakovo. Post intensa bombardado la germanaj soldatoj ricevis ordonon ataki kaj daŭre avanci cele rompi la rusajn liniojn. En ĉi tiuj, unu el ĉiu tria soldato ne estis konvene armita kaj la tranĉeoj ne estis sufiĉe profundaj. La falo de la Deka Korpuso kaŭzis kolapson de la rusa fronto. La retreto, en ordo en iuj lokoj, estiĝis senorda diskuro en aliaj. La aŭstroj rekuperis la fortreson de Przemśyl la 3an de junio kaj Lemberg-n la 22an. Tiam Falkenhayn ordonis ke Mackensen adresiĝu norden. Varsovio falis la 4an de aŭgusto kaj, poste, okazis same al la fortikigita urbo Brest-Litovsk. En la nordo, Hindenburg kaptis Kovnon. La germanoj komencis ĝeneralan ofensivon kun ok armeoj laŭlonge de pli ol mil cent kilometroj de la orienta fronto.

Fine de tiu kampanjo la rusaj linioj estis retiriĝintaj preskaŭ okcent kilometrojn easten favore al la germanoj. Ĉi tiuj okupis grandan parton el la pola Rusio kaj estis atinginte milionon da kaptitoj kaj okaziginte plian milionon da perdoj al la rusoj. Por la germanoj ĉi tiu estis la plej sukcesa kampanjo de la milito. La perdo je prestiĝo estis ruiniga por la caro. Ĉefe post ĉesigi la grandan dukon Nikolaon kaj anstataŭi lin kiel cef-komandanto. Temis pri tasko kiu tre preterpasis lian kapablon, ĉar la caro sciis nenion pri militaj aferoj. Krome la eraro estis enorma ĉar de tiam la malvenkoj kiuj okazus restus ligita al la monarko endanĝerigante la supervivadon de la reĝimo.

Grava ŝanco por la Aliancianoj en 1915 estis la eniro de Italio en la militon iliafavore, kvankam tiu lando estis ligita al la centraj potencoj per iu traktato. Tamen la primilita situacio de la italoj estis vere fuŝa. El ĉiu milo da italoj, 330 estis analfabetoj (220 en Aŭstrio-Hungario, 68 en Francio kaj nur unu en Germanio). Krome ili havis nekapablajn generalojn kaj la cetero el la armea personaro ne estis multe pli bona. Italio celis atingi per la milito teritoriajn gajnojn koste de Aŭstrio-Hungario. La itala ĉef-komandanto, Luigi Cardona, kun la apogo de kelkaj politikistoj, opiniis ke la milito estus konvena okazo por “rekuperi” teritoriojn kiujn ili konsideris italaj.

Kvankam Italio deklaris la militon al Aŭstrio-Hungario la 24an de majo de 1915 la militado kontraŭ Germanio ne komencis ĝis la mezo de 1916. Laŭteorie, la itala armeo troviĝis en pli favora situacio. Ĝi povus koncentrigi konsiderindan forton de 900.000 homoj kontraŭ unusola malamiko: Aŭstrio-Hungario, dum ĉi tiu devis batali samtempe kontraŭ Serbio kaj Rusujo. Sed, eble neniam iu ajn lando eniris en militon tiel malbone preparita kiel Italio en la Unuan Mond-Militon. La oficiroj, plejparte el la nordo de la lando, brutale traktadis la soldatojn kiuj estis plejparte el la sudo. Male ol tio okazanta en aliaj frontoj, ĉiuj etniaj grupoj de la Aŭstro-Hungria Imperio unuiĝis por batali kontraŭ la italoj. La komandanto de tiu fronto estis la generalo Svetozar Boroevic, iu kroato tre kapabla. Komence de la kampanjo, Cardona kun siaj 35 diviziojn tre superis la aŭstrianojn, tamen ĉi tiuj ĝuis la avantaĝon okupi la plej altajn zonojn de la tereno kaj disponis je pli supera artilerio. Cardona havis nenian militan sperton, kaj li estis difinita kiel aroganta kaj paranoja. Li organizis ofensivon apud la rivero Isonzo. Ekde 1915 al 1917 la milito inter italoj kaj aŭstro-hungaroj konsistis el serio da sangaj bataloj laŭlonge de la rivero. En la unua el tiuj bataloj, en junio de 1915, la itala ofensivo konkeris iom da teritorio sed perdis 15.000 homojn kaj ne sukcesis rompi la aŭstriajn liniojn. Tiujare estis kromaj tri italaj ofensivoj kiuj kostis al tiu lando 230.000 perdojn. La tria Isonzo-batalo daŭris ĝis novembro kaj el ĝi rezultis nenia utilo por Italio. La kvara batalo daŭris de la 10-a de novembro ĝis 2-a de decembro. Fine la neĝo kovris tiun zonon kaj la operacioj estis suspenditaj ĝis la printempo de 1915. En ĉi tiu jaro estis pluaj kvar bataloj en ĉi tiu fronto sen iu klara venkinto. En 1916 kaj 1917 okazis pluaj kvin bataloj; en la lasta, la dekunua, la italoj atingis sufiĉe da sukceso por ke la aŭstroj petu helpon al la germanoj.

Alia eŭropa lando kiu eniris en la militon en 1915 estis Bulgario, post prikonsideri dum iom da tempo al kiu bloko ĝi aliĝus. Fine sin decidis favore al la centraj imperioj, kiuj ofertis al ĝi pli konvenajn kondiĉojn. La germanoj pensis ke la kapitulaco de Serbio devigus Rusujon peti la pacon. La aŭstraj kaj germa-

naj fortoj transiris la Danubon inter la 7-a kaj 9-a de oktobro, momento en kiu okazis ankaŭ la falo de Belgrado. La 25an de novembro la serba armeo estis ĉirkaŭita en Kosovo. Fine de 1915, atakataj de la lokaj triboj, de la aviadiloj de la malamikoj kaj de tifo-epidemio, 140.000 serboj alvenis al la marbordo kaj estis poste evakuitaj pere de ŝipoj de la Aliancanoj al Korfuo-insulo. El la 420.000 homoj de tiu armeo, 94.000 estis mortintaj aŭ vunditaj kaj aliaj 170.000 estis kaptitaj aŭ malaperintaj. Mortis ankaŭ multaj civiluloj; la serboj estis, inter ĉiuj militantoj, tiuj kiuj, proporcie, plej suferis dum ĉi tiu Granda Milito.

Ĉi tiu milito, kiel vidite, komenciĝis per incidento en Balkanio kiu baldaŭ kontraŭfrontigis la interesojn de de la eŭropaj potencoj. Poste aldoniĝis aliaj landoj kiuj emis atingi profiton el ĝi. Sed fariĝis monda milito pro la fakto ke la batalantaj potencoj estis ankaŭ koloniaj imperioj kun teritorioj en Azio kaj Afriko. Germanio havis malmultajn koloniojn kaj krome ĝi ne povis defendi ilin ĉar ne disponis je potenca mar-armeo. Male, Britio kaj Francio povis fari rekrutadon en siaj kolonioj ne nur por konkeri la germanjan sed krome por batali en la eŭropaj frontoj. Aliaj landoj, kiel Japanio, Aŭstralio kaj Nov-Zelando intervenis en la milito favore al la Aliancanoj cele partopreni en la dispartiĝo de la germanaj posedaĵoj. Japanio atakis la germanajn koloniojn en Azio kaj estis konkerintaj ilin jam antaŭ la finiĝo de 1914. En Kiaochow (Ĉinio) tri mil germanoj batalis kontraŭ kvindek mil malamikoj kaj devis kapitulaci la 5an de novembro. Germanio ankaŭ ne povis eviti ke iu nov-zelanda forto kaptu Samoon kaj ke iu aŭstralia bataliono konkeru Nov-Gvineon.



Fronto de la Kalipolo-batalo

Alia lando implikita en la konflikto, estis Turkujo. Ekde la revolucio de la «Junaj Turkoj» kiuj renversis la sultanon Abdulon, komenciĝis naciisma regeneriĝo subgvide de Enver Bey kiu celis revivigi la otomanan imperion. La grandaj potencoj atentis pri tiu procezo kaj Germanio decidis apogi ĝin kaj en 1913 sendis mision konstituitan de 70 militistoj por modernigi la turkan armeon. Ambaŭ landoj subskribis la 2an de aŭgusto de 1914 traktaton de reciproka helpo se Rusio atakus iun el ili. Intencante dekonvinki la turkojn, la Aliancanoj uzadis minacojn kaj negocadon dum zorgeme observadis la pligrandiĝon de la germana militista influo en Istanbulo. La 1-an de oktobro Turkio fermis la Dardanelojn al la internacia navigado, blokante la ĉefan permaran kunligon inter Rusio kaj la Aliancanoj. La germanoj akcelis la turkan decidon. La 28an de oktobro du germanaj ŝipoj, je la dispono de la turkoj, eniris en la Nigran Maron kaj bombardis la rusajn urbojn Odeso, Sebastopolo kaj Feodosio. La 5an de novembro Turkio eniris en militon kontraŭ Britio, Francio kaj Rusio.

En Eŭropo, la maniero militi alprenis ian kuriozan karakteraĵon nekonatan en antaŭaj militoj: Al la ceteraj armiloj, kaj ĝuste pro la kreskanta efiko de ĉi tiuj, aldoniĝis la pioĉoj kaj la ŝoveliloj. Iu enorma kaj komplika labirinto de tranĉeoj etendiĝis ekde la Manika Kanalo ĝis la svisia landlimo. Dume, celante enkonduki esencan ŝanĝon en la blokita situacio de la milito, la angloj elpensis planon por damaĝi la strategion de Germanio rilate al ĉi-ties otomanan aliancanon. La elektita loko estis la turka duoninsulo Kalipolo, tre malkonata ĝis tiam en Eŭropo sed kiu fariĝis tre fama pro la granda katastrofo kiun tiu batalo signifis por la Aliancanoj.

La konkero de la Kalipolo-duoninsulo estis interesa por la brita Alta Komando ĉar ĝi estas konvena loko por kontroli la Dardanelo-markolon inter Eŭropo kaj Azio. Oni planis operacion, subkomande de la generalo Ian Standish Monteith Hamilton, por kontroli tiun markolon cele malfermi navigadon al Rusujo kaj helpi ĉi tiun landon por devigi la germanojn retiri trupojn el la okcidenta fronto. Krom bloki la Dardanelo-markolon, Turkujo okazigis aliajn damaĝojn al la Aliancanoj. Minacante la britajn interesojn en la persa golfo kaj en la Suezo-kanalo ĝi devigis la anglojn teni garnizonoj en Mezopotamio kaj Egiptujo. Krome, atakante Rusujon en Kaŭkazio altiris ĉi tien trupojn kiujn oni povus deploji en Eŭropo. La improvizita turka kampanjo en Kaŭkazio, per trupoj malbone provizitaj por la vintro, finiĝis per terura malvenko. En la batalo de Sarikamish la turkoj suferis 81 procenton da perdoj; ĝenerale 10 procento da perdoj estas konsiderata kiel milita katastrofo. Tiu fiasko provokis la amasan murdadon de armenoj, kiujn oni akuzis esti nelojalaj al Turkio. Inter aprilo de 1915 kaj decembro de 1917 preskaŭ sepcent mil armenoj estis masakritaj en tio kion oni konsideras la unuan rasmortigon de la 20-a jarcento.

La Dardanelo-kampanjo de la Aliancanoj estis tiel fuŝe organizita kiel la turka de Kaŭkazio. La brita Ministrejo pri Milito adoptis ofensivo-planon elpensitan de la Unua Lordo de la Admiralitato, Winston Churchill. Ĉi tiu ordonis bombardi la fortresojn de la Dardaneloj, kaj tio atentigis la turkojn pri la britaj intencoj, detruante la surprizan faktoron. Post la bombardado, 18 britaj kaj francaj kiras-ŝipoj eniris en la Dardanelojn la 18an de marto 1915. Tri el tiuj ŝipoj estis detruitaj kaj pliaj tri restis serioze damaĝitaj pro turkaj minoj ne detektitaj. La komandanto de la floto, admiralo Robeck, forlasis la operacion, kaj Churchill estis devigita retiriĝi el la Admiralitato.

Oni improvizis tiam planon por elŝipigi trupojn en la Kalipolo-duoninsulo, norde de la mar-kolo. Hamilton alvenis al Aleksandrio la 24an de marto, kaj la operacio estis preta la 25-a de aprilo. Por ĝin realigi li disponis je kvin divizioj, iomete pli ol 75.000

homoj, 30.000 el ili estis aŭstralianoj kaj nov-zelandanoj retiritaj el la franca fronto. La turkoj, kiuj jam estis bone preparitaj tiam, havis en tiu fronto armeon je 60.000 homojn sed kun la ebleco rapide pligrandigi ĝin se necese. Krome ili estis okupantaj la holmojn kiuj kontrolas la plaĝojn kaj eblis al ili peregi kvar mil el la 30.000 homoj elŝipiĝintaj. Dum la sekvintaj monatoj, post intensa pen-batalado, la Aliancanoj estis atingintaj nur etan plaĝo-kapon. La turkaj kontraŭatakoj malebligis plian progresadon. En aŭgusto, post la alveno de helpo-trupoj, oni efektivigis novan elŝipiĝon en la golfeto Suvlo, iomete pli norde, sed ĉi tio signifis nenian progreson en la atingo de la celo de la operacio. La situacio tiel estis blokita kiel en la okcidenta fronto de Eŭropo. En ĉi tiu kampanjo la turkoj ĝuis la apogon de la germana generalo Liman von Sanders kaj iu kapabla turka komandanto, Mustafa Kemal Atartük, kiu tiam komencis famiĝi kaj poste ludis gravan rolon en la turka historio. En oktobro Hamilton estis anstataŭita de Charles Monro, kiu tuj rekomendis evakui la duoninsulon pro la grandaj perdoj okazantaj en tiu operacio. La Ministrejo pri Milito ne decidis la evakuon ĝis komence de decembro, kiam glacia vintro estis okaziginte pliajn centojn da viktimoj. Inter la 30-a de decembro kaj la 8-a de januaro, ĉiuj supervivantoj estis evakuitaj. En la senfrukta operacio de Kalipolo pereis 28.000 britoj, 10.000 francoj, 7.500 aŭstralianoj kaj 2.250 nov-zelandanoj. Dume la turkoj perdis 55.000 homojn el siaj plej bonaj trupoj, sed almenaŭ ili povis krii venkon. La sekvoj de ĉi tiu malvenko de la Aliancanoj, iel, estis ligataj al la rusa revolucio ĉar pro ilia malkapablo helpi Rusion, la malsato kaj la malkontento en la lando kondukus al la falo de la caro.


Lorenco de Arabio (centre) kun arabaj tribestroj

Post la fiasko de Kalipolo, la Aliancanoj serĉis alian manieron malfortigi la Centrajn Potencojn. De tiam ili klopodis impliki Grekujon en la konflikton. La greka ĉef-ministro, Eleutherios Venizelos, decidis negoci por eltiri profiton el la partopreno en la milito. Spite al la opono de la greka reĝo kaj multaj tiulandaj civitanoj, Venizelos konsentis la elŝipiĝon de anglaj trupoj en Saloniko. Temis pri operacio helpe de Serbio, en kiu patoprenis unu brita kaj tri francaj divizioj plus ia greka alporto. Sed la 5-a de oktobro de 1915, dum la deplojado de tiuj trupoj, Venizelos devis demisii ĉar la reĝo Konstatino, kiu simpatiis al la prusoj kaj kies edzino estis fratino de la kajzero, sin oponis al la greka partopreno en la milito kaj volis sin teni neŭtrala. Venizelos adresiĝis al Saloniko kaj tie konstituis disidentan grekan registaron kiu baldaŭ estis agnoskita de la Aliancanoj. Tamen, Saloniko ne estis pli ol alia duaranga fronto de la milito. Tie renaskiĝis la serba nacio kaj la ideo krei la Jugoslavian ŝtaton.
En junio de 1916, la Aliancanoj decidis ne plu respekti la grekan neŭtralecon kaj blokis la havenojn de tiu lando. Krome ili minacis ataki Atenon se la reĝo Konstantino daŭre agadus favore al la germanoj. Tiam oni devigis la monarkon abdiki kaj li ekziliĝis en Svision ĝis la fino de la milito. Venizelos revenis al Ateno kaj ordonis ĝeneralan mobilizon. Fine la fortoj en Saloniko, subkomande de Franchet D'Espery lanĉis atakon, kio igis ke Grekujo deklaru militon al la Centraj Potencoj la 23an de novembro. La bulgara rezistado baldaŭ disfalis.
Post la retiriĝoj de la Aliancanoj el Kalipolo, la turkoj translokis trupojn al sia araba provinco de Mezopotamio (nuna Irakio). En 1914 iu angl-hindia forto estis sendita al tiu zono por la defendo de la nafto-instalaĵoj en la persa golfo kaj bloki la turkan minacon kontraŭ la Suez-kanalo. Tiam la prinafta esplorado estis komenciĝanta en la araba duoninsulo, sed estis evidente ke ekzistis granda kvanto da ĝi en Persujo (Iranio). La angl-hindia forto elŝipiĝis en la kunfluejo de la riveroj Eŭfrato kaj Tigriso sen granda kontraŭ-rezisto. Ĉi tio kuraĝigis ĝian komandanton, Charles Townshend, avanci internen en la lando tra la Tigris-rivero kaj kapti la urbon Kut-al-Amara kaj, poste ankaŭ Bagdadon. Dum kvin monatojn, ekde novembro de 1915 ĝis aprilo de 1916, la turkaj fortoj subgvide de la germana generalo Kolman von der Goltz, sieĝis la fortojn de Townshend. Kun la Tigris-rivero liadorse, Townshend havis sub lia komando 11.600 britajn soldatojn, 3.300 el ili nebatalantajn, kaj 7.000 lokajn civitanojn, kun municio kaj nutraĵoj por sesdek tagoj. En aprilo de 1916 la sieĝitoj devis manĝi la ĉevalojn, kaj ankaŭ opio-lozanĝojn por redukti la malsaton. Fine de la monato ili kapitulacis antaŭ la turkoj, kiuj forportis ilin al koncentrejoj en Anatolio. Dum la marŝado pereis 2.500 hindiojn kaj 1.250 britoj. En la koncentrejoj, la supervivintoj estis mistraktitaj, batitaj aŭ murditaj. El la 13.000 britoj kaj hindioj kaptitaj, kvinmil pereis sekve de la misaj vivkondiĉoj. La brita komando ne rezignis la perdon de la kontrolo en tiu terzono kaj klopodis plibonigi la situacion de la trupoj kiuj ankoraŭ restis en Mezopotamio. En februaro de 1917 nova brita armeo, ĉi-foje konsistanta el 200.000 homoj, rekaptis la urbon Kut kaj sekvintmonate Bagdadon.
Por eviti ke la turkoj rekaptu Bagdadon la britoj preparis ekspedicion, subgvide de la generalo Edmund Allenby, por kontraŭbatali ilin en Palestino. La forto je kiu disponis Allenby en junio de 1917 konsistis el veteranaj unuoj de britoj kaj koloniaj trupoj kun

bona aviadila apogo. Krome, li ĝuis ankaŭ la apogon de la araba gerila movado organizita de la famkonata Thomas Edward Lawrence (konata kiel «Lorenco de Arabio») kaj Sharif Hussein de La Mekko, al kiu oni faris ambiguajn promesojn de sendependeco por la araboj. Allenby estis lerninta la lecionon de la milito en Francio kaj antaŭ la komenco de la operacio en Palestino li sin provizis je sufiĉe da akvo kaj kuracista servo. Eĉ tiele, ĉi tiu kampanjo estis tre peniga por tiuj britaj batalantoj, kiuj travivis ĝin kiel senfinan marŝadon kun soifo kaj laceco. La kondiĉoj estis eĉ pli malbonaj por la turka armeo en Palestino, kiu disponis je malpli da trupoj kaj ekipaĵo. Tiu avantaĝo permesis al la forto de Allenby lanĉi ofensivon norden kaj konkeri Jerusalemon en decembro.
Aliflanke, ekde la komenciĝo de la konflikto la Aliancanoj estis decidinte ataki la germanjan posedaĵojn en Afriko. En aŭgusto de 1914 la germanaj fortoj en Togo estis devigitaj kapitulaci antaŭ la afrika Okcidenta Forto de Landlimoj gvidita de britaj kaj francaj oficiroj. En Kameruno, mil germanoj kaj 300 afrikaj soldatoj rezistis pli decide, retiriĝante internen en la teritorio kiam la britoj kaptis la havenojn, la ĉefurbon kaj la radio-stacion. Post peniga kampanjo, la lasta germana garnizono kapitulacis en marto de 1916. En la germana orienta Afriko, la okazaĵoj disvolviĝis malsame. Tie la konflikto daŭris ekde la unua brita atako, la 8an de aŭgusto de 1915, ĝis la 23an de novembro de 1918, kiam jam oni estis subskribinte la armisticon en Eŭropo. Okazis tiele ĉar tiuj estis la plej valoraj kolonioj de Germanio kaj troviĝis sub la brila komando de la kolonelo Lettow-Vorbeck. Kun 2.500 lokaj soldatoj kaj 300 germanaj oficiroj, li venkis kelkajn britajn kaj hindiajn ekspediciojn, kaptis grand-kvanton da provizaĵoj kaj municiojn, kaj lideris fajnajn operaciojn de gerila batalado. Fine, Britio estis rekrutinte 30.000 afrikajn trupanojn por ĉi tiu kampanjo, el kiuj mortis grand-kvanto pro la tropikaj malsanoj. Apogante la eŭropanojn, multaj afrikanoj esperis plibonigi ilian situacion. Tamen, kiam la koloniaj potencoj starigis la devigan rekrutiĝon alvokante la afrikanojn por batali en la eŭropaj frontoj, okazis ia rezistado kaj aperis malkontento. Ja, la merkato de sklavoj ne estis tro malproksima en la tempo kaj en la kolektiva memoro de la afrikaj popoloj. La milito okazigis la ruinon de kelkaj afrikaj regionoj kaj semis en la tiean loĝantaron la emon je mem-decido.

La rusa caro Nikolao la 2-a



Nikolao la 2-a, Nikolái Aleksándrovich Románov; (Sankt-Peterburgo, Rusio, 18-a de majo de 1868 –Ekaterimburgo, Rusio, 17 de julio de 1918), estis la lasta caro de Rusio. Li estis filo de la caro Aleksandro la 3-a kaj reĝis ekde la 20-a de oktobro de 1894, ĝis sia abdiko, kadre de la rusa revolucio, la 2-an de marto de 1917. La kronado de Nikolao la 2-a okazis en Moskvo la 26-an de majo 1896. Ĉi-tago restis en kronikoj ne nur pro la evento, sed ankaŭ pro la multaj viktimoj pereintaj en Ĥodinka kampo, kie oni proponis kaj disdonis donacojn nome de la caro. La vizitintoj amasiĝis kaj neatendite rompis barierojn, okazis paniko kaj tumulto, oni tretis ĉiujn falintojn. Tiam pereis proksimume 1500 personoj.
Li edziĝis al Victoria Alix von Hessen und bei Rhein. La reĝa geparo havis kvar filinojn kaj unu filon. Dum la reĝado de Nikolao la Rusa Imperio traspertis ekonomian kaj militistan katastrofon. Rusio malsukcesis dum la rusa-japana milito okazinta en 1904-1905. Poste okazis la revolucio en 1905-1907. Rimarkinda estis la popola manifestacio okazinta la 9an de januaro 1905 en Sankt-Peterburgo, kiam amaso da popolanoj intencis komuniki siajn problemojn al la caro. Tamen proksime de Vintra palaco ilin renkontis armitaj militistoj, kiuj laŭ la ordono ekpafis la popolamason. Okazis granda masakro kun multaj viktimoj, kiu restis en la historio kiel «Sanga dimanĉo». La caro estis devigita proklami Manifeston la 17-an de oktobro 1905, en kiu li permesis aperon de politikaj partioj kaj establon de la Ŝtata Dumao, institucio simila al la eŭropaj parlamentoj, sed havanta nur rekomendajn rajtojn.
Kiel ŝtatestro li aprobis la intervenon de Rusujo en la Unua Mond-Milito. La katastrofaj sekvoj de la militaj kampanjoj pliakrigis la sociajn problemojn en la lando. En februaro de 1917 okazis nova revolucio kiu, ĉi-foje ne povis esti sufokita per politikaj disponoj kiu savu la reĝimon. La reĝado de Nikolao finiĝis kiam, intencante reveni el la milita fronto al la ĉefurbo, lia trajno estis haltigita kaj li sin vidis devigita abdiki. De tiam la caro kaj ties familio estis en prizonoj, kaj post la oktobra fazo de la revolucio kaj la venko de la bolŝevistoj, la reĝa familio estis mortigita. La bolŝevistoj faris poste ĉion eblan por ĉesigi la rusan intervenon en la Mond-milito, kaj atingis tion nur dank al la cedo al la grandaj postuloj de la germanoj, kiuj, tamen, estis nuligitaj post la malvenko de la Centraj Imperioj en tiu milito.
De milita vidpunkto, la Rusio de 1914 estis malpli potenca ol supozite. Ĝia transport-sistemo estis tre febla. La Nigra kaj Balta maroj estis blokitaj de turkoj kaj germanoj, respektive. La fervoj-linia reto, kvankam tre ampleksigita ekde 1905, estis malpli granda ol tiuj de la aliaj eŭropaj potencoj. La lando ne estis preparita por longdaŭra konflikto. La arsenaloj de 1914 disponis nur je 40 pezaj kanonoj kun 1.000 raketoj por ĉiu kanono. Oni produktadis nur 290 milionojn da kugloj ĉiujare dum oni konsumus 200 milionojn ĉiumonate. Fine de la jaro 1914 la rusaj soldatoj havis malabundon je kugloj kaj raketoj. En 1915 la rusa industrio produktadis nur 25 procenton el la necesaj provizaĵoj por la milito. Tiam estis 6,5 milionoj da soldatoj kaj nur 4,6 milionoj da pafiloj. Aliflanke, en la Imperio estis multaj nacioj kiuj deziris ne esti regataj de Rusio.

La milito de la soldatoj en Eŭropo



La batalo de Neuve Chapelle, okazinta komence de la printempo de 1915 far la Unua Armeo, komandata de Douglas Haig, kaj la Kvina Armeo, komandata de Henry Rawlison, kontraŭ la germanoj, evidentigis la malfacilecon konkeri teritorion en la okcidenta fronto pere de ofensivo. Multaspekte, ĉi tiu estis ofensivo enkondukanta novaĵojn: aera traserĉo de la germanaj tranĉeoj, artileria kunordigo por alĝustigi la kanonadon al la planita avanc-linio… La 10an de marto, post intensa artileria atako daŭrinta 35 minutojn kontraŭ la germanaj tranĉeoj, la brita kaj hindia infanterioj atakis laŭlonge de kelkkilometra fronto. Oni sukcesis provizore kapti la detruitan urbon Neuve-Chapelle-n kaj kvar germanajn liniojn en la centro de la fronto. Tamen, en la norda sektoro de la fronto ĉiuj atankantaj fortoj, preskaŭ milo da homoj, estis ekstermitaj intencante trairi la antaŭfrontan terenon aŭ tranĉi la pik-dratajn barierojn. Haig, komforte instalita en sia stabejo distance 60 kilometroj de la fronto, insistis ke la batalo devos daŭri «spit’ al la perdoj». La 13an de marto, post germana kontraŭatako, ĉi tiuj estis konkerintaj unu-kilometran spacon koste de 13.000 perdoj. Por la britoj, la batalo komence difinita kiel «brila venko», iĝis poste «sanga fiasko». La ofensivo pruvis ion kion poste estus kutima en la okcidenta fronto: per zorge preparita ofensivo oni povus atingi iajn avancojn, sed estis ankaŭ averto pri kiel rapidmaniere la sukceso povas degeneri en fiaskon. Iu oficiro de Haig konkludis ke «Anglujo devos alkutimiĝi al pli grandaj perdoj ol tiuj de Neuve Chapelle antaŭ ol ĝi sukcesus venki la germanan armeon». Li estis prava, ĉar la sekvintaj bataloj estis eĉ pli sangaj kaj mortigaj. Sed kiel diris la generalo Allenby kiam, unu jaron poste, oni avertis lin ke estos pliaj perdoj se li atakus: «Kaj kion diable gravas tio? Estas multe pli da homoj en Anglujo!».

Kiam komenciĝis la milito, subite la soldat-servo fariĝis tre populara. La homoj alkuris al la kazernoj motivitaj de romantikismo kaj ia ebriiga sento ke ili estis necesaj al sia lando; tre malmultaj dezertis en aŭgusto de 1914. En Britio, kie la milit-servo daŭre estis laŭvola, oni prezentis pli da rekrutoj ol necese tiumomente en la lando. La inter-klasaj distingoj estis esencaj por la funkciado de la armeo. La militista vivo estis nur kroma formo je interrilato mastro-laboristo, io speciale videbla dum la milito kie la brutala vivo de la tranĉeoj tre kongruis kun la malhumana mizero en la fabrikoj kaj en la laborist-kvartaloj. Por multaj mezklasaj oficiroj, la soldatoj apartenis al malsupera raso, ili estis nuraj duonhomoj. En la tranĉeoj, la oficiroj manĝadis aparte el sia soldatoj kaj ricevadis pli bonan mangaĵon kun libera alireco al alkoholaj trinkaĵoj kaj cigaredoj. Pli supre en la rang-skalo, la komandantoj kultivis ian misteron kaj pompon, ĉar se la soldatoj estis duonhomaj, ili sin taksis duondiaj. La videblaj signoj plifortigadis la aŭtoritaton kaj ju pli distancaj ili ŝajnis, des pli respektataj ili estis. Estis kondutoj de iuj armeestroj kiuj ne liveras bonan bildon pri ili: la ĉiutagaj duhoraj tagmanĝoj de Foch, la dek-hora dormado de Hindenburg, la ĉiutaga sporta rajdado de Haig tra padoj preparitaj kun sablo se okaze li falus, aŭ la abundo de ĉampano kaj kaviaro en la manĝoj de la rusaj oficiroj.

La statoj jam estis kapablaj mobilizi enormajn armeojn kaj, tamen, al la generaloj mankis la kapablo kontroli kaj gvidi tiajn enormajn formaciojn. Tiel la telefono kiel la radio, du novecaj komunikiloj, estis ne multe fidindaj kaj ne ebligis efektivan


















kontrolon de la trupoj de la fronto dum plenbatalo laŭ povis konstati Moltke komandante la germanajn trupojn dum la batalo de la Marne-rivero. La generaloj devis sin teni malproksime de la artilerio, kunordigante la movojn de la trupoj. Malmultaj generaloj povis konfidi konservi siajn postenojn dumlonge se ili persistus apogi defensivan militon. La civitanoj esperadis de siaj oficiroj ke ili trovu solvon al la paraliziĝo de la frontoj kaj liberigu la okupitajn regionojn.

La britaj soldatoj portadis pezan dorso-sakon kaj ekipaĵon variantan laŭsezone kaj dependante ĉu ili marŝadis aŭ ne. Generale, ili devis surporti trionon el ilia pezo, proksimume tridek kvin kilogramojn. Poste oni pliigis tiun pezon per aldono de ŝtala kasko kaj gaso-masko. La plej rimarkinda karakteraĵo de la germanaj soldatoj estis ilia ***pickelhaube*** aŭ kasko kun iu ornama pikilo. En la jaro 1916 tiu kapŝirmilo estis modifita al iu ***Stahlhelm*** por protekti la malantaŭon de la kolo. Ili portadis la fusilon «Mauser 98», fidinda armilo kiu utilis al la germanaj trupoj dum duon-jarcento. Plejmulte el la soldatoj estis ŝarĝobestoj, homoj alkutimigitaj al peza laboro, mizero kaj limigitaj ŝancoj. Tiutipaj homoj estis la modelo de la perfekta soldato de infanterio.

La milito estis enorma, ne nur pro la implikitaj trupoj, sed ankaŭ pro la komplikeco efektivigi la provizadon al grandaj armeoj. En unu fronto de nur 1.800 metroj, la 42-a brigado de Lankaŝiro uzadis kvin mil sakojn da betono, 20.000 da ŝtonoj kaj 10.000 da sablo por konstrui nur unu rezervo-tranĉeon. La materialo pezis 900 tunojn kaj devis esti transportita al la fronto tra malfacila tereno en kies lasta parto oni ne povis uzi motorajn transportilojn. Ju pli la defensivaj instalaĵoj fariĝis pli kompleksaj des pli fariĝis necesa la uzado de pli peza maŝinaro por atingi la celon rompi la malamikan fronton. Ekzemple, unu brita divizio bezonis 27 vagonojn por supervivi unu solan semajnon. Ĉirkaŭ 1916, tiu sama divizio bezonis 20 vagonojn da nutraĵoj kaj furaĝo kaj 27 vagonojn da milit-materialo. Post la malŝarĝado de la provizaĵoj, krome estus necese transporti ilin al la fronto portate de soldatoj. En la batalo de Verduno, unu sola germana divizio je infanterio konsistanta el 16.000 homojn kaj 7.000 ĉevaloj disponis je 17 kanonoj, al kiuj estis necesaj 36 trajnoj da municioj. Ĉiu trajno transportadis 2.000 pezajn obusojn kaj 26.880 pecojn da leĝera artilerio. La neceso de grand-kvanto da armilaro signifis ke la strategiaj planoj estis kondiĉitaj de la transportado. La disponebleco de trajnoj kiu tiel multe kondiĉis la komenciĝon de la milito influis ankaŭ sur ĝia karaktero. Efektivigi amasan atakon signifis konstrui vojojn, fervojajn liniojn, kampadejojn, hospitalojn kaj municiomagazenojn. Estis necese trovi akvo-fontojn kaj instalaĵoj por la akvo-purigado. Oni devis akumuli grand-kvanton da nutraĵoj kaj konstrui militajn kuirejojn. Oni devis kolekti milionojn da pecoj de artilerio el kelkaj tipoj proksime al la batal-kampo kaj poste transporti ilin al la diversaj baterioj. Kiam ĉi tuta procezo de ofensivo-preparado estis finita, estis jam tute ne eble surprizi la malamikon, sed la surprizo sen tia preparado ne eblis.

La Unua Mond-Milito elvokas kotajn tranĉeojn, senvenkajn batalojn kaj trivo-celan strategion. La tranĉeoj de la okcidenta fronto detruis la mitojn de la glora milito kiu estis inspirinta la junajn soldatojn de 1914. Ĉiuj militantaj armeoj disvolvis ian enorman kapablon por alveni al nenia rimarkinda rezulto. Por iu soldato, fosi tranĉeon estas normala defensiva procedo, sed restadi en unu tranĉeo dum pluraj jaroj estis iu karakteraĵo de ĉi tiu konflikto, kiu postulis konsiderindan adaptiĝon, tiel fizika kiel mensa. Komence, la tranĉeoj estis nuraj kotaj fosaĵoj en la tereno, sed laŭ la pasado de la tempo la tranĉeo-sistemo fariĝis pli kaj pli kompleksa. Fine ili estis veraj labirintoj en kiuj estis necesaj gvidistoj por ke la militistaj unuoj ne perdiĝu. Oni konstruis en la ariergardo komunik-tranĉeojn kaj etendis milojn da kilometroj je pik-drataj barieroj por protekti la tutan sistemon. Oni disponis ankaŭ je barakoj por dormado, kvan-

kam ĝenerale ĉi tiuj estis rezervitaj por la oficiroj, kaj la soldatoj devis kontentiĝi dormante ie ajn. Enkalkulante la tutan apog-sistemon, komunikaĵoj kaj tranĉeoj en la fronta unua linio, la francoj estis okupantaj 10.000 kilometrojn da tranĉeoj en la plej intensa epoko de la milito, la germanoj 19.000. Por konservi la sistemon en bona stato, oni transportadis ĉiusemajne 7.112 tunojn da pik-drato ekde Germanio. La situacio de senvenka ekvilibro generis la tranĉeo-sistemon kaj la tranĉeoj persistigis la situacion de ekvilibro.













Tial ke la aliancanoj estis plendeciditaj forpeli la germanojn el Francio, ili havis nenian intereson konstrui tro «komfortajn» tranĉeojn. Ili ankaŭ ne estis pretaj cedi terenon por atingi pli facile defendeblajn liniojn. Ekzemple, en 1917 la germanoj plenumis strategian retiriĝon al la t. n. «Hindenburg-linio» zorge planita por mallongigi la fronton kaj liberigi 10 diviziojn cele utiligi ilin en aliaj lokoj. Tute male, la aliancanoj defendadis ĉiun metron da tereno; cedi pecon de Francio estis bato al la moralo, teniĝo kiu signifis enorman foroferon da homaj vivoj por defendi en iuj okazoj areojn sen ia ajn strategia valoro.

La homoj kunloĝadis en la tranĉeoj kun la ratoj, la pedikoj kaj la postrestaĵoj de la mortintaj kamaradoj; la vivantoj estis enterigataj en la tranĉeoj kaj la mortintoj kuŝadis en la ekstera supraĵo. La varmigitajn manĝaĵojn oni transportadis al la fronto per konteneroj, kvankam kiam oni ne batalis oni kuiradis en la frontaj linioj mem. La komunikado inter la fronto kaj la ariergardo estis efektivigata pere de telefona drato, kiu meze de la konflikto-daŭro estis enterigata por ĝin protekti el la artilerio.

Ofte la soldatoj sentis ian solidaran martiro-senton kun la malamiko ĉar la fakto ke la batalantoj de ambaŭ armeoj suferadis similajn penojn, ili sin sentis fratoj apartenantaj al komuna homaro. Pri tio estis notinda ekzemplo en la okcidenta fronto dum la Kristnasko-nokto de 1914. En kelkaj fronto-sektoroj en Francio kaj nordo de Belgio, la soldatoj de la tranĉeoj komencis kanti, en siaj respektivaj lingvoj, tradiciajn kristnaskajn kanzonojn. Ekde ĉiu tranĉeo oni povis aŭdi la kantadon de la malamikoj. Matene de la Kristnasko-festo germanoj kaj britoj kaj, malplikvante, ankaŭ francoj kaj belgoj, iom-post-iom eliradis el la tranĉeoj kaj renkontiĝis en la nenies-tereno meze de ambaŭ malamikaj linioj kaj mampremis unuj la aliajn. Dum la tago, grupoj da soldatoj de la kontraŭfrontitaj armeoj futballudis, fotis kaj intencis venki la barieron de la lingvo dum organizis enterigon de la mortintaj kamaradoj. Iu brita soldato deklaris ke li neniam forgesos la vidon de du germanaj soldatoj mamprene salutante iujn hindiajn soldatojn. Iu ebla ekspliko de tiu stranga okazaĵo estas ke tiujare la papo estis proponinta kristnaskan milit-paŭzon kaj multaj germanaj soldatoj kiuj partoprenis en tiu okazaĵo devenis el Bavario, la plej katolika regiono de Germanio. Iomete poste, la soldatoj revenis en siajn tranĉeojn kaj la mortigado daŭris. Sed en iuj el la zonoj kie okazis tiu kristnaska interfratiĝo la trupoj devis esti retiritaj kaj anstataŭitaj de aliaj ĉar ili ne plu estis pretaj batali kiel antaŭe. La komandantoj donis ordonojn por ke tiutipa kunfratiĝo ne plu okazu dum la milito.

La teknologio modlis la militon kaj la milito modlis la teknologion. La nekredebla senvenka ekvilibro inspiris la disvolv-on de novaj armiloj pligrandigante la ating-kapablon de la kanonoj. Laŭgrade ke pliboniĝis la traf-lerto de la artilerio, oni povis sinkronigi la artileriajn barierojn kun la avancoj de la infanterio tra la t. n. «nenies-teritorio». La fusiloj estis nepre necesaj antaŭ la milito, sed en malmultaj modernaj konfliktoj ili tiel malmulte gravis. Estis tre malfacile vidi la malamikojn kaj, kiam ili aperis, ili estis jam tro proksimaj por ke oni povu efektive pafi kontraŭ ili. La grenadoj evidentiĝis pli efikaj. La germanoj pioniris ĝian desegnon kaj produktadon, sed estis la britoj tiuj kiuj sukcesis amase fabriki ilin. La mitralo estis la plej efika defensiva armilo kaj kontribuis al la forto-ekvilibro pro ĝia kapablo elimini tiom da atankantaj trupoj, sed kvankam pro








ĝia naturo kaj desegno ĝi ne estis tre taŭga por la atako poste ĝi pruvis sian utilon ankaŭ tiucele. La flam-ĵetilo estis uzita unuafoje de la germanoj. Komence, la ***Flammenwerfers*** estis primitivaj, ili uzis benzinon kaj estis malmulte fidindaj. La plej frapanta armo estis la gaso. Biologoj, fizikistoj kaj ĥemiistoj el la plej bonaj eŭropaj universitatoj entuziasme dediĉiĝis al la esploro de ĥemiaj armiloj cele rompi la forto-ekvilibron. La germanoj antaŭiĝis uzante gason komence de 1915, kvankam la sukceso estis relativa ĉar oni dependis de la direkto de la vento. La fundamenta principo de la gaso estis ke estante ĝi pli peza ol la aero, ĝi fiksiĝas en la plej malaltaj zonoj de la tereno devigante la malamikojn forlasi la tranĉeojn kaj tiele detrui ilin per la artilerio. Siatemepe la gaso estis ĵetita ene de misiloj kaj oni disvolvis pli damaĝajn tipojn kiel la fosgena gaso kaj la mustarda gaso. La efiko de ĉi lasta estis terura, ĉar la viktimoj mortis post dolorplena agonio. Kiam oni perfektigis la gaso-maskojn estis nuligita la povo de tiu armo. La germanoj estis kiuj plej uzis la gason, 68.000 tunojn da ĝi; la francoj uzis 36.000 tunojn kaj la britoj 25.000.

La soldatoj devis alfronti grand-kvanton da riskoj. Ili povis esti trafitaj de pafantoj, dispecigitaj de mitralo, sufokitaj en gaso, bombarditaj de avidiloj aŭ mutilitaj de haŭbizoj aŭ grenadoj. La kugloj kaj pafaĵoj de la kunuloj mortigis multajn soldatojn. La artilerio estis la plej letala kaj demoraliza formo de la milito. Tre malmultaj homoj mortis pro simpla kuglo en la koro, plejparto dissaltiĝis en la aeron aŭ estis dispremitaj de la ekspansia ondo de la eksplodoj. La bonsortuloj vaporiĝis ĉesante ekzisti subite, dum la malpli bonŝancaj agoniis kun deŝiritaj kruroj kaj brakoj. Pro la pliboniĝo de la artilerio, la bombardadoj iĝis pli pezaj kaj longdaŭraj. Post iu bombardado ne malofte oni povis vidi pecojn de korpoj pendantaj el arboj aŭ soldatojn kiuj mortis trafitaj de membroj deŝiritaj de iuj kunuloj. Tiuj kiuj ne mortis aŭ estis vunditaj devis suferadi la enorman traŭmon de la bombardado.

Iu rusa flegistino priskribis sian sperton kiam ŝi iris post unu grupo de rusaj soldatoj kiuj kaptis iun germanan tranĉeon. Ĝia priskribo estas vere ŝoka, danteska spektaklo: ***iu urbo de mortintoj, kun ĝiaj loĝantoj paralizitaj en la plej strangaj pozicioj kvazaŭ brutala huragano estus blovinta sur la zono. Iuj kuŝantis surdorse, aliaj surbruste. Ĉiuj estis interplektitaj kaj rezultis neeble scii kies estas la kruroj kaj la brakoj. Multaj sidantis en pozicioj kiuj igis ilin ŝajni vivantaj, aliaj estis apogitaj sur la parapeto aŭ sur la malantaŭa muro de la tranĉeo. Plej terure estis vidi tiujn kiujn ne estis falintaj, sed restis stare plutenante siajn fusilojn, kun malfermitaj okuloj kaj la trankvila rigardo de la morto, kvazaŭ ili estus aŭskultante la korvojn super ili ĉirkaŭflugantaj. Ekzistas iu limo pri tio kio homa estaĵo povas vidi, preter kio oni ne povas percepti pliajn teruraĵojn, iu saturita spongo ne povas sorbi pli da akvo.***

Multaj flegistinoj devis sin helpi per alkoholo kaj drogoj kiel la morfino por rezisti la sperton de la konflikto. La klimato estis la komuna malamiko de ĉiuj soldatoj. En la okcidenta fronto, la senĉesaj bombardadoj kaj la torenta pluvo konvertis la kampojn en fetorajn marĉojn. En la easto la malvarmo estis kruela. La soldatoj estis enterigitaj aŭ dronis en la neĝon. La trupoj mortantis pro malsato ĉar estis neeble alporti al ili nutraĵojn. En antaŭaj militoj mortis pro malsano po kvin soldatoj por ĉiu mortinto en la baltalkampo. Tamen inter 1914 kaj 1918, la averaĝo estis unu mortinto pro malsano por 15 en la batalkampo. Spit' al enorma penado, multaj homoj pereis pro vundoj trakteblaj. La malfacileco alveni ĝis la vunditoj kaj trakti ilin en la batalkampo aŭ en proksimaj hospitaloj okazigis ke eĉ malgravaj vundoj rezultis letalaj. Ĉi tio estis kaŭzo ke miloj da homoj suferis lantan kaj doloran morton. La soldatoj de ĉiuj militantaj landoj koincidis pri tio ke unu el la plej malbonaj spertoj estis aŭskulti la kriadon de siaj kamaradoj dum ili estis agoniantaj en la nenies-teritorio.



1916. Tera, mara kaj aera militado

Fine de decembro 1915 okazis en Chantilly (Francio) konferenco de la aliancanaj registaroj kaj ĉefaj militistestroj celante kunordigi samtempajn ofensivojn kontraŭ la centraj imperioj dum 1916 . Tamen oni ne sukcesis krei komunan komand-strukturon. Krome la germana ofensivo en la fronto de Verduno igis neeblan la aplikadon de la planoj de Chantilly ĉar la ofensivoj de la aliancanoj en la ceteraj frontoj ne sukcesis apartigi germanajn fortojn el Verduno eĉ preze de grandaj perdoj. Dum okazis la konferenco en Chantilly, la generalo Falkenhayn estis pristudante kun la kajzero la strategiajn problemojn de Germanio en 1916. En sia informo li konkludis ke Rusio povus cedi grand-ampleksajn teritoriojn sennecese kapitulaci. Britio estis la ĉefa kontraŭanto sed pro ties mararmea supereco ne eblus finvenki ĝin. Do, kion fari? Dum Germanio disponus je sufiĉnombraj fortoj ĝi devus decide ofensivi en Francio cele devigi ĉi tiun landon kapitulaci, ruinigante tiele la aliancon. Do, estus necese elekti konvenan lokon por la rompo de la okcidenta fronto. Fine oni decidis ke tiu loko estu la fortreso de Verduno kiu pro ĝia situo estis esenca komponaĵo de la franca defend-sistemo.
Falkenhayn kalkulis ke la kapto de tiu fortresa urbo estus dura frapo por la morala potenco de Francio kaj estigus politikan krizon en la tiulanda registaro. Ĉiukaze eĉ se la fronto ne rompiĝus en tiu zono, la planoj de Falkenhayn kontemplis la strategion uzi tiun ofensivon por provoki grandajn perdojn cele sensangigi Francion. La komando de la operacio estis asignita al la filo de la kajzero, la princo Vilhemo, kiu ne tute komprenis la ĝeneralan strategion de la plejalta stabestro kaj pensis ke la celo estis nepre konkeri Verdunon. La francaj aŭtoritatoj konsideris ke tiu urbo estis nekonkerebla kaj ne sufiĉe atentis pri la indicoj de proksima germana ofensivo en tiu parto de la fronto. Ili sciis nenion pri la novaj fervoj-linioj konstruitaj de la germanoj en tiu zono por provizi grandan armeon je 140.000 homoj kun 850 kanonoj. Entute 72 germanaj batalionoj kontraŭ 34 francaj. Krome la germanoj uzis en tiu ofensivo, unuafoje en la milito, flamĵetilojn, kaj aeran apogon sur la tuta fronto de la ofensivo.
La operacio, iu el la plej sangaj bataloj de la historio, komenciĝis la 21an de februaro. Unue la francaj pozicioj suferis intensan bombardadon. Tamen, pro la furioza rezisto de la francaj soldatoj, tiam la germanaj trupoj apenaŭ sukcesis iomete avanci. Nur la 25an de tiu monato falis la bastiono de Douamont. Tiam la franca stabo nomumis novan komandanton por Verduno, la marŝalon Henri Philippe Benoni Omer Pétain kiu tuj okupiĝis restarigi la moralan forton de la soldatoj kaj ordoni furiozajn kontraŭatakojn. Dum multaj tagoj sekvis la atakoj kaj kontraŭatakoj, foroferante ambaŭ armeoj milojn da homaj vivoj por kapti aŭ defendi malgravajn poziciojn. En tiu batalo ĉeestis du junaj oficiroj kiuj famiĝos en la Dua Mond-Milito, la germana Friedrich Paulus, kies destino estis kapitulaci antaŭ la Ruĝa Armeo en Ŝtalingrado, kaj la franca Charles de Gaulle, kiu estis vundita kaj milit-kaptita en Verduno.
La franca defendo de Verduno dependis de la provizado tra nur unu malgranda vojo kaj unulinia mallarĝa fervojo. Dum unu semajno en februaro, sub intensa germana bombardado, aliris per tiuj vojetoj al Verduno 25.000 tunoj da provizaĵoj kaj 190.000 soldatoj. Ambaŭ armeoj batalantaj en ĉi tiu fronto pafadis 24 milionojn da kugloj dum la unuaj kvar monatoj de la ofensivo. La germanoj atakis la fortreson de Vaux kaj post tenaca rezisto de la francoj konkeris ĝin. La defendo de Verduno fariĝis simbolo de la nacia epiko de Francio. Dum la ses unuaj monatoj de la Verdun-batalo la germanoj perdis 280.000 homojn kaj la situacio pli kaj pli malboniĝis. Kiam Falkenhayn konstatis ke la ofensivo rezultis vana, li intencis meti finon al ĝi, sed liaj superuloj insistis ke la atakoj plu daŭru. Tamen fiaskis alia germana provo rompi la fronton kaj la 1-an de julio la britoj faris ofensivon norde, apud la Somme-rivero. En oktobro iu franca kontraŭatako surprizis la germanojn kaj avancis 5 kilometrojn kaj kaptis 5.000 soldatojn. Entute la batalo daŭris dek monatojn kaj dum ĝi pereis 542.000 francoj kaj 434.000 germanoj. Verduno estis la plej longa batalo de la milito kaj ankaŭ la plej senutila. Falkenhayn estis elpostenigita kaj por anstataŭi lin estis nomumitaj Hindenburg kaj Ludendorff. Ankaŭ la francoj ŝanĝis sian stabestron: Joffre estis anstataŭita de Robert Nivelle, elekto kiu rezultis fatala.
La batalo de Verduno influis sur la easta fronto ĉar la aliancanoj de Rusio postulis ke la armeoj de tiu lando faru ofensivon por malpliigi la germanan premon sur Francio. La rusoj elektis areon proksime al Vilno kie ili havis armeon pli multenombran ol tiu de la germanoj. La rezultinta batalo de la lako Narocz okazigis perdon de 100.000 homoj kaj efikis nenion sur la germana premo en Verduno. Pli sukcesa estis la tiujara kampanjo de la rusa generalo Brusilov en la fronto de Aŭstrio-Hungario. Li komandis armeon de 660.000 homoj koncentriĝintaj en unu fronto de 300 kilometroj. Li kapablis kaŝi kaj kamufli la operacion kaj movojn de la preparado de ofensivo. La atako efektiviĝis la 4an de junio kaj la aŭstriaj trupoj estis surprizitaj kaj ilia fronto falis baldaŭ sub la povo de la rusa armeo komandita de Brusilov. Fine de la tago la rusoj estis malferminte

breĉon 30-kilometrojn larĝan kun profundeco de 8 kilometroj. Fine de la monato ili estis kaptinte 200.000 soldatojn de la aŭstria-hungaria armeo. Rezulte de tiu situacio, la aŭstria stabestro, Conrad, devis fari tion kion li malplej deziris: peti helpon al la germanoj. Lia akcepto far Falkenhayn tute ne estis afabla sed ĉi tiu komprenis ke la situacio estis grava kaj li devis transloki kvar diviziojn el Francio al la rusa fronto. Brusilov ne povis eltiri la tutan eblan profiton de lia venko. La alta stabo rusa ne apogis lin per la sendado de sufiĉe da rezervo-fortoj. Krome, la avanco de la rusaj fortoj, kiuj en iuj lokoj el la fronto preterpasis la antaŭplanitan limon, kreis problemojn de provizado. La rusa fervojsistemo ne kapablis plenumi la necesojn de la milit-fronto. Dume, subgvide de la germanoj, la aŭstria armeo sukcesis establi defend-liniojn sufiĉe solidaj. En oktobro la rusa ofensivo komencis malfortiĝi. Tiam oni es-





tis kaptinte 440.000 aŭstriajn soldatojn kaj pli ol 500 kanonojn. La perdoj de la aŭstria-hungario imperio estis tre grandaj: 750.000 homojn. Tiu-ĉi granda sukceso de la rusoj utilis por malpliigi la germanan premon sur la okcidenta fronto kaj ruinigis la prestiĝon de Conrad, kiu estis demetita de lia stabestra posteno post la forpaso de la aŭstria imperiestro, Francisko-Jozefo, en decembro de 1916, kaj la entroniĝo de lia sukcedinto, Karolo. La venko en tiu aŭstria fronto estis malmulte decida por Rusujo ĉar, pro la grandaj perdoj de la antaŭaj jaroj, la rusa armeo ne kapablis akumuli sufiĉe da fortoj por eltiri profiton de la sukceso de Brusilov. Ankaŭ iliaj perdoj estis enormaj. Komence de tiu vintro unu miliono da rusaj soldatoj estis dezertinte. Verdire tiam estis jam tre evidenta la krizo de la rusa socio kiu evoluis al revolucio en la sekva jaro.

Dum la germanoj estis pene batalante kontraŭ la ofensivoj de Brusilov ili devis alfronti novan krizon. Ekde marto de tiu jaro 1916 la aliancanoj estis planinte atakon en la areo de la Somme-rivero. La atako en tiu loko, far novalveninta brita armeo, ne havis specialan strategian gravecon, ĝi celis malfortigi la germanan premon sur Verduno. La tereno de tiu zono ne estis favora por la realigo de ofensivoj, kaj krome la germanaj trupoj estis bone instalitaj en la tieaj altaĵoj kie ili havis solidajn kaj komfortajn fortikaĵojn. Tamen, kvankam Fritz von Below, komandanto de la germana Dua Armeo antaŭvidis atakon en tiu sektoro la alta stabo mistaksis tiun danĝeron kaj ne sendis tien la helpo-trupojn kaj la provizaĵojn kiujn Below urĝece postuladis.

Kvankam Haig estis la ĉefkomandanto de la brita armeo li asignis al Rawlinson la taskon plani la operacion, sed ekzistis granda malakordo inter ili: Haig deziris ĝeneralan ofensivon celante decidan rompon de la fronto dum Rawlinson, male, pensis pri laŭgrada avanco pere de malgrandaj ofensivoj kun limigitaj celoj. Dum unu semajno oni aplikis kontraŭ la germanaj linioj la plej fortan bombardadon ĝis tiam okazinta en ĉiu ajn milito. Iuj germanaj trupoj, ŝokitaj kaj duonfrenezigitaj, devis travivi la tutan semajnon subtere ricevante nenian provizaĵon, eĉ ne akvon. Tamen la bombardado ne atingis ĝian celon, la germanaj fortik-linioj rezultis malpli damaĝitaj ol planite. Tuj post la ĉeso de la artileria atako, la germanaj soldatoj eliris el iliaj gvatejoj kaj prenis poziciojn. Frumatene de la 1-a de julio de 1916, 14 britaj divizioj de infanterio avancis kontraŭ la germanaj linioj. Ili esperis trovi ruinigitan la tranĉeo-sistemon de la malamiko sed, male, ili estis masakritaj de la germanaj kanonoj kaj mitraloj dum la atako. Dum la malfacila suprenirado tra la deklivoj al la germanaj tranĉeoj iuj britaj batalionoj estis ekstermitaj dum kelk-minuta daŭro. Kiam la tago finiĝis 19.000 homoj estis mortintaj kaj 38.000 estis vunditaj sen kapti ian ajn punkton en la germanaj linioj escepte en la dekstra flanko de la fronto kie partoprenis francaj fortoj en la ofensivo. Nekredeble, spite al tiel kolosaj perdoj la batalo plu daŭris dum kvar monatoj kaj duono. Tiel ega homa katastrofo utilis nur por konkeri 11 kilometrojn da teritorio, sed sen atingi la rompon de la germana fronto. La tutaj perdoj de tiu batalo estis 614.105 homoj, el kiuj 419.654 estis angloj kaj de la brita imperio. Ankaŭ la germanoj suferis gravajn perdojn. La bataloj de Verduno kaj Somne kontribuis al la fina venko sur Germanio. Sed oni povas diri ke en tiu milito neniu, krom la morto, vere venkis.

Dum tiu jaro 1916 la milito disvolviĝis ne nur en la teraj frontoj sed estis ankaŭ gravaj mar-militaj okazintaĵoj. Por Germanio estis grava celo havigi al si grandan floton kapablan konkuri kun Britio. Dume por ĉi tiu lando estis esenca konservi la maran superregadon por la kontrolado de ĝia kolonia imperio. La disvolviĝo de grava germana ŝiparo tre zorgigis, de antaŭ kelkaj jaroj, la britajn aŭtoritatojn. La milito de 1905 inter Japanio kaj Rusujo igis ke ĉi lasta lando perdu sian maran milit-potencon sed la leciono, por la britoj, eltirita de tiu konflikto estis ke ili devus konstrui pri potencajn militŝipojn pli rapidajn kaj kun grandaj kano-

noj kapablaj pafi longdistance. John Fisher, Unuaranga Lordo de la Admiralitato, proponis la konstruon de la ***Dreadnought*** (sentima), buko kun 10 kanonoj de 305 milimetroj kaj impulsata de turbinoj. Germanio reagis kaj ekde 1906 dediĉiĝis al la disvolvo de tiutipa ŝiparo. Tiu mara vetarmado inter Britio kaj Germanio impulsis la anglojn alianciĝi kun Francio kaj Rusio cele bremsi la germanan minacon. Tamen la kiras-ŝipoj ***Dreadnought***-tipaj ne ludis gravan rolon en la Mondmilito. Male, aperis alitipa mara armilo, la submarŝipoj, kiu estis tre uzita de Germanio por damaĝi la britan sekurecon.

Kiam, en 1914, komenciĝis la milito Britio havis 20 ***Dreadnought***-tipajn kiras-ŝipojn kaj Germanio 13. El batal-kirasŝipoj, Britio havis 8 dum Germanio havis 5. Pri alitipaj, malpli potencaj, kirasŝipoj, la brita avantaĝo rilate al Germanio estis 102 kontraŭ 41, kaj pri destrojeroj la rilato favora al Britio estis 301 kontraŭ 144. Ankaŭ pri submaraj ŝipoj havis tiam avantaĝo Britio: 78 kontraŭ 30 de Germanio. Oni esperis grandan interfrontiĝon de ambaŭ potencaj maraj armeoj, tamen la brita komandanto de la mar-armeo, Siro John Jellicoe konsideris ke la brita floto estis deadmona armilo kiu ne devus esti uzata por esti efektiva. Do li evitis dramajn interfrontiĝojn. Estis sufiĉe prava lia opinio ke Germanio devus fari ofensivon se ĝi volus rompi la blokadon al kiu tiu lando estis submetita. Siaflanke ankaŭ la germanoj lernis esti prudentaj pri maraj kontraŭfrontiĝoj. Kiam okazis, en januaro de 1915, malgranda mara batalo la britoj dronigis la germanan kirasipon ***Blücher*** kun 950 mararmeanoj. Ĉi tio konvinkis la germanojn ke la kvalito estis esenca por la maraj bataloj. Post tio, dum pli ol unu jaro la germanoj ne forbordiĝis. Sed la strategio de Jellicoe metis la germanojn antaŭ dilemo; ili povus rompi la blokadon nur pere de ampleksa, decida batalo, sed tiutipa batalo, malproksime el la germanaj havenoj kaj kontraŭ tiel supera malamiko signifis grandan riskon. Tiel la admiralo Tirpitz kiel la kajzero mem opiniis, simile al la brita admiralo, ke la mararmeo devus utili kiel deadmona armilo kaj por atingi influo okaze de pac-negocado. Sed dume la germanoj komprenis ke tamen ili ion devus fari ĉar la senaktiveco de la maraj milit-flotoj estis favora al la angla strategio. Krome la senaktiveco de la mararmeo, kies konstruo tiel altekoste rezultis al Germanio, dum en la teraj frontoj oni bataladis furioze kaj kuraĝe, malkontentigis la loĝantaron de tiu lando.





Komence de 1916 la nova komandanto de la germana floto, la admiralo Reinhard Scheer, konvinkis la altan stabon ke estis alveninte la horo kontraŭfronti la britojn en iu decida batalo. Li elpensis planon por ataki la britan armeon po partoj, komencante per la eskadro de la admiralo David Beatty ankrita en Rosyth antaŭ ol tio ke la granda floto en Scapa Flow povus interveni. La plano celis trompi Beatty-n igante lin pensi ke li persekutas malgrandan germanan forton kaj altirante lin al zono kie atendus potenca ensemblo de ***U-Booten*** submar-ŝipoj. Sed la britoj kapablis malkodi la germanajn mesaĝojn kaj tial ili konis la planon de la malamiko kaj preparis sian propran trompon al la germana mararmeo. Do la Granda Brita Floto forbordiĝis samtempe kiel la eskadro de Beatty kaj simulis fali en la germanan embuskon sed evitante alproksimiĝon al la zono de la submarŝipoj kies lokiĝo estis konata. La atendita kontraŭfrontiĝo de la du flotoj okazis la 31an de majo de 1916 sed laŭ la maniero planita de la germanoj. Ĉiukaze la batalo de tiuj potencaj mararmeoj ne tiel estis decida kiel esperis ambaŭ militantaj partoj. La britaj perdoj estis 112.000 tunoj kaj 6.097 homoj; la germanaj 63.000 tunoj kaj 2.251 homoj. La germanaj perdoj estis malpli gravaj ol la britaj sed Germanio ne sukcesis rompi la blokadon. Tamen, ankaŭ la britoj ne povis eniri en la Baltan Maron por helpi la rusojn. De ĉiuj vidpunktoj ŝajnas ke la situacio en la maro estis simile ekvilibra kiel en la teraj frontoj. En la maro, sed submare la afero estis alia. De tiam la germana strategio kontemplis la pliintesigon de la submara milito kaj atakoj pere de submar-ŝipoj al la armeaj de la angloj kaj komercaj ŝipoj provizantaj al ĉi tiuj.

Al la britoj ne estis malfacile efektivigi la blokadon al Germanio; sufiĉis nur kontroli la Calais-markolon. Kiam Usono ankoraŭ estis neŭtrala volis komerci kun Germanio kaj tio iome estis problemo por la angloj sed, pli malpli, ambaŭ potencoj respektis la internaciajn normojn pri ĉi tiuj situacioj. La sukceso de la blokado okazigis grandajn problemojn de provizado al Germanio kaj la reago de tiu lando estis ataki la britajn interesojn per la submara milito. Kvankam komence Britio havis superecon ankaŭ pri la nombro da submaraj ŝipoj, la germanaj estis pli kvalitaj de teknika vidpunkto kaj tio baldaŭ evidentiĝis en la koncernaj atakoj. La maroj ĉirkaŭ Britio estis konsideritaj de la germanoj «milita zono» kaj avertis ke ĉiu ajn ŝipo naviganta en ĝi povus esti dronigita de ili. Do, de tiam

komenciĝis por ili la problemoj kun la neŭtralaj landoj, precipe kun potencaj landoj kiel Usono, ĉefe ĉar la germanoj ne respektis la internaciajn leĝojn pri la kazo. En la usona publika opinio provokis grandan ĉagrenon la dronigon de la transatlantika ŝipo ***Lusitania*** en kiu mortis 1.098 pasaĝeroj, usonaj 120 el ili. Ŝajnas ke tiu okazintaĵo tre influis en la milita poziciiĝo de Usono kontraŭ Germanio. Dum la jaroj 1915 kaj 1916 la germanoj intensigis tiutipajn atakojn. La perdoj de la aliancanoj pro tiuj submarŝipaj atakoj estis proksimume 300.000 tunoj ĉiumonate. La situacio fariĝis vera problemo por ili, sed iome ŝanĝiĝis post la eniro de Usono en la militon. De tiam, por malfaciligi la germanajn atakojn, oni aplikis la sistemon de konvojoj eskortitaj de milit-ŝipoj. Apartenas al tiu epoko ankaŭ la sistemo de submaraj eksplod-ŝargaĵoj, per kiuj estis detruitaj dekoj da germanaj submar-ŝipoj.
Krom la submar-ŝipoj, alia armilo kiu tre disvolviĝis dum ĉi tiu Granda Milito estis la aviadiloj, kaj aperis iuj novaj kiel la tankoj. Dum la unuaj monatoj de la milito, la aviadiloj estis uzitaj nur por taskoj de skoltado de la malamikaj linioj. La ĉas-aviadiloj evoluis kiel formo eviti la aeran esploradon de la malamiko. Iom-post-iom estis perfektigita la sistemo de pafado ekde tiuj flugaparatoj. En ĉi tiu tereno de la potencigado de la aera armilo ambaŭ interkontraŭantoj progresis paralele kaj la ekvilibro de potenco konserviĝis dum la tuta milito. Komence de la jaro 1917 la germanoj superregis la aeron pere de la aparatoj de la serio ***Albatros***, kulminante en la monato aprilo kiam la britaj perdoj estis 30% el la monata produktado. Sed la aliancanoj reagis per la aviadiloj de la serioj ***SE5***, ***Bristol***, ***Camels*** kaj ***Snipes***, kiuj rezultis de senĉesa renoviĝo pri paf-kapablo kaj rapideco. Multaj pilotoj mortis jam en la fazo de trejnado. Laŭ brita oficiala informo, el la 14.166 mortintaj aviadistoj, 8.000 el ili pereis dum la trejnado. Kelkaj el la pilotoj de tiu milito fariĝis tre famaj kiel la germana Manfred vo Richtofen, t. n. «Ruĝa Barono». La francoj estis la unuaj kiuj forlasis la individuismon kaj organizis formaciojn de ĉas-aviadiloj nomitaj ***Cigognes***. La germanoj sekvis la ekzemplon per siaj formacioj nomitaj ***Jagdstaffeln*** kaj la britoj per la siaj, nomitaj ***Flights***.
Laŭ la disvolviĝo de la milito la aviad-armilo fariĝis pli kaj pli esenca elemento de la armeoj. Krom por bombardi la militajn frontojn, ĝi estis uzita ankaŭ por detrui la industriajn instalaĵojn de la malamiko kaj terurigi la civilan loĝantaron bobardante urbojn. En tiu epoko la flugantaj aparatoj ne estis nur aviadiloj; ekzistis ankaŭ la t. n. «zepelinoj», kiuj poste ĉesis esti uzataj kiam plu kaj pli perfektiĝis la aviadiloj. Komence de la milito la germanoj disponis jam de 30 el tiuj zepelinoj, mezurantaj inter 150 kaj 250 metrojn.
Simila disvolviĝo al tiu de la aviad-armilo estis tiu de aliaj armiloj, kiuj aperis unuafoje en la historio por esti aplikataj en ĉi tiu milito. Tia estis, ekzemple, la kazo de la tankoj; en septembro de 1916 en la fronto de la Somne-rivero, kiam la britaj trupoj atakis la germanajn liniojn, aperis unuafoje la tankoj en la milito. Temis pri la modelo ***Mark I***. Sed ĉi tiu novaĵo ne estis tuj imitita tiam de la germanoj. Dum la unua Mond-milito la germanoj konstruis nur 30 el tiuj aparatoj; ili preferis dediĉi siajn jam malabundajn rimedojn al aliaj malplikostaj armiloj, kiel la venenaj gasoj. La unuaj britaj tankoj uzitaj en la Somne pezis 28 tunojn kaj enportis ok homojn. Ĝia rapideco estis 6 kilometroj hore. Baldaŭ la francoj entreprenis sian propran programon de tanko-konstruado. Sed komence ne estis klara ideo pri la utilo de tiujn aparatoj, kaj oni uzis ilin kiel apogo por la infanterio. Nur poste oni konstatis ke, pro sia naturo kaj karakteraĵoj, tiu armilo estis pli taŭga por roloj de kavalerio, t.e. uzi koncentritajn amasojn da tankoj por surprizaj atakoj enŝovante ilin malantaŭ la infanterion kaj artilerion de la malamiko. Sed la rolo de la tankoj en la Unua Mondmilito ne estis grava. La unua atako per koncentriĝo de tankoj ne okazis ĝis novembro de 1917, en Cambrai, kaj la ĉefa uzado de tiu armilo devis atendi ĝis la Dua Mond-Milito.





La bildo de la milito komence de 1917 ne estis tre malsimila ol tiu de 1915, kiam la tranĉeo-linioj estis dividinte Eŭropon en du partojn. En la oriento, la tranĉeo-linio estis moviĝinta 480 kilometrojn kaj havis apogon en la sudo, en la Nigra maro, anstataŭ en la Karpato, sed en la nordo daŭre estis en la Balta maro. Ekzistis iu nova tranĉeo-fronto en la limo inter Italio kaj Aŭstrio kaj en la limo inter Grekujo kaj Bulgario. En 1917 oni daŭre bataladis en la okcidenta fronto. Rezulte de iliaj perdoj en la Somme, la germanoj mallongigis siajn liniojn, faris retreton de 40 kilometroj en la centra parto de la fronto ĝis la defensiv-linio «Sigfrido». En Britio komenciĝis la regado de David Lloyd George. En Francio, la generalo Robert Nivelle anstataŭis Joffre-n kiel ĉefkomandanto kaj Haig daŭre komandis la britan armeon spite al tio ke liaj strategioj okazigadis grandajn perdojn. La unuaj monatoj de la jaro estis decidaj por la Aliancanoj ĉar Rusio troviĝis ĉe la rando de revolucio kaj Usono ankoraŭ ne estis enirinte en la konflikton. Eĉ post la eniro de Usono en la militon, pasis monatoj antaŭ ĝia fakta batalado. Nivelle montris bonan gvid-kapablon en la unuaj monatoj de la konflikto kaj tio impulsis lian karieron. Lia ŝanco estis en Verduno, kie, per iaj akcepteblaj perdoj, li sukcesis rekuperi gravajn poziciojn. Multaj erare pensis ke Nivelle sukcesis kompreni la esencon de la moderna milito kaj ke li estis la homo taŭga por apliki novecajn teknikojn en la batalkampo. Sed Nivelle estis arogantulo kiu fanfaronadis kapabli gajni la militon repidece kaj malaltpreze. Malmulte post lia enpostenîĝo, Nivelle certigis al Lloyd George ke la Aliancanoj enirus «baldaŭ en Berlino». Ĉi tiu konsideris lin la plej kapabla franca generalo: Li elreviĝis post ne multe da tempo. Komence Nivelle prenis disponojn ŝajne taŭgaj. Li forlasis la kastelon de Chantilly kie troviĝis la ĉefkomandejo de Joffre kaj translokiĝis al iu loko pli sobra kaj pli proksima al la fronto. Li elpensis planon por lanĉi fortan ofensivon en la regiono de Ĉampanjo en aprilo de 1917. Li planis lanĉi 44 francajn diviziojn kontraŭ naŭ germanaj, io kio principe ŝajnis saĝa. La operacio celis detrui 100-kilometran elstaran angulon inter Arras kaj Craone. Kiam oni distribuis la planojn inter la francaj oficiroj, iuj el ili alvenis al la manoj de la germanoj ĉar en du razioj kontraŭ la francaj tranĉeoj ili sukcesis kapti kelkajn oficirojn. En marto, post la analizado de la franca plano, la germanoj retiriĝis en ordo el la minacata pozicio kaj entranĉeiĝis malantaŭ la «Linio Sigfrido». Dum la retiriĝo la germanoj detruadis ĉion, ruinigante kampojn kaj vilaĝojn, metante trompo-bombojn kaj venenigante la akvo-putojn. Spite al la konsiloj kaj petegoj ke li rezignu pri ofensivo kiu jam estis sensenca, Nivelle insistis lanĉi ĝin kontraŭ la nova germana pozicio sen apenaŭ ŝanĝo en la komenca plano. Li tre fidis pri la artileria bariero kiu akompanus la trupojn dum la avanco. Huber Lyautey, nova ministro pri Milito, pensis ke la plano estis vera sensencaĵo sed li koliziis kun la firma apogo al Nivelle fare de la franca Parlamento. La ministro demisiis kaj la planita atako efektiviĝis. Nivelle sentis entuziasmon pri la ofensiv-strategio kaj pensis ke pere de forta artileria apogo li povus atingi la venkon en la okcidenta fronto dum du tagoj. Tial ke la fronto estis trankvila de antaŭ multe da tempo, Nivelle estis certa ke la germanoj ne tiel estis preparitaj tie kiel en aliaj sektoroj. Kiam fine li lanĉis la atakon, la 15-an de aprilo de 1917, la rezulto estis katastrofa kun 120.000 francaj perdoj inter mortintoj kaj vunditoj. Nivelle persistis en sia intenco malgraŭ la nula gajno. Spite al ĉiuj novecaj taktikoj, la enorma heroeco de la soldatoj kaj la teruraj perdoj, oni povis kapti nur la unuajn tranĉeo-liniojn. Tial ke Nivelle estis metinte la plej kvalitajn batalantojn en la unua atak-linio, la perdoj estis suferitaj de esencaj kaj elitaj trupoj. Sciante ke lia kariero estis subdanĝere, Nivelle persistis en la atako kaj kulpigis la oficirojn pri ĉio. La enorma ambicio de Nivelle kaj la mizeraj viv-kondiĉoj en la tranĉeoj ruinigis la paciencon de la francaj soldatoj. La rekta sekvo de tiu senfortuna ofensivo estis la ekribelo kiu etendiĝis tra la franca armeo en 1917 kontraŭ iaj oficiroj kiaj ne atentis pri la sennecesaj perdoj de homaj vivoj. Oni ne multe informis pri tiuj okazintaĵojn, kaj eĉ nuntempe oni ne multe konas pri tiu milita epizodo ĉar la armeo kaŝis tiun aferon humiligan por ĝi. Tamen oni povas konkludi ke estis spontana reago kontraŭ la nesentema maniero gvidi la militajn operaciojn. La soldatoj komprenis ke en la milito mortas multaj homoj, sed ili ne komprenis tiom da mortoj en sennecesaj operacioj. Dum du semajnoj estis granda konfuzo en la franca sektoro de la fronto. Aperis ruĝaj flagoj kaj revoluciaj kanzonoj. Je la fino de majo, ok divizioj kiuj estis partoprenintaj en la ofensivo troviĝis en ribelo. Komence de junio, duono el la franca armeo estis en tia situacio. Tamen la ribelintoj zorgis kaŝi al la germanoj la okazintaĵojn por ne provizi al ili eblecon eltiri profiton el tiu situacio. Nekredeble, la germanoj eksciis nenion pri tio okazanta en la francaj linioj.

Nivelle devis esti anstataŭata. La nova ĉef-komandanto, Pétain, kontrolis la ribelon respondante iujn el la petoj de la soldatoj, samtempe ke li igis apliki striktan disciplinon: 629 homoj estis mort-kondamnitaj, kvankam oni ekzekutis nur 43, kaj oni plibonigis la pagadon, la permesojn kaj la dieton de la soldatoj. Haig sin montris malakorde kun tiuj koncesioj kaj asertis ke Pétain estus devinta ekzekuti dumil ribelintojn. Ĉiukaze, la ribelo finiĝis, kvankam restis klare ke la franca armeo restis nekapabla realigi novajn ofensivojn. Pétain deklaris ke li atendos la alvenon de la usonaj helpo-trupoj kaj tankoj.
Post la fiasko de la ofensivo de Nivelle, la iniciativo pasis al la britoj. La atento de Haig adresiĝis al la elstar-angulo de Ipro, la plej proksima al la have-noj tra kiuj la britoj ricevadis la provizaĵojn, kaj kie tiam estis germana senaktiveco. Iu el la kialoj de la ofensivo estis la intensiĝo de la submarŝipaj atakoj de la germanoj. La ofensivo celis kapti la havenojn de Ostendo kaj Zeebrugo. Pro la kriza situacio de la franca armeo, la angla ĉefministro Lloyd-George, ne emis akcepti kombinatan atakon brita-francan. Krome tiam estis al li necese sendi 12 divizio jn al la itala fronto ekde Francio. Haig lanĉis la ofensivon de Passchendaele tial ke li estis konvinkita ke Germanio estis suferanta grandan malabundon je rezervoj kaj troviĝis ĉe la rando de kolapso.



Sed la tragika sekvo de tiu tragika epizodo, krom la teruraj kondiĉoj sur la tereno, estis la detruo de la espero. La prepara faro de la ofensivo estis la kapto de la kresto de Messines far la Dua armeo de Herbert Plumer. Cele dissaltigi la kreston, oni traboris tunelojn sub ĝi kaj en la printempo jam oni estis metinte 19 grandajn minojn sub la tereno. Oni eksplodigis ilin la 7-an de junio kaj oni sukcesis detrui la kreston kaj mortigi la germanojn defendantajn ĝin. La tereno de la elstaraĵo moviĝis kvazaŭ oceano, kaj la sono de la eksplodo estis aŭdita en Londono. La Dua Armeo perdis nur trionon el la antaŭkalkulitaj homoj. La operacio estis sukcesa sed oni ne profitis ĝian rezulton. Pasis 53 tagoj antaŭ la sekva reatako. Oni falis en tiun eraron tial ke la primilita kabineto de la aliancanoj tre dubis pri la kampanjo de Flandrio kaj volis sendi trupojn al Italio. Kiam oni reigis la atakon la 31-an de julio estis pluva vetero kaj la batalkampo jam estis ia enorma marĉo, kaj krome la germanoj estis antaŭpreparitaj. La germana kolonelo Fritz von Lossberg establis novan kaj profundan defensiv-sistemon konsistantan el betonaj bunkroj kaj specialaj unuoj de kontraŭatako kiuj frapis la britajn atakantojn kiam ĉi tiuj estis malpli fortaj. La Kvina Armeo sukcesis kapti la kreston de Pilcken post tritaga batalado dum kiu ĝi suferis 31.000 perdojn sed ne kapablis atingi la sekvajn celojn en la altaĵo de Gheluvelt kaj Langemarck. Ekde la komenciĝo de la ofensivo la britoj perdis en la kotejo 64.000 soldatojn kaj 3.000 oficirojn sen la atingo de la dekomencaj celoj.
La sekva celo estis serio da krestoj laŭlonge de la nordeasto de la elstar-angulo. Haig kaj la britaj oficiroj trozorgeme preparis la atakon per ia detruopova artileria bariero de 1.300 kanonoj kaj haŭbizoj. Tiam la vetero estis sekeca kaj varma, kaj tio ebligis transloki la kanonojn al la fronto. La kresto Passchendaele-Staden estis kaptita per alsalto. La britaj pilotoj signaladis la celojn al la artileriaj baterioj. La dua brita frapo okazis en la suda flanko de la elstaraĵo la 26-an de septembro, kaj la tria okazis en Broodseinde la 4-an de oktobro. La rezulto estis granda venko de la britoj sur la germanoj. Sed ne estis okazinte la atendita germana kolapso kaj la britaj armeoj havis nur ian nestabilan ĉeeston en la kresto de Passchendaele. Haig konferencis kun siaj oficiroj kaj inter ĉi tiuj estis interkonsento haltigi la ofensivon, tial ke la plano por efektivigi elŝipiĝo estis preterlasita. Tamen Haig decidis daŭrigi la ofensivon surbaze de la prikonsidero ke la vetero estis favora kaj estis ebleco je germana kolapso. Krome li deziris la altaĵon por la vintro.
Tiele komenciĝis la tria akto, iu el la plej teruraj de la militista historio. La tuta ofensivo centriĝis en la vilaĝo Passchendaele. La pluvo forte revenis al la batalkampo kaj konvertis la terenon en netraireblan marĉejon. La britoj kaj la germanoj dronante en la kotejon bataladis ne komprenante la sencon kaj la celon. La batal-kampo estis ia enorma marĉejo de misfortuno, kie multenombraj batalionoj, brigadoj kaj divizioj de infanterio baraktadis cele ne droni en ĝi, finante diskrevintaj aŭ perdrone mortintaj, ĝis fine, post senmezura intermasakrado, sukcesi atingi kelkkilometran kotoplenan terenon. La tri bataloj de la tria akto, Poelcapelle la 9-an de oktobro, la unua de Passchendaele de la 12-a al la 26-a de oktobro, kaj la fina kapto de tiu vilaĝo far la kanadanoj la 6-an de novembro, estis tre similaj. Ĉio dronis en la kotejo. Kiam fine estis haltigita la ofensivo, la elstar-angulo de Ipro estis ampleksiĝinta favore al la germanoj, kaj ĝia angulo de Passchendaele troviĝis nur distance 9 kilometrojn de Ipro. La brita oficiala historio kalkulas 245.000 homajn perdojn. La germanaj perdoj estis inter 175.000 kaj 200.000 homoj. Por ambaŭ armeoj tiu batalo estis ege triva. Krome por la britoj

Passchendaele alportis demoraliziĝon ĉar evidentiĝis ke fiaskis ilia celo kaj espero meti finon al la germana rezist-kapablo.
Sed la eniro de Usono en la militon en aprilo de 1917 estis kialo de granda kuraĝiĝo por la aliancanoj kvankam la tiujara kolapso de la rusa fronto pro la revolucio en tiu lando ebligis ke grandnombro da germanaj kaj aŭstriaj trupoj estu sendataj al aliaj frontoj. En oktobro de tiu jaro okazis aŭstrio-germana ofensivo kiu signifis totalan humiligon por la italaj trupoj en Caporetto. En la tiujara printempo la italoj estis entreprenintaj novan atakon en ilia fronto de la Isonzo-rivero. Tamen post kelksemajna furioza batalado la aŭstra-hungara armeo restis en tre bona pozicio en junio. Tial la komandanto Luigi Cadorna decidis strategian ŝanĝon: li metis finon al la ofensivoj en la Isonzo-zono kaj entreprenis atakojn en la montoj de Trentino, iu loko tute ne konvena por bataladi. La trupoj devis alfronti krutan terenon kaj mankon je sufiĉe da oksigeno en la aero. Meze de aŭgusto, post enorma suferado kun magra rezulto, Cadorna centriĝis kromanfoje en la fronto de la rivero Isonzo. Ĉi tiu ofensivo, pli potenca ol la antaŭaj, atingis ian sukceson: la aŭstrianoj retiriĝis 8 kilometrojn. Tamen, post tutmonata batalado kaj la perdo je 165.000 homoj finruiniĝis la spirita forto de la italoj. Conrad insistis ke oni efektivigu kombinitan ofensivon kun la germanoj, io kion ĉi tiuj ne estis dezirantaj. Tamen, la situacio de la Aŭstria-Hungaria Imperio igis tre necesa ian venkon por subteni ĝian deprimitan anim-forton. Oni alportis pezan artilerion kaj deaeran apogon kondiĉe ke la sekva ofensivo estu komandata de iu germana oficiro, la generalo Otto von Below, kiu decidis ataki la 24-an de oktobro. La atako ne surprizis la italojn, sed jes ja, surprizis ilin la in-tenseco de la atako. Cadorna estis konanta la mal-amikajn preparojn. Sed li konfidis je sia rezist-kapablo. Li estis trankviliginte la britojn asertante ke lia armeo kapablus rezisti kvin-semajnan ofensivon. Tamen li ne taksis la diferencon kiun signifis la no-vaj germanaj trupoj kaj ia kapabla komandanto. La germanoj sekrete deplojis ian enorman arsenalon kaj la trupoj situiĝis sialoke dum la nokto. Amasa bombardado post atako per venena gaso inicis la ferocan atakon. Caporetto, sur kiu centriĝis la atako, aldoniĝis al la listo da misfamaj lokoj de la primilita historio. La nekredebla rapideco kun kiu disfalis la itala armeo definitive senhonorigis ĉi tiun. En iuj lokoj de la fronto la avanco penetris pli ol 20 kilometrojn je la unua tago. La itala rezisto fandiĝis kvazaŭ neĝo. Baldaŭ la itala retitiĝo fariĝis ĥaosa.



La teruritaj trupoj forkuris kune kun la retiriĝantaj civiluloj. Du trionoj el la itala infanterio estis konstituita de kamparanoj kaj suferis 90 procenton el la perdoj. La paniko en la italaj vicoj baldaŭ etendiĝis kaj la situacio degeneris al ĥaoso de ebrio, insurekcioj kaj dispredado. La italoj suferis proksimume 12.000 mortintojn, 30.000 vunditojn kaj 294.000 milit-kaptitojn. Krome dizertis 350.000 kaj travagadis la nordon de Italio aŭ reiris al iliaj hejmoj. Nur duono el la 65 divizioj de la armeo supervivis sendamaĝe, oni perdis duonon el la artilerio, pli ol tri mil kanonojn, samkiel 300.000 fusilojn, 3.000 mitralojn kaj 1.600 motor-veturilojn. Italio perdis ankaŭ teritorion da 14.000 kvadrataj kilometroj kun miliono da enloĝantoj. Spit' al ĉio, la germanoj kaj aŭstro-hungaroj ne estis atinginte definitivan venkon. La itala armeo povis esti reorganizata apud la rivero Piave. Defendante la propralandan teritorion pligrandiĝis la volo je rezistado de la italoj kaj decidis ne plu cedi terenon. Krome la germanoj ne povis pliprofundigi la venkan avancadon tial ke ili havis problemojn pri provizado ĉar ne disponis je sufiĉe da kamionoj por la transportado de ĉio necesa por la armeo. Dume la itala registaro decidis ĉesigi la armean komandanton. Cadorna estis anstataŭita de la generalo Armando Diaz, pli sentema rilate al la soldatoj. Oni pligrandigis la nutraĵporciojn kaj la soldatsalajrojn same kiel la daŭro de la feri-permesoj por la trupoj. Kvankam Diaz aplikis striktan disciplinon, li malpermesis la praktikon de la dekumado de la armeaj unuoj. Samtempe alvenis al la itala fronto 10 franc-britaj divizioj kiuj helpis restarigi la ordon kaj oni formis specialajn grupojn de sturm-taĉmentoj por plenumi specialajn operaciojn. En novembro, Lloyd George kunvokis kunsidon en la itala urbo Rapallo por pridiskuti la konstituon de komuna komand-organo. La Plejsupera Milita Konsilio estis konstituita de militistaj kaj politikaj perantoj kiuj regulmaniere kunsidis por pritrakti aferojn de komuna intereso kaj formuli strategion. Ĝi havis diversajn komitatojn kun respondeco pri ekonomiaj resursoj, nutraĵoj, transportado, municioj kaj mara milito. Tiu Konsilio rolis kiel alternativo al la brita kaj franca Plejsuperaj Staboj, pri kiuj la registrar-prezidentoj de ambaŭ landoj tute ne konfidis. La situacio de la armeoj de la aliancanoj restis sufiĉe firmigita por la militaj operacioj de la sekva jaro 1918.
La ribeloj de la francaj trupoj ne etendiĝis al la ariergardo. Sed io tute alia okazis en Rusujo. La prirevolucia minaco ne estis novaĵo en tiu lando. Dum la jardekoj antaŭ la mondmilito estis ŝprucinte kelkaj

radikalaj grupoj. En la jaro 1905, post la milito kontraŭ Japanio Rusujo troviĝis ĉe la rando de revolucio kiu estis evitita dank' al la konsento de la caro por la konstituo de iu Dumao, demokratia organo. Tamen la caro daŭre plu regadis kiel aŭtokrato. Komence de la milito en 1914 la tuta lando fervore kaj entuziasme apogis la disponojn de la monarko rilate al la implikiĝo de la lando en la konflikto, sed en 1917 la patriota ardo estis estingiĝinta. Dum la tria vintro de la milito la situacio fariĝis neeltenebla pro la inflacio kaj la malabundo de la nutraĵoj. La malkontento de la loĝantaro estis ĝenerala kaj okazis amasaj perturboj kaj la strikoj paralizis la transport-sistemon. Rezulte de la kolapso de la leĝo kaj la ordo fariĝis tute ne ebla la regado. La grandaj perdoj en la fronto estis ruiniginte la regulan soldataron de la rusa armeo kaj oni devis anstataŭigi ĝin per kamparanoj kies loĝaleco al la caro estis pridubinda. En la danĝeraj kaj malfacilaj situacioj en la fronto, la soldatoj komencis forlasi siajn armilojn, malobei la oficirojn kaj dizerti adresiĝante al siaj hejmoj. La lando troviĝis sur la rando de revolucio. Rodzianko, prezidanto de la Dumao, petegis al la caro ke li revenu el la fronto al Petrogrado, sed Nikolao ne volis lin aŭskulti. Iomete poste, la tuta lando troviĝis paralizita far iu ĝenerala striko, iuj publikaj konstruaĵoj estis bruligitaj, kaj en la kamparo okazis okupado de riĉaj bienoj kaj farmoj far la neposedantaj kamparanoj, la prizonuloj eliris el la prizonoj kaj la soldatoj komencis unuiĝi al la strikantoj. En iu despera provo repreni la kontrolon, la caro forlasis la fronton kaj revenis pertrajne al Rusujo. Survoje al Petrogrado, lia trajno estis haltigita kaj oni komuikis al li ke la situacio estis for je ia ajn kontrolo kaj ke li devus abdiki. La caro intencis fari tion favore al lia frato Mikaelo, sed ĉi tiu rifuzis la aferon kaj Rusio fariĝis respubliko.



Post tiu revolucio en marto 1917 (februaro laŭ la rusa kalendaro) konstituiĝis iu provizora registaro sub la lidereco de la princo Lvov kiu promesis ĝeneralan balotadon kaj la konstituon de ia demokratia regad-sistemo. Dum la disvolviĝo de tiuj decidaj okazaĵoj, la germanoj efektivigis nenian ofensivon en la rusa fronto, ĉar ili estis certaj ke la nova regantaro petus pacon. Tamen la provizora registaro, sub la premo de Britio kaj Francio, decidis ke Rusio devus plu resti en la milito. La ĝenerala balotado estis sen-date prokrastigita kaj la provizora registaro nomumis Brisilovon kiel ĉefkomandanton. Komence, Brusilov apogis la decidon de Aleksandro Kerenskij, nova primilita ministro, lanĉi novan ofensivon dum la somero. Sed kiam li vizitis la frontajn trupojn, li trovis la soldataron sintenante kontraŭ ia ajn nova atako. Spite al la duboj de Brusilov, la ofensivo estis entreprenita la 1-an de julio 1917 kaj ĝi disfalis post du semajnoj. La rusaj trupoj en retiriĝo aplikis la politikon bruligi kaj detrui ĉion kion povus utili al la germanoj kaj aŭstro-hungaroj. Rusio ĉesis esti rivalo por tiuj potencoj. Reale, la provizora registaro ne tute kontroladis la okazaĵojn, ĉar ĝi kunhavis la povon kun la konsilioj de laboristoj, la Soveto de Petrogrado. Laŭ sia propra iniciato, la Soveto diktis ordonon per kiu la soldatoj devus obei ĝiajn disponojn, io kio kondukis al la diseriĝo de la rusa armeo. La kono de ĉi tiuj okazaĵoj alvenis al Lenino, kiu estis ekzilito en Svisio, kaj la germana Plejalta Stabo ebligis ke la bolŝevista lidero revenu en Rusujon cele kompliki la politikan situacion en Rusujo. Translokita pertrajne tra Germanio, Leni-no alvenis al Petrogrado inter popolamasa entuzias-mo. Sub la slogano «Paco, pano kaj tero», la bolŝevista lidero postulis la finon de la milito kaj la tutan povon por la sovetoj. Dum la sekvintaj semaj-noj, Rusio falis en ĥaoson kiu kulminis en la krizo de julio en kiu la povo daŭre estis dividita inter la provizora registaro kaj la Soveto de Petrogrado. Tiu kontraudiro kaj la informo de novaj militaj katastrofoj pliendanĝerigis la situacion. La provizora registaro kulpigis Leninon kaj akuzis lin esti germana spiono, kio devigis lin forfuĝi cele rifuĝi en Finlandon. Dume, la lidereco de la provizora registaro pasis al Kerenskij, iu modera socialisto. La nova lidero tuj devis alfronti defion far la generalo Lavr Kornilov kiu entreprenis puĉon favore al la restarigo de la caro. Kerenskj devis sin turni al la bolŝevistoj petante ilian helpon kaj apogon kontraŭ la caristoj. Lenino revenis al Petrogrado kaj decidis la alsalton al la povo favore al la sovetoj. Tiu revolucio de oktobro (novenbro laŭ la Gregoria Kalendaro) trovis malgrandan reziston kaj komenciĝis la regado de la bolŝevistoj. Dum la sekvaj monatoj Lenin ordonis ke la rusaj armeoj metu finon al la batalado kaj deklaris sian volon negoci kun la germanoj por atingi la pacon. Kiam la delegitoj de ambaŭ landoj kunsidis en Brest-Litovsk, la lidero de la bolŝevista delegacio, Lev Trockij, intencis prokrasti la interakordon sin neante akcepti la germanajn kondiĉojn. La germanoj furiozis kaj daŭrigis sian avancadon internen en Rusio ĝis kiam Lenino instigis sian reprezentanton akcepti la germanajn postulojn, ju pli duraj ili estus. La germanoj, ja, klopodis ke ili estu kiel eble plej malmolaj.

1918: NEATENDITA MILITA FINREZULTO



Komence de la jaro 1918, eĉ kun la venko en la rusa fronto, Germanio statis malbonege de milita vidpunkto rilate al la ensemblo de ĝiaj malamikoj. La germanoj, ja, povis transloki 32 diviziojn el la rusa fronto al la okcidenta kaj tiamaniere certigi al si ioman superecon por atingi la finan venkon. Do, en monato marto de tiu jaro ili estis pretaj ataki en la okcidenta fronto.

Ĝuste la 3-an de marto kunsidis en Brest-Litovsk la germanaj delegitoj kun la rusaj prezidataj de Leo Trockij por interakordi la kondiĉojn de la repaciĝo inter siaj respektivaj landoj. Verdire, la “akordo” estis nenia interakordo, sed vera altrudo de la venkintoj, la germanoj, sur la rusoj. Laŭ la truditaj kondiĉoj, Rusio perdis Finnlandon, la polajn kaj baltajn teritoriojn, Ukrainion kaj parton el Kaŭkazio. Krome Rusio restis devigita pagi al Germanio enorman monkompenson. Fakte la kondiĉoj truditaj de Germanio al la rusoj estis multe pli duraj ol tiuj kiujn tiu lando suferis poste laŭ la Traktato de Versajlo. Sed ni vidu kiamaniere oni alvenis al tiu traktato kiu metis finon al la mondmilito kiel rezulto de la kompleta malvenko de la germanoj kaj la aŭstro-hungaroj.

La retiriĝo de Rusujo el la milito estis granda bato por la Aliancanoj ĉar de tiam la germanoj povis disponi je multenombraj trupoj kiuj ĝis tiam estis destinitaj en la orientaj frontoj. Tamen multaj soldatoj dizertis dum ilia irado tra Germanio kaj fariĝis fokuso de politika perturbo. Krome la reveno de la soldatoj kiuj estis kaptitaj en la rusa fronto alportis el tie la novecajn ideojn de la revolucio. Ilia influo tre efikis en la lasta etapo de la milito. Al ĉio-ĉi oni devas aldoni ke Ludendorff destinis milionon da soldatoj por kontroli kaj ekspluati la rusajn konkeritajn teritoriojn. Ĉiukaze, en la printempo de 1918 Germanio disponis je sufiĉe da trupoj por efektivigi detruan atakon al la malamiko antaŭ la alveno de la usona armeo al Eŭropo. Tia situacio montris alian rezulton de la milito, unu alian el la multaj ne atenditaĵoj de la disvolviĝo de tiu konflikto: la tiama Germanio estis tuta alia afero ol tiu de la lando kiu estis komencinta la militon en 1914; ĝi fariĝis militista diktaturo kun alvokiĝo konkeri imperion en la easto, io kio inspirus la postajn planojn de Hitlero.

Unu jaron antaŭ la eniro de Usono en la milito la militista povo de tiu granda lando estis ankoraŭ sensignifa. Ĝia regula armeo nombris nur 130.000 homojn kaj estis malbone ekipita kaj nesperta pri la moderna milito. La aerforto konsistis el eskadrono da malnovaj aviadiloj. Ĝi apenaŭ disponis je tankoj kaj havis malmulte da moderna artilerio. Tamen la mararmeo estis konsiderinda kaj kelkaj el ĝiaj kiras-ŝipoj kunlaboris kun la brita mar-ameo en la operacioj en la Atlantiko. La unua tasko estis rekruti, trejni kaj ekipi armeon por ĝin sendi al Eŭropo kaj tiucele la Prezidento Wilson tuj dekretis la devigan militist-servon. Dume oni entreprenis la rekonvertadon de la usona industria kapablo al la pormilita produktado. La Parlamento koncedis al la prezidento grandan ekonomian povon. Komence la interveno de la usonaj fortoj en Francio estis malgrava. La usona ĉefkomandanto, John Pershing, decidis ke siaj trupoj ne ekbatalus dum li ne havus sub liaj ordonoj unu milionon da soldatoj. Fine de la milito, pli ol du milionoj da usonaj soldatoj estis alveninte al Francio kaj tie ili decide rolis en la venko sur la germanoj. Iliaj perdoj estis 50.000 homoj.

En januaro de 1918, la prezidento Wilson prezentis siajn ambiciajn ideojn por la paco. Lia propono enhavis 14 punktojn malpermesante la sekretan diplomation, la doganajn barojn kaj la amasan armil-produktadon. Aliaj disponoj de tiu dokumento estis la navigadlibereco kaj la rajto je mem-determino de ĉiuj popoloj.


Wilson postulis ankaŭ establon de iu «ĝenerala asembleo de la nacioj». La germanoj, kiuj ankoraŭ konfidis atingi venkon, rifuzis la ideojn de la usona prezidento.
Kun Rusio for el la milito, Italio nekapabla plu batali kaj sen ia ajn sukcesa repaciganto, la okcidenta fronto nepre fariĝis la loko de la fina interfrontiĝo. Post la bataloj de la antaŭa vintro en Passchendaele kaj Cambrai, 98 francaj kaj 57 britaj divizioj staris kontraŭ 171 de Germanio. Tamen la Aliancanoj estis pli forte armitaj ol la germanoj; ili disponis po 1.084 mitraloj por ĉiu divizio dum Germanio havis nur 324; 18.500 kanonojn kontraŭ nur 14.000, 800 tankoj kontraŭ 10 de Germanio, 100.000 kamionoj kontraŭ nur 23.000. Rifuzinte la eblecon je pactraktado, kaj multe pli tiu de senkondiĉa kapitulacio, al Germanio restis du opcioj. Estis prikonsiderata unu el ili: Post la sendo ŭesten de la trupoj venintaj el la rusa fronto ili povus esti uzataj defensive kun paco-propono alloga por nur unu el la malamikaj potencoj. Al Francio povus interesi koncesiojn pri Alzaco kaj Loreno. Sed Ludendorff rifuzis ĉi tiun alternativon konsiderante la baldaŭan usonan intervenon en la milito kaj la britan blokigon ĉar tiuj faktoroj longatempe certigus nepran venkon de la Aliancanoj. Do, la germana ĉefkomandanto decidis uzi la fortojn venintajn el Rusujo por atingi militan venkon en la franca fronto. Oni pretigis specialajn taĉmentojn de sturmtrupoj kapablaj batali sen flanka apogo nek artileria helpo; se ili trovus reziston, ilia misio estus daŭre avancadi ĝis la malamika ariergardo lasante la reziston por la regulaj trupoj. Krome oni perfektigis la sistemon de bombardado de venenaj gasoj. La loko elektita por la germana atako estis Saint-Quentin celante meti kojnon inter la britaj kaj la francaj fortoj tie starigitaj. La germana ofensivo komenciĝis en monato marto per terura artileria bombardado sur la britaj trupoj. En la nordo la angloj rezistis sed sude ili devis retiriĝi al Amiens. Dum la unuaj del tagoj la germanoj avancadis 80 kilometrojn kaj preskaŭ sukcesis rompi la kontakton inter la britaj kaj la francaj fortoj. Kvankam oni sendis helpo-trupojn por ŝtopi la breĉon, la germanoj avancis ĝis iu distanco de 100 kilometrojn el Parizo kaj de tie ili povis bombardi 44-foje la francan ĉefurbon kaj okazigi centojn da homaj viktimoj. La Aliancanoj nomumis novan ĉefkomandanton, la marŝalo Ferdinand Foch, kiu sukcesis haltigi kaj poste inversigi la germanan atakon. La perdoj de la germanoj kaj la Aliancanoj estis similaj, proksim-ume milion-kvarono da homoj. Tuj fininte ĉi-tiun ofensivon la germanoj entreprenis novan pli norde, en aprilo, en Ipro, celante atingi, tra Flandrio, la havenojn de la Kalezo-markolo. En ĉi tiu batalo tre estis implikita la portugala ekspedicia trup-unuo kiu troviĝis tie ekde la antaŭa jaro post la milit-deklaro de Portugalio al Germanio en 1916. Pro ĝia nesufiĉa preparo por la moderna milito, tiu portugala korpuso suferis grandajn perdojn la 9an de aprilo kaj devis esti translokita al la ariergardo. La britoj devis cedi parton el la tereno pene gajnita dum la batalo de Passchendaele. La germanoj alvenis ĝis nur 35 kilometroj el Dunkirko, la ĉefa haveno de la mar-kolo. Por plifortigi tiun flandran linion estis necese sendi tien kromajn 10 francajn diviziojn. Sude de tiu fronta sektoro la britoj tre pene sukcesis kapti la urbon Amienon. La germanoj potence reagis kaj kaptis la urbeton Viller-Bretonneux distance 16 kilometrojn de Amieno, sed sekvinttage aŭstraliaj trupoj reprenis ĝin kaj tio metis finon al la germana impeto. Ludendorff devis meti finon al la ofensivo; la havenoj de la mar-kolo restis sub brita kontrolo spit' al la perdo de 109 miloj da germanaj soldatoj. Enormaj estis ankaŭ la perdoj de la aliancanoj: 76.000 britoj, 35.000 francoj kaj 6.000 portugaloj. Sed la germana ĉef-komandanto ne rezignaciis kaj planis novan ofensivon, 40-kilometrojn larĝa, laŭlonge de la rivero Aisne, inter Soissons kaj Reims. Ĉi tiu nova kaj lasta germana ofensivo komenciĝis en monato majo. Post rompi la fronton, la germanoj transiris la riveron kaj avancis direkte al la Marne-rivero. Dum la sekvintaj tagoj la germanoj avancis 64 kilometrojn alvenante ĝis malpli ol 100 kilometrojn el Parizo. Sed tiam la germanaj trupoj troviĝis jam distance 144 kilometroj de ĝiaj fervojaj linioj kaj devis operacii sen regula provizado de nutraĵoj, akvo kaj municio. La celoj kapti Parizon kaj/aŭ forpeli la britojn al la maro fiaskis. La germana avanco estis fine haltigita en Chateau-Thierry meze de julio far la francoj kaj la usonanoj. Tiam Foch ordonis amasan kontraŭatakon kiun signis la komenciĝon de la germana retiriĝo. Post la perdo de duonmiliono da homoj en la tri ofensivoj de ĉi tiu jaro kaj tre malgrandigita proviz-kapablo, la spiritforto de la germana armeo disfalis. Male, en la flanko de la Aliancanoj, per la alveno de 300.000 usonaj soldatoj ĉiumonate kreskis la sento pri baldaŭa fina venko kaj fine de aŭgusto la iniciativo estis tute ilia. Ili sukcesis rompi la germanan fronton per la uzado de tankoj kaj operaciante en serio da interkonektitaj ofensivoj. Sen troa perdo siaflanke, la Aliancanoj devigis la





germanojn retiriĝi denove malantaŭ la linion Hindenburg kie estis startinte la ofensivo de 1918. La 12an de septembro la usonanoj atakis la elstarangulon sude de Verduno kaj kaptis 15.000 prizonulojn kun perdo de nur 7.000 homoj. Tiam komenciĝis la fina ofensivo. Sude, la francoj kaj la usonanoj atakis laŭlonge de la Mosa-rivero kaj tra la arbaro de Argonne dum en la nordo la britoj kaj la kanadanoj reigis la atakadon en la elstarangulo de Ipro. La batalo en la sektoro de Argonne estis granda trivo-kampanjo kiun la usonanoj povis elteni sed jam ne plu la germanoj. En tiu batalo intervenis 22 usonaj divizioj, 324 tankoj kaj 840 aviadiloj. Tial ke la pinĉo-forma moviĝo minacis ĉirkaŭi la germanajn trupojn, ĉi tiuj devis retiriĝi. La Aliancanoj kaptis la Hindenburg-linion kaj Ludendorff komencis kulpigi la politikistojn kiuj perceptis ke estis necesa iu armistico.





Ankaŭ en aliaj frontoj la aferoj disvolviĝis domaĝe por la koalicio de la centraj imperioj. Tial ke, okaze de la printempa ofensivo de la germanoj en Francio oni devis tien transloki britajn fortojn el Palestino, Allenby devis atendi ĝis septembro por entrepreni la operaciojn kontraŭ la turkoj. Tiam li reigis la ofensivon kaj atingis gravan venkon apud la antikva fortreso de Meggido kio permesis al li rapide avanci direkte al Damasko kaj kapti la urbon Aleppon. La antaŭan jaron, profitante la rusan ĥaoson, la turkoj estis lanĉintaj ofensivon en la Kaŭkaso. Ili trovis tie malgravan reziston far la armeo de armenianoj kaj rusoj kaj kaptis la urbon Erzurumon. La germanoj timis ke la turka avanco igus ke la rusoj revenu militi kaj por tion eviti ili sin oferis kiel peranto por krei la sendependan ŝtaton de Gruzio sub germana kuratoreco kaj protekto. La turkoj protestis sed ne defiis tiun interakordon kaj adresiĝis al la naftoprodukta regiono de Bakuo, en la Kaspia maro. Usono ne akceptis la britan planon kontroli la kreadon de iu armenia ŝtato. Sen internacia protektanto tiu ŝtato rezultis neebla.


Dume en la balkana regiono disfalis la bulgara rezisto. En la batalo de Kebar la serboj rompis la bulgarajn liniojn kaj ĉi ties registaro kapitulacis, kio permesis al la britaj trupoj en Saloniko adresiĝi al Istambulo. La turkoj estis kuraĝe batalinte sed ne povis kontraŭfronti la trupojn de la Aliancanoj kiuj avancadis nehaltigeblaj en ĉiuj frontoj. La turka registaro sin vidis devigata kapitulaci, kaj la 30an de oktobro estis subskribita, en la insulo Lemnos, la armistico per kiu la turkoj rezignis la fortresojn kaj permesis al la Aliancanoj kontroli la mar-vojojn de Dardaneloj kaj Bosforo.

Siaflanke al la italoj estis necesa ia venko por forviŝi la honton de Caporetto kaj kapabli ludi ian rolon en la pac-traktado. En oktobro de 1918, subkomande de Armando Diaz kaj kun la apogo de britaj kaj francaj trupoj, la italaj armeoj entreprenis ofensivajn operaciojn. La aŭstrianoj, kvankam tiam jam ne havis germanan apogon, firme rezistis, sed fine ili devis retiriĝi de la Piave-rivero al la Tagliomento-rivero, kie poste la fronto disfalis kaj devis retiriĝi al Vittorio-Veneto, kie, finfine, la italoj atingis decidan venkon per la kapto de 30.000 aŭstriajn prizonuloj venĝante tiele sian fiaskon en Caporetto. La aŭstro-hungara registaro mendis armisticon, kiun oni subskribis la 4an de novembro.

Dum tiuj monatoj de 1918 kiam la germanaj armeoj senĉese suferadis malvenkojn, la ekonomia ĥaoso kaj la politikaj perturboj pligrandiĝis en la lando. Krome, baldaŭ etendiĝis tra Eŭropo grava epidemio de gripo kiu okazigis milojn da viktimoj. En unu sola tago en septembro mortis en Berlino ne malpli ol 1.700 personoj. La 28an de tiu monato Ludendorff agnoskis antaŭ la germana registaro ke la milito estis perdita kaj ke estis necesa iu armistico, sed kulpigante pri la malvenko liaj subulojn kaj la landan mar-armeon. La Aliancanoj rifuzis intertrakti kun la germanaj militistaj lideroj, kaj pro tio estis nomumita kanceliero la princo Max von Baden, iu liberalulo kun tre bona reputacio kiu intencis pactrakti kun Usono surbaze de la 14 postuloj de la Prezidento Wilson. La respondo de la usona ŝtatestro estis postuli la germanan retiriĝon el la okupitaj teritorioj kaj insisti ke li ne pactraktus kun la kajzero. Kvankam Ludendorff plu volis milite rezistti, Von Baden proponis al la Kajzero ke li abdiku, sed ĉi tiu rezistis kaj dume Ludendorff profitis la okazon por sin senkulpigi kulpigante la politikistojn pri la malvenko. Tiam aperis la fama frazo «surdorsa ponard-piko» kiu de tiam ludis gravan rolon en la disvolviĝo de la germana revenĝemo kiu generis la naziismon. La ideo kiun enportis tiu frazo estis ke la socialistoj, la liberalistoj kaj la judoj alprenis la politikan povon kaj malfermis la pordon al la malamikoj de la lando. Tiu legendo enradikiĝis en la menson de la germanoj preparante la terenon por la politikaj eventoj de la sekvaj jardekoj kaj por dua mondmilito post dudek jaroj.

La kajzero Vilhemo la 2-a devis konstati ke unuafoje post pli ol unu jarcento Germanio perdis unu militon

kaj ke tio alportis la finon de lia reĝado. Ja, la intertraktado de la armistico kun la Aliancanoj postulis la ĉeson de monarkio en Germanio. Iu revolucia procezo, sufiĉe simila al tiu de Rusio, kondukis al la proklamado de la Respubliko. Post lia abdiko, la kajzero ekziliĝis en Nederlandon. Simila politika renversiĝo okazis en la Aŭstro-hungara imperio: la Nacia Asembleo proklamis la Respublikon en Vieno. En Prago, la 29an de oktobro estis proklamita la Ĉeĥoslovakia Respubliko, naskiĝis ankaŭ iu hungara ŝtato kaj ekkonkretiĝis la formado de Jugoslavio. La 7an de novembro la germanaj delegitoj kaj tiuj de la Aliancanoj kunvenis en iu fervoja vagono proksime al Compiègne por precizigi la detalojn de la armistico. Sed kiel kutime okazas en tiaspecaj intertraktadoj, estis nenia interakordo sed la nura esprimado de la postuloj kaj altrudoj de la venkintoj (**Ve a la venkitoj**!). Oni donis al la germanoj nur 72 horojn por akcepti la packondiĉojn: retiriĝo el la teritorioj okupitaj de Germanio, eĉ tiuj de Rusujo, transdono de 5.000 kanonoj, evakuado de la maldekstra flanko de la Rejno-rivero, malpermeso fari detruaĵojn en la francaj teritorioj evakuitaj, redono de 5.000 lokomotivoj kaj 15.000 vagonoj samkiel aliaj dummilitaj rabaĵoj, kapitulaco de la germana mar-armeo… Pli postulemaj pri tiuj kompensoj estis la francoj ol la britoj kaj la usonanoj. La armistico komenciĝis la 11an de novembro 1918, 1.597 tagojn post la morto de la arkiduko Francisko-Ferdinando en Sarajevo.



Dum en la batalintaj landoj oni festadis la finon de la konflikto, en iu germana militista hospitalo la kaporalo Adolf Hitler estis malbenante la humiligon de Germanio kaj revante la rolon kiun li povus ludi por la refortiĝo de tiu lando. Lia revenĝemo estis kontaĝita dum la sekvaj jaroj al multaj germanoj. Post la milito, la "interakordita" paco kaj la ekonomia krizo certigis ke la ĥaoso kaj malstabileco fariĝu la natura situacio de la mondo. La antaŭmilita stabileco estis enuo-kialo por multaj personoj, sed post 1918 la ĥaoso kaj necerteco igis ke la ordo kaj la stabileco rezultu tre alloga por multaj personoj, kio estis poste profitita de la radikalaj movadoj de ekstremdekstraro.

Inter majo de 1919 kaj aŭgusto de 1920 oni subskribis la plej gravajn traktatojn inter la batalintaj landoj. La ĉefa el ili estis tiu de Versajlo la 18an de majo de 1919, kiu estis trudita al Germanio kaj per kiu oni atingis, laŭsupozite, la milit-finon kaj la alvenon de la paco. Estis gravaj ankaŭ la traktatoj de Saint-Germain kaj Trianon, subskribitaj la 10an de septembro de 1919 kaj 4an de junio de 1920, truditaj, respektive, al Aŭstrio kaj Hungario, kaj kiuj signis la politikan nuligon de la Aŭstria-Hungaria imperio. En aŭgusto de 1920 oni subskribis la traktaton de Sevres kiu, kune kun tiu de Neŭlly, de 1919, finkompletigis la dismembriĝon de la Turka imperio, dum Sirio restis sub la kontrolo de Francio kaj Palestino kaj Irakio subkontrole de Britio.

Por certigi la pacon naskiĝis, laŭ propono de la usona prezidento Wilson, la Asembleo de Nacioj, kiu havis sian sidejon en Ĝenevo (Svisio) kaj pluvivis ĝis la jaro 1945. Ĝi atingis sukceson en iuj konkretaj aferoj, sed fiaskis en la celo certigi pacan tutmondan ordon.

Bilanc-maniere, ni povas konkludi ke la venko de la venkintoj tiel estis multekosta kaj amara kiel la malvenko de la venkitoj. La fina rezulto de la milito estis plena je ne-atenditaĵoj. Plenumiĝis neniu el la celoj de la batalintoj de ambaŭ interkontraŭantaj blokoj. La konflikto okazigis ekonomiajn perturbojn, socian malbonstaton kaj ian pliiĝon de la priideologia aktivismo kiu erodis la bazon de la eŭropa liberalismo. Jam antaŭ 1914, la hegemonio de la regantaj elitoj troviĝis subminace: la ekonomia modernigo, la industriigo kaj la sekularigo estis renversigante la tiaman politikon kiu estis elitisma kaj klientisma. Pli ol milito inter nacioj, tiu konflikto estis kontraŭfrontiĝo inter la malnova mondo agonianta kaj la nova ankoraŭ ne naskiĝinta. La fino de la milito surprizis la Aliancanojn sen ia ajn organizita plano por la paco, kio efikis malfavore sur la posta rezulto de la afero. Estis sufiĉe da malakordo inter la venkintaj potencoj pri la puno kiun oni devus altrudi al la germanoj. Speciala kazo estis tiu de Italio kiu, estante inter la venkintoj, konsideris ke ĝi estis traktita kiel venkita. Ĉi tiu cirkonstanco estis kaŭzo de la posta apero kaj progreso de la faŝisma movado de Mussolini, alia grava neatenditaĵo kiu tre kondiĉiĝos la karakteron de la postmilitaj okazintaĵoj kaj la evoluon de la situacio en Eŭropo.

Revenante al la sekvoj de la Granda Milito, pli notinda fakto estis la granda detruo kiun tiu konflikto okazigis, ĉefe en Eŭropo. Oni kalkulas ke mortis, sekve de la militaj operacioj, preskaŭ 9 milionoj da homoj, plejparto el ili en Rusujo, Germanio kaj Francio, kaj krome estis kvin milionoj da vunditoj, el kiuj multaj el ili restis dumvivaj mutilitoj, kaj dum la militaj jaroj tre malgrandiĝis la nombro da naskiĝintoj.

La militaj jaroj lasis tre damaĝita la eŭropan ekonomion kaj la unuaj postmilitaj jaroj karakteriziĝis pro ia krizo je subproduktado, elĉerpiĝo de la stokoj de krudmaterialoj, manko je kemiaj sterkoj, eluzo aŭ eldetruo de mekanismaj ekipaĵoj, senorganizo de la transportado kaj malabundo je labor-fortoj.

Eble la plej neatendita rezulto de la milito estis la profunda transformiĝo de la politika mapo de Eŭropo kaj Mez-Oriento. Disfalis kvar grandaj imperioj: Aŭstrio-Hungario, Germanio, Rusio kaj Turkio, kaj el iliaj teritoriaj perdoj formiĝis novaj landoj. Germanio devis cedi al Francio la regionojn de Alzaco kaj Loreno, al Polujo la prusajn provincojn kun pola loĝantaro, al Danlando la regionon de Schlesweig, kaj al Belgio la

etajn teritorioj de Eŭpen kaj Malmedy. Rusio definitive forlasis ĝiajn polajn teritoriojn kaj ankaŭ la baltajn landojn: Estonio, Latvio kaj Litovio. El la dispartiĝo de la eŭropaj imperioj naskiĝis naŭ novaj landoj, tio estas, krom la jam menciitaj, ankaŭ: Polujo, Danlando, Ĉeĥoslovakio, Aŭstria Respubliko, Hungario kaj Jugoslavio. Sufiĉas kompari la ĉi-ĉapitran mapon de la milita rezulto kun tiu de antaŭ la konflikto, kiu aperas en alia ĉapitro de ĉi tiu raporto, por konstati kiom multe ŝanĝiĝis la politika geografio de la kontinento okaze de la Granda Milito. Neniel povis imagi, en 1914, la regantoj de la landoj tiam ekmilitantaj, ke tia estus la rezulto de ilia iniciato. Se la venkitaj imperioj disfalis kaj malaperis, ankaŭ por la venkintaj potencoj estis ruiniga la milita rezulto. Ni jam vidis la kazojn de Italio kaj Rusio, sed ankaŭ por Britio kaj Francio la afero estis domaĝa: iliaj koloniaj imperioj komencis dekadenci tiam.

Se la militaj rezultoj ne povis esti antaŭvidataj en 1914, la rezulto de la paco komenciĝinta en 1918 estis tute alia ol pensinte tiam. Ja, estis kutima diraĵo, jam ekde la milito mem, ke tiu konflikto estis la milito kiu metus finon al ĉiuj militoj. Tamen, post nur 21 jaroj komenciĝis dua mondmilito, kaj en la periodo inter ambaŭ konfliktoj estis aliaj lokaj militoj, iuj el ili tre gravaj, kiel la hispana civil-milito. Kaj la semoj de ĉiuj ĉi postaj konfliktoj estis metitaj ĝuste en la pac-traktado de 1918. La disponoj de Traktato de Versajlo provokis la venĝemon de la popoloj de la mutilitaj imperioj kaj la venkitaj landoj. La popolaj sentoj de frustracio konkretiĝis en du politikaj movadoj respektive interkontraŭantaj: la faŝismoj kaj la socialistaj reĝimoj kiuj aperis subinflue de la Revolucio kiu venkis en Rusujo en 1917.

Rimarkindas ke, mondskale, la Unua Mond-Milito konfirmis la progresivan dekadencon de la eŭropa okcidento kaj la definitivan promociiĝon de du novaj potencoj: Usono kaj Japanio; tio estas, la transiron de la gravito-centro for de Eŭropo. Usono, provizinto de la interbatalantoj dum du jaroj kaj duono, plikreskigis la ritmon de sia industria provizado kaj kvarobligis la tonelaron de sia komerca ŝiparo, atingante dum la militodaŭro ian pluson de la Bilanco pri Komercado egala al tiu de la tuta periodo inter 1787 kaj 1914. Ĝi posedis tiam, fine de la milito, duonon el la tutmondaj rezervoj el oro kaj estis pruntinta al Eŭropo 10.000 milionojn da usonaj dolaroj.


En Eŭropo, la milito sukcesis detrui por ĉiam la bazojn de la politika ekvilibro de la kontinento. Celante interpreti la koleron de la germanoj kiel atesto de sia venko, la Aliancanoj ne perceptis ke ili estis perdante la pacon en la sama momento kiam ili estis gajnante la militon. Verdire, la milito finiĝis laŭ la eble plej malbona maniero. La germanoj ne agnoskis sian malvenkon. La usonanoj insistis ke la venko estis sia kaj, tamen, la usonaj izolistoj rifuzis ratifi la pactraktaton. La francoj insistadis ke la venko estis nur sia, dum la britoj venis al la konkludo ke la tuta konflikto estis senutila kaj krima. La Aliancanoj penis trafi kontraŭdirajn celojn; puni agreseman malamikon dum oni intencis kvietigi ĝin, atingante neniun el ambaŭ celoj. La armistico de 1918 metis finon al la arma konflikto, sed en la mondo prezentiĝis ia nova tipo je ideologia interbatalado. Post sukcesi en Rusio, la komunismo komencis etendiĝi tra tiuj socioj desperitaj far la milito, komenciĝante tiele la plej intensa periodo de revolucia aktivado travivinta en Eŭropo ekde 1848. La jaroj de mizero stimulis la revolucian aktivismon, kondukante al la disfalo de la formoj de elitisma politiko kiuj estis validaj ĝis tiam.



Unua Mond-Milito



LA PROTAGONISTOJ



Pri du ĉef-roluloj de la milito, la aŭstria imperiestro kaj la rusa caro, ni jam prezentis biografian recenzon en ĉi raporto. Ni volas prezenti ankaŭ, eĉ se tre koncize, aliajn gravajn personojn en rilato kun la milito. La listo devas esti nekompleta ĉar multe-nombras la nomoj kiuj rajtas aperi en tiaspeca menciado. Sed, se tro abundas la men-ciindaj personoj, kies nomon oni konas, rol-intaj en la Granda Milito, konsiderinde pli granda estas la homamaso kiu batalis, suferis, mor-tis… en tiu konflikto. Cele memori kaj honorigi ilin oni kreis, ĝuste post ĉi tiu milito, la figuron kaj koncepton de la "Nekonata Soldato", al kiu oni dediĉis monumentojn en ĉiuj landoj. Estu, do, nia unua memoraĵo al tiuj sennomaj ne-volontaj herooj de tiu kruela kaj senutila milito.





Alberto la 1-a (1875-1934)

Reĝo de Belgujo ekde la morto de Leopoldo la 2-a en jaro 1909. Li ne konsentis ke la germanaj trupoj trairu Belgion cele invadi Francion. Tre kapabla de militista vid-punkto li organizis la defendon de la lando kontraŭ la germana invado en 1914 ko-mandante la belgan armeon en la batalo de Izero (Yser). En 1918 li komandis liajn tru-pojn en la batalo de Kortrejko (Courtrai).



Allemby, Siro Edmund (1861-1936)

Li komandis kavalerian divizion en la okcidenta fronto. Pro lia fiasko en la batalo de Ara-so (Arras) li estis sendita al la fronto en Palestino. Lia venko sur la turkoj en Gazao en 1917 ebligis la kapton de Jerusalemo la 9an de septembro de tiu jaro, kaj lia venko en Megido (19a-21a de septembro de 1918), kune kun la okupado de Damasko kaj Alepo, metis finon al la turka povo en Sirio. Lia sukceso iomgrade rezultis de lia lerta uzado de la kavalerio atingante famon kiel la lasta granda brita militisto de la rajdo-trupoj.



Balfour, Arthur (1848-1930)

Brita ĉefministro inter 1902 kaj 1096. Dum la milito li estis nomumita Unua Lordo de la Admiralitato, anstataŭnte Churchill-n en majo de 1915. Poste li rolis kiel Ministro pri Eksteraj inter 1916 kaj 1919 Aferoj. En tiu posteno, li impulsis la t. n. «Deklaracio Balfour», per kiu oni apogadis la cionistajn depostulojn cele krei judan ŝtaton en Palestino.



Beatty, Siro David (1871-1936)

Brita admiralo. Dum la milito li komandis la Unuan eskadronon de Kiras-ŝipoj kaj partoprenis en la bataloj de Heligolando (1914), Dogger-Bank (1915) kaj Jutlando (1916). En ĉi tiu lasta, lia agresemo kaj decidemo kontrastis kun la antaŭzorgoj de la komandanto de la floto, admiralo John Jellicoe, kiun li anstataŭis poste en tiu sama jaro. En tiu rolo li estis la responsulo akcepti la kapitulacion de la germana militista floto fine de la milito.



Brusilov, Alexei (1853-1926)

Li estis la plej kompetenta el la rusaj generaloj. En Septembro de la jaro 1914 li sukce-se kontraŭfrontis la aŭstro-hungarojn avancantajn en la Karpatoj, sed en la somero de 1915 lia armeo estis forpuŝita el Polujo. En junio de 1916 li lanĉis la t. n. «Ofensivon Brusilov-n» sur Galicio en kiu estis milit-kaptitaj 375.000 malamikaj soldatoj, sed la ofensivo ne rezultis sukcesa pro manko de apogo. En 1917, estante ĉefkomandanto de la rusaj armeoj, li gvidis novan ofensivon en Galicio sed fiaskis, perdante la ko-mandon. Li servis dum la bolŝevika regado kiel milit-konsilisto.

Cadorna, Luigi (1850-1928)
Itala generalo. Li lanĉis homamasajn atakojn kontraŭ la trupoj de Aŭstrio-Hungario en la Alpoj, sed atingis nur egajn fiaskojn en siaj sinsekvaj provoj rompi la fronton. Malamata de siaj samarmeanoj, por li gravis nenion la grandnombro da homaj perdoj. Lia sola venko okazis en Gorizio, nuna Slovenio, en la jaro 1916, kiam la italaj fortoj penetris kelkdekon da kilometroj en austria-hungaria teritorio. Responsulo de la milita katastrofo de Caporetto, li estis anstataŭita de la pli kapabla generalo Armando Díaz (1861-1928).Poste li estis nomumita kampo-marŝalo far Mussolini.




Castelnau, Edouard (1851-1944)
Stabestro de la franca generalo Joffre. Lia agado en septembro de 1914 igis lin gajni la titolon «Savinto de Nancio». Li gvidis la ofensivon de Ĉampanjo en septembro de 1915. Dum la daŭro de kelkaj tagoj post la 15-a de tiu monato li kaptis 25.000 germanajn prizonulojn kaj 125 kanonojn. En februaro de 1916, plu servante en la stabejo de Joffre, li organizis la defendon de Verduno. Kiam okazis la armistico de 1918, kiu metis finon al la milito, li estis komandante la grupon da armeoj pretaj efektivigi la ofensivon de Loreno, kiun fine ne estis necesa.



Curchill, Winston (1874-1965)
Li estis ĉefministro de Britio de 19140 al 1945, dum la Dua Mond-Milito, kaj poste ankaŭ de 1951 al 1955. Dum la Unua Mond-Milito, li, kiel Unua Lordo de la Admiralitato li partoprenis en la planado de militiro de gallipoli, kiu rezultis katastrofa. Post la fiasko de tiu milita operacio, kiun li patronis li estis demitita de tiu registara posteno li servis dum mallonga tempo kiel komandanto de la 6-a Bataliono de la Reĝaj Skotaj Fuzilieroj, sed poste li revenis al registarj roloj ĝis la fino de la milito.



Clemenceau, Georges (1841-1929)
Franca politikisto. Je la komenciĝo de lia politika kariero oni alnomis lin «la tigro» pro lia feroco kontraŭ la ministroj de la sinsekvaj registaroj. Komence la milito li daŭre estis en la opozicio, sed oni nomumis lin ĉefministro en novembro de 1917 restarigante la konfidon pri la gvidado de la milito per aŭtoritatecaj metodoj.
Li estis unu el la ĉefroluloj de la packonferenco de Parizo, kie li postuladis severe puni Germanion.



Falkenhayn, Erich (1861-1922)
Germana generalo de infanterio. Li estis ministro pri Milito ekde 1913 kaj sukcedinto de Von Moltke kiel ĉestabestro ekde de septembro 1914 al aŭgusto 1916. Li ege subtaksis la kapablon rezisti de la franca armeo je la planado de la atako al Verduno. Lia malsulceso igis ke Hindenburg kaj Ludendorff anstataŭu lin ĝis la fino de la milito kaj la malvenko de Germanio.
Li partoprenis, en 1916 kaj 1917, en la kampanjo de Rumanio kaj konkeris kaj okupis Bukareston.



Foch, Ferdinand (1851-1929)
Franca generalo. Komenciĝinte la Unua Mond-Milito li alprenis la gvidon de la 30-a Armea Korpuso en Nancio. Li haltigis la avancon de la germanaj fortoj dum la Printempa Ofensivo kaj en la Dua Batalo de Marne-rivero, en julio de 1918. Tiucele li lanĉis la ofensivon liun konstituis la embrion de la venko sur Germanio. Tiam li estis nomumita Marŝalo de Francio kaj akceptis la germanan kapitulacion en novembro.
Li esprimis sian malakordon kun la Traktato de Versajlo asertante ke ĝi ne estis pactraktato sed armistico por dudek jaroj.



Francisko Ferdinando (1863-1914)
Nevo-nepo de la imperiestro Francisko Jozefo kaj habsburga arkiduko de Aŭstrio samkiel heredonto de la Aŭstria-Hungaria trono. La atenco en kiu mortis li kaj lia edzino, fare de Gavrilo Princip en Sarajevo la 14-an de junio de 1914, okazigis la aŭstrian milit-deklaron al Serbio, kio fariĝis komenco de la Unua Mond-Milito.
Li estis espriminta sian volon malcentralizi la Imperion kaj doni pli grandan aŭtonomion al la diversaj naciecoj kiuj konstituis ĝin.





French, Siro John (1852-1925)
Brita kamp-marŝalo. Li estis elektita ĉefkomandanto de la Brita Ekspedicia Forto kimence de la Unua mond-Milito. Oni akre kritikadis lin pro lia hezitema lidereco en Ipro, Belgio, kiu okazigis grandnombron da britaj perdoj. Oni igis lin demisii en 1915 kaj anstataŭis lin Douglas Haig. Liaj postaj armeaj roloj okazis en Britujo sen rilato kun la milito. En 1916 li komandis la subpremadon de ribelo en Irlando. En 1922 oni aljuĝis al li la titolon de grafo de Ipro.



Gallieni, Joseph Sumon (1849-1916)
Franca militisto kies kariero disvolviĝis ĉefe en la 19-a jarcento. Li emeritiĝis ĝuste en la jaro 1914, malmultajn monatojn antaŭ la komenciĝo de la Unua Mond-Milito. Oni alvokis lin reveni al la armeo kaj oni nomumis lin Milita Guberniestro de Parizo por la defendo de la ĉefurbo antaŭ la Marne-batalo, al kies venko li kontribuis per la sendo de trupoj. En 1915 li estis nomumita ministro pri Milito sed demisiis en 1916 pro malsano. Li mortis en majo de tiu jaro.



Georgo la 5-a (1863-1936)
Reĝo de Britio ekde 1010. Dum la Unua Mond-Milito li, respektante la limojn kiujn la leĝoj metis al la rolo de la britaj monarkoj, intervenis nenion en la militaj aferoj kaj ne agadis favore al la germana kajzero, kiu estis parenco lia. Pro la kontraŭ-germana sento en la lando, generita de la milito, li ŝanĝis nomon de la dinastio, kiu ĝis tiam estis: Saksio-Koburgo kaj Gotao. Edde 1917 la nomo de la dinastio estas Windsor. Post la milito, dum lia reĝado vekiĝis la naciismo de Irlando kaj Hindio,



Haig, Douglas (1861-1928)
Elstara militisto de la Brita Imperio. Komence de la Mond-Milito li komandis, subordone de French, la Britan Ekspedician Forton en Belgio cele bloki la pasadon de la germana armeo al Francio. Poste li anstataŭis French-n en la komando de tiu armeo en la francaj frontoj de la Somme kaj Paschendaele. Pro liaj militaj meritoj oni nomumis lin kamp-marŝalo en 1917.
En la lasta etapo de la milito li atingis sian plej gravan venkon per la kapto de 188.700 germanaj soldatoj kaj 2840 kanonoj.



Hindenburg, Paul (1847-1934)
Germana generalo. Estante 63-jaraĝa, li emeritiĝis en la jaro 1911. Sed komence de la milito li estis alvokita por komandi la 8-an Armeon en la orienta fronto. Tie li venkis la rusan armeon en la batalo de Tannenberg (1914). En 1916 li rolis, apud Erich Ludendorff, en la Plejalta Stabo de la germana armeo.
En 1918, kiam la situacio estis neeltenebla por Germanio, li, cele savi la monarkion, konsilis la kajzeron forlasi la landon. Poste demisiis li kiam oni subskribis la Traktaton de Versajlo, kun kiuj kondiĉoj li malakordis.



Joffre, Joseph (1852-1931)
Franca generalo. En 1911 li estis elektita estro de la Plealta Stabo de Francio. Kune kun Ferdinand Foch, li dezajnis la t. n. 17-an Defendo-planon. Dum la germana invado en 1914 li komandis la francajn Armeojn 9-an kaj 10-an en la batalo de la Marno. En tiu rolo anstataŭis lin poste Joseph Gallieni.
Post la malbonaj rezultoj por Francio en 1915 kaj 1916, kaj ĉefe en la batalo de Verduno, Joffre estis anstataŭita de Robert Nivelle.



Kemal *Atatürk*, Mustafa (1881-1938)
Turka militisto. Iomete post la interveno de sia lando en la Mond-Milito li fariĝis kolonelo kaj batalis kontraŭ la trupoj de la Brita Imperio en Galipolo. Post lia brila servado en tiu batalo, en 1916 li estis promociita al la rango de generalo kaj sendita al la fronto de la Kaŭkazo. En 1918 li gvidis la turkan retreton post la malvenko en Megido. Post la milito, en la krizo de la Turka Imperio li lideris movadon por la modernigo de la ŝtato kaj estis la unua prezidento de la Turka Respubliko.

Kerenskij, Alexandr (1881-1970)
Rusa politikisto. Li apogis la intervenon de Rusio en la Unua Mond-Milito, sed baldaŭ seniluziiĝis kaj en februaro de 1917 apogis la abolicion de la monarĥio.
En la periodo inter la revolucioj de februaro kaj oktobro de tiu jaro li ludis gravajn politikajn rolojn ĝis fariĝi la ĉefreganto de la lando. De lia reganta posteno li plu apogis la partoprenon de Rusujo en la milito kontraŭ la teniĝo de la bolŝevistoj de Lenin. Post la revolucia venko de la bolŝevistoj li devis forlasi la povon kaj poste ankaŭ la landon kaj ekziliĝis por la cetero de lia vivo.



Kitchner, Horatio Herbert (1850-1916)
Grava brita militisto kaj politikisto, irland-devena. Post multjara partopreno en la koloniaj militoj de la Brita Imperio, komence de la Mond-Milito li estis nomumita Ŝtat-Sekretario pri Milito. Post la malsukceso de la milita operacio en Kalipolo, kiun li estis proponinta, lia prestiĝo malpliiĝis, tamen oni ne akceptis la demision kiun li prezentis. En 1916 li adresiĝis perŝipe al Rusio por iu diplomatia misio, sed la 5an de junio la ŝipo dronis por min-eksplodo kaj pereis plajparto el la 650 personoj kiuj ĝi portis, inter ili Kitchner.



Konstantino la 1-a (1868-1923)
Reĝo de Grekujo de 1913 al 1917 kaj de 1920 al 1922. Post liaj sukcesoj en la Balkanaj Militoj kiuj ebligis ampleksigi la grekan teritorion, lia apogo al la centraj imperioj dum la mondmilito kaj lia konfrontiĝo kun la ĉefministro Eleftherios Venizelos provokis rompiĝon en la greka socio kaj pro tio li ekziliĝis en 1917. Reveninte en 1920, la popola malkontento pro la greka fiasko en la milito kontraŭ Turkio (1919-1922) devigis lin ekziliĝi denove en 1922. Li mortis en 1923 en Italio.



Lawrence *Lorenco de Arabio*, Thomas Edward (1888-1935)
Specialisto pri araba lingvo kaj kulturo. Post la ekpartopreno de la Otomana Imperio en la mondmilito li aniĝis en la brita sekreta servo en Kairo. Kiam en 1916 Husejn, ŝarifo de Mekao, ribelis kontraŭ la otomana sultano, Lawrence estis sendita kiel komunika oficiro al Fajzal, filo de Husejn. Li subtenis gerilecan militon kontraŭ la turkoj ĝis la armistico en 1918. Li iĝis ano de la Honora Legio.




***Lenin*, Vladimir Ilich Ulianov (1870-1924)**
En februaro de 1917 la revolucio metis finon al la regado de la rusa caro. Poste la revolucia aktivulo Lenin revenis el ekzilo kaj postulis la pliprofundigon de la revolucio por preterpasi la burĝan etapon cele ekkonstrui la socialismon. Li sukcese gvidis en oktobro de tiu jaro la konkeron de la povo far la bolŝevistoj. Sed tuj post tiu atingo li devis alfronti, kiel nova reganto de Rusio, la problemaron de la partopreno de tiu lando en la mondmilito. Li subskribis pactraktaton kun la germanoj.



Lettow-Vorbeck, Paul (1870-1964)
Germana militisto. Dum la Granda Milito li komandis la kampanjon de la trupoj de Germanio en la kolonio de tiu lando en Orienta Afriko, la sola kolonia fronto kie lia lando ne estis venkita. Kun malabundaj militistaj fortoj li ne nur sukcesis rezisti la atakojn de la Aliancanoj sed krome li venkis ĉi tiujn en multaj okazoj, ofte pere de gerilecaj batal-formoj. Nur kiam oni efektivigis en Eŭropo la germana kapitulacio konsentis Lettow-Vorbeck rezigni sian bataladon.



Lloyd George, David (1863-1945)
Brita politikisto de la liberalisma partio. Kiel ministro pri Financoj li demarŝadis la britan ekonomion por alfronti la necesojn de la mondmilito. De 1915 al 1916 li rolis kiel ministro pri Municioj. Post la demisio de la ĉefministro Herbert Henry Asquith (1852-1928) en decembro de 1916, Lloyd George anstataŭis lin prezidante koalician registaron ĝis 1922. Do, lia regado ampleksis la militan venkon sur Germanio, la Traktaton de Versajlo kaj aliajn eventojn gravajn por lia lando, kiel la sendependiĝo de Irlando.





Ludendorff, Erich (1865-1937)
Germana generalo. Kiam komenciĝis la Mond-Milito li estis subordone de Karl von Bülow en la sieĝo al Lieĝo kaj poste li efike kunlaboris kun la generalo Hindenburg en la orienta fronto. Kun Hindenburg kiel ĉefo de la Plejalta Stabo ekde aŭgusto de 1916, li kunlaboris en la planado de la germanaj ofensivoj, ĝenerale malsukcesaj, de la lastaj jaroj de la milito. Post la finiĝo de la milito li ekziliĝis al Svedio. Reveninte al Germanio en 1920, li partoprenis en la politikaj eventoj de la evoluo de la germana socio al la nazismo.



Mackensen, August (1849-1945)
Germana marŝalo de la Unua Mond-Milito. Li partoprenis en la bataloj de Gumbinnem kaj Tannenberg, ambaŭ en 1914, kaj transprenis en aprilo de 1915 la komandecon de la unuigita germana-aŭstra 11-a Armeo en Galicio. Sub lia komando tiu armeo faris grandan trarompon de la fronto inter Gorlice kaj Tarnów. Post aliaj sukcesaj bataloj li venkis ankaŭ la rusojn ĉe Brest-Litovsk kaj Pinks en aŭgusto-septembro de 1915, konkeris Serbion en oktobro-novembro de la sama jaro, kaj okupis Rumanion dum 19116-1917. En la postmilita etapo li iome simpatiis al la hitlera movado.



Mangin, Charles (1866-1925)
Franca generalo, alnomata «la buĉisto» pro lia facileco sendi trupojn al la morto en senutilaj atakoj. Komandante la francan 10-an Armeon li atingis notindajn venkojn en Ĉarleroj kaj Verduno. La 24-an de septembro de 1916, en la batalo apud Verduno, la trupoj de Charles Mangin avancis laŭlonge de fronto de 6 km kaj plenumis la rekonkeron de Douamount kaj Thiaumont. Per tiu ofensivo la germanoj perdis sian esperon superi la Aliancanojn en tiu fronto.




Moltke, Helmut (1848-1916)
Prusia generalo. Li servis kiel estro de la Plejalta Stabo de la germana armeo ekde 1906 al 1914, plenumante sian rolon dum la unuaj ses semajnoj de la Mond-Milito, t. e. ekde la mobilizado de la trupoj en aŭgusto de 1914 ĝis la germana malvenko en la unua batalo de la Marno en septembro de tiu jaro. Oni atribuas la fiaskon de la germana ofensivo al la modifoj kiujn li faris en la originala «Plano de Schlieffen». Tiam oni lin anstataŭigis en sia stabestra posteno per Erich von Falkenhayn. Li grave malsaniĝis en aŭgusto de 1915 kaj mortis en junio de 1916.



Nivelle, Robert Georges (1856-1924)
Franca militisto, ĉefkomandanto de la francaj armeaj fortoj en 1916-1917. Li servis kiel artileria oficiro en Vjetnamio, Alĝerio kaj Ĉinio. En 1913 ricevis rangon de kolonelo kaj post lia partopreno en la batalo de la Marno en 1914 li estis nomumita generalo. Post kelkaj sukcesoj en la batalo de Verduno oni asignis al li la komandadon de la franca armeo en decembro de 1916 kiel anstataŭanto de Joseph Joffre. Lia komandado distingiĝis pro la lanĉado de ofensivoj kiuj kaŭzis grandajn homajn perdojn sen ia ajn utilo. Oni forigis lin el sia posteno en majo de 1917.



Pershing, John Joseph (1860-1945)
Usona generalo. Li reorganizis la armeon de sia lando por ĝia interveno en la milito en Eŭropo. La 12-an de majo de 1917 li akceptis de la prezidento Wilson la nomumon de komandanto de la usonaj ekspediciaj fortoj en Eŭropo, konsistantaj el pli ol du milionoj da homoj, kies kontribuo al la venko de la Aliancanoj estis decida. En 1919 li estis nomumita Generalo de la Usonaj Armeoj, la plej alta militista rango en la lando.



Pétain, Henri Philippe (1856-1951)
Grava franca militisto kaj politikisto. Oni nomumis lin «Marŝalo de Francio» pro lia venko en la batalo de Verduno en la Unua Mondmilito. Kiel politikisto ne tiel estis brila lia agado. En Dua Mondmilito, post la invado de Francio far la germana armeo li konsentis subskribi, nome de Francio, la armisticon de junio de 1940 kaj estri la germanfavoran reĝimon de Viĉjo, kiu subtenis la hitleran Germanion.
Li mortis la 23-an de julio de 1951 dum sia enkarcerado en iu insulo en Vendee.

Poincaré, Raymond (1860-1934)
Franca politikisto. Prezidento de la Respubliko dum la Unua Mond-Milito kaj Ĉefministro de Francio en tri aliaj okazoj. Dum la milito li distingiĝis pro siaj profundaj kontraŭ-germanaj sentoj. Dum la pac-konferenco de Parizo kaj la negocado de la Traktato de Versajlo li postulis la okupadon, far la Aliancanoj, de la germana zono de Rejnlando. Li pensis ke la armistico elvenis tro frue kaj ke la franca armeo estus devinta penetri pli profunde en la germana teritorio.



Rennenkampf, Paul (1854-1918)
Rusa generalo. Komence de la milito li komandis la 1-an rusan armeon por la invado de Orienta Prusio. Li ne kapablis kunordigi la agadon de siaj trupoj kun la 2-a armeo de Samsonov. Post relativa sukceso en la batalo de Gumbinnem, la sinsekvaj fiaskoj en la unua batalo de la Masuranaj Lakoj trudis la rusan retreton el Orienta Prusio. Post la malvenko en Lodz, li devis demisii. Post la revolucio li rifuzis servi en la Ruĝa Armeo kaj la bolŝevistoj murdis lin.



Samsonov, Aleksander Vassilievich (1859-1914)
Rusa generalo. En 1914 oni asignis al li la komandon de la 2-a Rusa Armeo por la invado de Orienta Prusio. Lia malsimpatio al la komandanto de la 1-a Armeo, Rennenkampf, igis ke ne eblis kunorditan operaciadon de ambaŭ militistaj fortoj. Kvankam Samsonov disponis je pli maltenombra trupo ol la 8-a Germana armeo komandita de Paul Hindenburg kaj Erich Ludendorff, ĉi tiuj atingis grandan venkon sur li en la batalo de Tannenberg kaj li memmortigis.



Spee, Grafo Maximilian (1861-1914)
Germana admiralo ekde 1910. Dum la mondmilito li komandis la germanan eskadron de Ekstrema Oriento en la Pacifika Oceano. Li venkis la Aliancanojn en la batalo de ***Coronel,*** apud la marbordo de Ĉilio, la 1-an de novembro de 1914, sed du semajnojn poste, la 14-a de tiu monato, lia floto frontis pli potencan malamikan forton en la Malvina insularo. La germana eskadro estis detruita kaj en la batalo pereis la grafo Spee kaj liaj du filoj.




Tirpitz, Alfred (1849-1930)
Germana admiralo kaj ministro pri Maraferoj ekde 1911. Ekde tiu ministrejo li tre impulsis la konstruadon de potenca milit-ŝiparo kapabla kontraŭfronti la britan floton. Dum la mondmilito, de 1914 al 1916, li estis Plejalta Admiralo de la germanaj flotoj. Li estis la responsulo de la dronigo de la transatlantika ŝipo ***Lusitania***. Por pravigi tiun agon, kiu okazigis multe da viktimoj kaj estis la kaŭzo de la eniro de Usono en la milito, li asertis ke la ŝipo estis portanta armojn. Sekve de ĉio ĉi li devis demisii en 1916. Post la milito li dediĉiĝis al la politiko kaj estis deputito de la Popola Nacia Germana Partio inter 1924 kaj 1928.



Wilhemo la 2-a (1859-1941)
Plennome ***Friedrich Wilhelm Viktor Albrecht von Hohenzollern***, estis la germana kajzero kaj reĝo de Prusio ekde 1888 ĝis la fino de la la Unua Mondmilito. Li ne deziris grand-skalan konflikton sed lia politika mallerteco ebligis ĝin. Laŭ la disvolviĝo de la milito li estis perdanta politikan influon. Hindenburg kaj Ludendorff fakte alprenis la povon kaj formetis lin esti nur dekora figuro. Li estis forpelita el la trono la 9-an de novembro de 1918. Tiam li ekziliĝis en Nederlandon kaj mortis tie dum la Dua Mond-Milito.



Wilson, Thomas Woodrow (1856-1924)
Li estis la 28-a usona prezidento. Lia prezidenteco okazis dum la Unua Mondmilito. Komence li estis neŭtrala dum la konflikto sed la germanaj atakoj per submarŝipoj kontraŭ ŝipoj de neŭtralaj landoj igis lin deklari la militon al Germanio la 2-an de aprilo de 1917. Estis enorma la kontribuo de lia lando al la venko de la Aliancanoj. La pactraktato de Versajlo de 1919 tre estis bazita sur la ideoj de Wilson esprimitaj per la dokumento t. n. ***Dek-kvar Postuloj***. Li ricevis Nobel-premion pri Paco.



Legante pri la Unua Mond-Milito en multaj lingvoj



Kvankam ne tiel multenombraj kiel pri la **Dua Monda Milito**, ankaŭ pri la **Unua** oni multe verkadis historiajn librojn en multaj landoj, ĉu partoprenintaj aŭ ne en la konflikto. Kaj ne nur historiajn verkojn sed ankaŭ sur la fono de tiu milito.
Kompreneble, ĉiu verkisto de historiaj okazintaĵoj prezentas personan vidpunkton pri la aferoj, kaj temante pri militaj konfliktoj en kiuj la lando de la aŭtoro estis batalinta tio konformigas la pritakson de la kronikisto kaj la rezulto povas ne esti tre objektiva. Tiurilate povas esti pli objektivaj kaj neŭtralaj ĝuste la libroj verkitaj en la neŭtralaj landoj. Nia lando ne intervenis en tiu konflikto kaj same oni povas diri pri la hispanlingvaj landoj de Latin-Ameriko. Ekzistas bonaj verkoj pri la Granda Milito en la hispana lingvo. Ni aparte rezencas ĉi-numere iujn el ili.
En la angla lingvo estas multaj ampleksaj historiaj libroj pri tiu milito. Menciindas la sesvoluma verko de John Alexander Hammerton (eldonita en la jaro 1933). Por ties ellaborado la aŭtoro baziĝis sur amaso da atestoj de militaj postvivantoj kaj ankaŭ sur oficialaj dokumentoj al kiuj li havis alireblon.
Ankaŭ en la germana kaj franca lingvoj ekzistas granda serio da libroj pri la Unua Mond-Milito, ne nur ĝeneralaj historiaj verkoj pri la konflikto sed ankaŭ biografioj kaj membiografioj. En la germana ni menciu la historiojn verkitajn de Volker Berghahn kaj Wolfgang Kruse. En la franca menciendas la mem-biografion de Louis Maufrais. Ankaŭ inspirita en sia propra biografio estas la libro ***Les Croix des Bois*** verkita de Roland Dorgelès. Krome estas la libro titolita ***La marraine de guerre*** de Catherine Hachette (2007), kaj ***Ceux de Verdun*** de Patrice Flammarion (2001).
Kaj ne mankas libroj kaj raportoj de tiu milito en aliaj lingvoj: rusa, itala, hebrea, pola… En esperanto ne abundas tiutipaj libroj sed tamen estas io rilate la la Granda Milito, kiel la tradukaĵo de Vladimir Váňa: ***La aventuroj dela brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito*** de Jaroslav Hašek, kaj la tradukaĵo ***En okcidento nenio nova***, originale verkita en la germana de Erich Maria Remarke kaj esperantigita en 1934 far kvar esperantistoj kies nomoj ne estis publikigitaj.





ĈIO, KION VI DEVAS KONI PRI LA UNUA MONDA MILITO

Jesús Hernández Martínez

Lingvo: hispana
Eldonis: Nowtilus (2008)
Paĝoj: 416
Prezo: 20 €





Jesús Hernández Martínez, Barcelono (1966) estas hispana ĵurnalisto kaj historiisto, licenciulo en Scienco pri la Informado kaj Nuntempa Historio.
Li verkis kelkajn librojn pri la du Mondaj Militoj kaj aliaj historie famkonataj militoj, inter ili la librojn titolitajn: ***La cent plej bonaj anekdotoj pri la Dua Mond-Milito*** (2003) kaj ***Nordo kontraŭ Sudo*** (2008), ***Operacio Valkirio*** (2008), ***Enigmoj kaj Misteroj de la Dua Mond-Milito*** (2009), ***La 50 grandaj masakroj de la historio*** (2009), ***Defiante Hitleron*** (2012)...
Liaj libroj atingis grandan sukceson en la hispana lingvo. Por la verko ***Operacio Valkirio*** Oni akiris de li la eldonrajton por ties tradukado al la portugala, hungara, rumana kaj latva lingvoj.


Ĉi tiu libro aperis en la jaro 2008 okaze de la naŭdekjara datreveno de la finiĝo de la Unua Mond-Milito. La libro pli estas priskribo ol interpreto de la konflikto, t. e. la teksto pli estas laboro de ĵurnalisto ol de historiisto. La aŭtoro mem diras, en la enkonduko de la verko, ke li pretendas provizi informon pri milito kiu estas sufiĉe nekonata en la nuna tempo tial ke en nia epoko altiras plian atenton pri la Dua Mond-Milito kaj aliaj pli ĵusaj konfliktoj.
La verko de Jesús Hernández priskribas la militon laŭ ĉi ties strikte kronologia disvolviĝo, ekde la komenciĝo de la konflikto per la atenco en kiu estis murditaj la aŭstria arkiduko Francisko Ferdinando kaj ĉi ties edzino, ĝis la lastaj ofensivoj, far la aŭstro-hungara imperio, kaj la germana kapitulaco. La intereso de la libro kuŝas ĝuste en tio: la raportado pri la kampanjoj, la ofensivoj, la bataloj… tiel estas trafa kaj detala kiel la priskribo de la lokoj kie okazadis la militaj eventoj. Tiusence la verko utilas ne nur por la publiko kiu deziras ĝeneralan rigardon de la konflikto sed ankaŭ por la histori-studanto interesita pri detala informo de la milita disvolviĝo.
La aŭtoro ne forgesas okupiĝi ankaŭ pri la politikaj kaj diplomatiaj aspektoj de la konflikto. Krom la militistaj operacioj kaj la vivo en la tranĉeoj, altiris lian atenton ankaŭ la operacioj okazantaj for de la batal-kampo: diplomatia negocado, politikaj planoj, milita propagando de la batalantaj landoj, mitoj kaj legendoj pri la milito, la revolucio en Rusujo… Kaj kvankam la milita areo estis, ĉefe, Eŭropo, la verkisto ne forgesis la operaciojn okazintaj en aliaj terzonoj: Afriko, Palestino, Ĉinio, la milito en la maro… En la libro estas ankaŭ ampleksa informado pri la personaj protagonistoj de la konflikto: reĝoj, ŝtatestroj, generaloj…
La legado de tiel ampleksa teksto –pli ol 400 paĝoj– tute ne rezultas enuiga. La leganto povas sin senti merĝita en la epoko kaj la etoso de la raportataj okazaĵoj kaj povas iamaniere sperti la sentojn kaj la zorgojn de la homoj kiuj devis troviĝi en la batal-kampoj de tiu kruela konflikto.
Tiutipa maniero priskribi la militojn oni povas trovi en la ceteraj historiaj verkoj de ĉi tiu aŭtoro, plejparte el ili dediĉitaj al la du mondaj konfliktoj de la pasinta jarcento.



KONCIZA HISTORIO PRI LA UNUA MOND-MILITO (1914-1918)

Álvaro Lozano Cutanda

Lingvo: originale itala, traduko en la hispana.
Eldonis: Nowtilus (Novembro - 2011)
Paĝoj: 201
Prezo: 14,20 €





Álvaro Lozano Cutanda, Romo-1967, Licenciulo pri Juro kaj Doktoro pri Historio. Li eniris en la diplomatian karieron en la jaro 2001 kaj de tiam laboris en la italaj ambasadejoj en Hispanio, Bolivio kaj Turkujo.
Lia verkaro temas, ĉefe, pri la Dua Monda Milito:
- ***La nazia Germanio (1933-1945).***
- ***Stalino, la ruĝa tirano (Nekonata historio).***
- ***La nazia labirinto.***
- ***La holokaŭsto kaj la kultoro pri la amasoj.***
- ***Anatomio de la Tria Regno. La debato kaj la historiistoj.***
- ***Mussolino kaj la itala faŝismo.***

Kaj en novembro de la jaro 2011 aperis lia libro pri la Unua Mond-Milito, kiun ni recenzas

Post abunde verki pri la Dua Monda Milito, Alvaro Lozano dediĉis ĉi tiu libro al la unua granda konflikto de la 20-a jarcento. Por resumi la enhavon kaj la celon de tiu verko eble plej taŭgas transskribi tion kion pri ĝi diris la aŭtoro mem je la prezentado de la libro en novembro de la jaro 2011:
«Ĉi tiu verko priskibas por ampleksa publiko La **Unuan Mondan Militon** aŭ **Grandan Militon** kiel estis nomita de tiuj kiuj travivis ĝin, kiu estis, sendube, mejloŝtono en la historio de Eŭropo. La eksplodo de tiel ega konflikto okazigis ekonomiajn perturbojn, socian malbon-staton kaj ian ekspansion de la ideologia aktivismo kiu subfosis la bazojn de la eŭropa liberalismo. Jam antaŭ la jaro 1914 la hegemonio de la regantaj liberalaj elitoj estis minacita: la ekonomia moderniĝado, la sekularigado kaj aliaj fenomenoj en rilato kun ili estis disfaligante kaj defiante la ekzistantan politikon. De tiam, la superregantaj elitoj troviĝis antaŭ la necerteco de la popola politiko, la perspektivo ofte nedezirita de pli aŭtenta demokratio kaj la minaco de la socialismo».
«La celo de ĉi tiu verko estas utili kiel amplesa enkonduko al la konflikto. La militista historio ofte pekas pri tio ke ĝi estis verkita por la militistaj historiistoj aŭ por legantoj familiarigitaj kun la militista slango. La legantoj malpli spertaj perdiĝas en labirinto de frontoj, elstaraj anguloj, taktikoj kaj fajro-kampoj. Tiele perdiĝas ampleksa senco de la konflikto inter abundo de militistaj detaloj. Ĉi tiu verko eksplikas la unuan mondan militon tiamaniere ke iu malspertulo pri la afero povu ĝin sekvi kaj iu spertulo ĝin truvu allogan. La teksto alproksimigas la leganton al la originoj de la konflikto, tiel diplomatiaj kiel sociaj, samkiel al la novaj tezoj pri la temo. La leganto estas poste kondukata tra la grandaj bataloj, oni studas la ampleksan kadron, sed ankaŭ la detalon de la vivo de la batalantoj en la tranĉeoj kaj de la civiluloj en la ariergardo».
Kvankam la verko titoliĝas "kociza historio", ĝia enhavo estas sufiĉe detala por ke la leganto akiru trafan komprenon de la naturo kaj cirkonstancoj de la milito. Ne mankas en la teksto atenton al aspektoj kiuj povas esti konsiderataj "flankaj" de la konflikto, kiel ties ekonomiaj, fizikaj, politikaj, sociaj kaj psikologiaj faktoroj.





LA UNUA MOND-MILITO

Martin Gilbert

Lingvo: originale angla, traduko en multaj lingvoj.

Eldonis hispane: LA ESFERA DE LOS LIBROS

Paĝoj: 928


Prezo: 39 €

Ĉi tiu libro estis priskribita kiel verko kiu pritemas ĉiujn gravajn vidpunktojn de la konflikto: diplomatia, militista kaj civitana, atingante kvalitan gradon je historia esploro kaj rakonta prezentado. La libro priskribas tiel la kaŭzoj kiel la disvolviĝo de la konflikto; ĝi priskribas ankaŭ la protagonistojn kaj ilian rolon en la milito.
Alia karakteraĵo de la verko estas ke pro ĝia strukturo la libro pli ŝajnas laboraĵo de kronikisto ol de historiisto. La rakonta prezentado de la milito estas kronologia, linia, t. e. ordigate la eventojn laŭ ties sinsekva okazado, sed atentante pri ĉiuj frontoj senescepte (kvankam ne samgrade) inkludante militajn operaciojn relative malgravajn kiel la brita razio en la bazo Senussi de Bir-Hakeim. Tiusence la raportado estas tre kompleta. La ĉapitra aranĝo estas laŭtempa, po jaroj kaj monatoj, kaj ene de ĉiu monato po tagoj. Tiu ĉi sistemo havas iajn avantaĝojn kaj samtempe ankaŭ malavantaĝojn. Ja, tia taglibra skemo de la raporto estas tre konvena kiam oni uzas la verkon kiel referenca libro por ekkoni kion okazis en difinita dato aŭ laŭlonge de konkreta periodo. Sed la sistemo povas rezulti ĝena kaj konfuziga kiam oni celas informiĝi pri aparta temo de la milito, aŭ pri konkreta fronto, ĉar en la teksto, por ĉiu tago de la milito oni raportas pri ĉio okazinta en la diversaj frontoj.
Sed spite al tiu dokumenta strukturo de la raporto, ĝi tute ne rezultas enuiga ĉar la aŭtoro ne hezitis intermeti en la tekston tiujn klaĉaĵojn kaj frivolaĵojn kiujn povas alproksimigi al ni tiujn homojn kiujn prenis gravajn decidojn en la konflikto, kaj ankaŭ fragmentojn de leteroj kaj taglibroj de protagonistoj, ĉu altrangaj aŭ ne. Tiamaniere la legado povas rezulti amuza, laŭmezure ke povas amuzi primilita legado.
Iu kritiko kiun oni povas fari al ĉi tiu verko estas ke la aŭtoro, brito, pli atentas pri la frontoj kie intervenis britaj fortoj; la itala kaj la orientaj frontoj estas malpli dokumentitaj ol la eŭropo kaj nordafrika frontoj. En la libro perceptiĝas ankaŭ la manko de priskribo de personaj dramoj de batalantoj kaj protagonistoj de la t. n. ”Centraj Potencoj” (Aŭstrio kaj Germanio). Krome, li estas tro bonvola kun la ***Versajla Traktato***, kiu, kiel sciate, rezultis la semo de la Dua Mond-Milito.



Martin John Gilbert, (Londono, Britio, 25-a de okltobro-1936), Historiisto kaj aŭtoro de pli ol 80 libroj, inter ili kelkaj historiaj atlasoj. Li estas konata pro tio ke estis la oficiala biografiisto de Churchill. Li verkis libron pri la Holokaŭsto kaj aliaj pri diversaj historiaj temoj, inter ili:

- ***The European Powers 1900-1945 (1965).***
- ***Final Journey: The Fate of the Jews of Nazi Europe (1979).***
- ***Auschŵitz and the Allies(1981).***
- ***Shcharansky: Hero of Time (1986).***
- ***The Second World War (1989).***
- ***The Day the War Ended: May 8, 1945 (1995)***
- ***The Boys, Triumph Over Adversity (1996).***



Fragmento de libro de Sebastian Haffner

Sebastian Haffner estas la pseŭdonimo de **Raimund Pretzel** (1907-1999), germana ĵurnalisto kaj historiisto. Lia ĉefa verko titoliĝis ***Historio de unu germano***, publikigita post lia morto kaj tradukita al multaj lingvoj. La frangmenio kies esperantlingva traduko ni prezentas ĉi tie apartenas al alia el liaj verkoj: ***Die sieben Todsünden des Deutschen Reiches im Ersten Weltkrieg*** (***La Sep Mortigaj Pekoj de la Germana Imperio dum la Unua Mondmilito***), eldonita en la jaro 1964.

La unua el la grandaj eraroj de Germanio estis, komence, provoki la Unuan Mond-Militon, kaj ĝuste tion ĝi faris.

Ĉi tio rilatas nenio al la demando pri la «milita respondeco». Post la unua Monda Milito temi pri «milita respondeco» far la venkintoj estas falseco kaj hipokriteco. Tiutipa respondeco antaŭsupozas delikton kaj, tiam, la milito konstituis nenian delikton. En la Eŭropo de 1914 la milito ankoraŭ estis iu laŭleĝa instrumento, sufiĉe honorinda kaj eĉ glora. Ĝi ankaŭ ne estis nepopola; fakte, la milito de 1914 neniuloke estis nepopola. En aŭgusto de 1914 aŭdiĝis jubil-krioj ne nur en Germanio, sed ankaŭ en Rusujo, Francio kaj Anglujo. Tiumomente ĉiuj popoloj estis sub la impreso ke estis la vico de nova milito, tiel do ili ricevis ĝian eksplodon kun sento je liberiĝo. Tamen, la respondeco ke estis alveninte la momento estis de Germanio.

La granda rompiĝo inter la paco kaj la antaŭmilita periodo estis okazinta ĉirkaŭ la komenciĝo de la jarcento, kaj tio kio ŝanĝiĝis tiam estis la germana politiko, nenio alia. La lastaj jardekoj de la 19-a jarcento estis la plej pacaj en la eŭropa historio, kio grandmezure ankaŭ ŝuldendas al la germana politiko. Sub la regado de Bismarck kaj eĉ dum la unuaj jaroj post lia retiriĝo, la germana politiko estis tute paca kaj Eŭropo ĝuis tiun pacon. Tamen, proksimume ekde 1897 okazis grava rompiĝo en la germana politiko: subite ĝi ĉesis esti paca kaj, de tiam, Eŭropo jam ne plu havis certan pacon, sed travivis krizon post krizon, ĉiam subdanĝere de nova milito.

Ĉi tio ne signifas ke dum la antaŭmilitaj jardekoj ne estis okazintaj streĉiĝoj, ĉar ĉi tiuj ekzistas ĉiam en iu sistemo de suverenaj ŝtatoj. Iu el la plej antikvaj kaj konataj kialoj de ŝtreĉiĝo estis, ekzemple, la «orienta afero»: la emon al sendependeco de la baltaj nacioj kiuj okazigadis la lantan disfalon de la otomana Imperio kaj minacis la regnon de la Habsburgoj. Rusio postulis la emancipadon de la baltaj slavoj; Aŭstrio kaj Anglio klopodis moderigi ĝin, la unua ĉar sin sentis rekte minacata de malproksime kaj la dua celante bari la alirecon de Rusio al la Mediteraneo.

Germanio rolis kiel peranto. Ĉio ĉi estis sufiĉe konata kaj bone funkciis. Ne indis militi. Ĉiufoje kiam okazis nova ribelo aŭ nova incidento en Balkanio ekfunkciis la «eŭropa koncerto» de la grandaj potencoj kaj la aferoj estis solvataj iamaniere. Tiel estis okazinte dum kelkaj jardekoj kaj tiel estus povinte daŭre okazi dum kromaj pluaj jardekoj, ankaŭ en 1914. En Germanio mem estis alia situacio de ŝtreĉiĝo, ĉar tie kie ĉiam estis Prusio, la malplej granda el la eŭropaj potencoj, ekde 1871 subite estiĝis la plej granda kaj plej forta potenco: la Germana Imperio. Ĉi tiu ŝanĝo signifis forta skuo por la kutima eŭropa ekvilibro, kaj efektivigi ĝin ne provokante militon estis vera prodaĵo. Tamen,

estis eĉ pli malfacile ke Eŭropo alkutimiĝu al ĉi tiu nova forto-rilato. Bismarck ankoraŭ konsciis pri tia malfacilaĵo, kiun li sukcesis superi pere de ia ekstreme prudenta kaj saĝa politiko kaj igis videblajn la germanajn interesojn kaj zorgeme evitis treti sur la ceteraj potencoj. Bismarck generis konfidon pri la nova germana Imperio, sed liaj sukcedintoj vekis ian ĝeneralan malkonfidon. Se oni deziras scii en kio konsistas ia germana politiko pri paco, sufiĉas analizi la politikon de Bismarck post 1871. Por konstati ke la politiko de liaj sukcedintoj ne havis saman signon sufiĉas kompari ilin kun tiu de Bismarck. Kompreneble ke la sukcedintoj de Bismarck, male ol Hitler, ne celis la militon per ĝi mem; tamen, male ol Bismarck, ili jes ja aspiris tiam al iuj celoj kiuj ne estis atingeblaj sen okazigi arman konflikton.

Bismarck ĉiumomente konsciis ke Eŭropo ne ĉiam konsiderus kiel fakton la ekziston de iu germana Imperio. Fakte, li mem respondecas pri tio ke la germana Imperio naskis kun la «jarcenta malamikeco» kun Francio atendante ĝin ekde ĝia lulilo. Ankaŭ en 1878 la iama bona rilato kun Rusio estis perturbita, tiamaniere ke Germanio sin vidis devigita alianciĝi kun Aŭstrio. De tiam du danĝeroj ŝvebis en aero: iu alianco inter Rusio kaj Francio aŭ iu milito inter Rusio kaj Aŭstrio en kiu Germanio povus vuidi sin implikita. Dum sia regado, Bismarck sciis eviti ambaŭ minacojn dank' al ia konstanta zorgemo kaj lerteco. Li neniam estus konceptinta la eblecon preskaŭ provoki kune kun Aŭstrio militon kontraŭ Rusujo kaj Francio, kaj eĉ malpli kontraŭfronti Anglujon sennecese. Tamen, liaj sukcedintoj plenumis ambaŭ farojn, kio konstituis nenian delikton; eĉ pli, laŭ la tiutempaj konvencioj ili plenrajtis fari tion, sed tio estis terura eraro kaj, samtempe, la kaŭzo de la Unua Monda Milito.

Ĉiu peko komenciĝas en la penso kaj ĉiu eraro komenciĝas estante eraro de logiko. Ĝuste tio okazis ĉi-foje. La penso de la lando ŝanĝis antaŭ la modifo de la germana politiko. Jam ne plu ekzistis tiu sento de plena ŝtato. Estis sensacio de malkontento, de manko kaj, samtempe, oni perceptis ian kreskantan forton. Ideoj de «radikala ŝanĝo», de iu «Weltpolitik» (monda politiko) kaj de iu «germana misio» kaptis la landon kaj generis tutan klimaton de renaskiĝo kaj eksplodo, esprimata unue pere de libroj kaj artikoloj, instruistaj lecionoj, manifestoj kaj la fondiĝo de diversaj asocioj kaj, poste, ankaŭ pere de politikaj decidoj kaj diplomatiaj agadoj. Proksimume ekde la lasta kvindeko de la 19-a jarcento la tuta germana orkestro subite komencis ludi novan muzikaĵon.


La paco-rilatoj subtenitaj en la 19-a jarcento povas esti resumitaj en unu sola frazo: **ene de Eŭropo reĝadas ekvilibro kaj for de Eŭropo reĝadas Anglujo**. Bismarck neniam volis dinamiti ĉi tiun sistemon, li nur celis enkonduki en ĝin iun germanan Imperion unuigitan kaj potencan, celo kiun li atingis.

Liaj sukcedintoj volis diskrevigi la sistemon kaj anstataŭigi ĝin per alia tiamaniere ke, estonte, la devizo estus: **for de Eŭropo reĝadas la ekvilibro kaj ene de Eŭropo reĝadas Germanio**.

En la kontinenta Eŭropo Germanio jam ne plu devus esti unu inter aliaj, sed iu gvidanta potenco kaj garantianta de la reĝanta ordo. Tamen, en la internaciaj maroj kaj en la transmaraj landoj Anglujo jam ne plu devus esti la hegemonia potenco sed unu inter egalaj. Laŭ la fascina teorio kiun la plej klarmensaj uloj de la akademiaj kaj presaraj medioj de la tiama Germanio estis formulantaj ekde fine de la naŭdekaj jaroj kaj ĝiaj konstantaj novaj versioj, la antikva eŭropa sistemo de ekvilibroj devus tiam, en la epoko de la imperiismo, ampleksiĝi al monda ekvilibro-sistemo. Tiu-ĉi nova sistemo postulis forpreni de Anglio serion da koncesioj, tiujn samajn kiujn, antaŭ kelkaj jarcentoj, la eŭropa ekvilibro-sistemo estis sukcesinta forpreni de la tiamaj koloniaj potencoj (Hispanio kaj Francio). «Ni ne deziras fari ombron al iu, sed ankaŭ ni volas lokon sub la suno», kaj krome atingi ĝin ne kiel ĝis tiam, per la graco de Anglio. Pro tio la granda milita floto kiun Germanio subite pensis bezoni kaj komencis konstrui. «Nia futuro estas sur la maroj».

Nu, konsentite, kial ne? La brita hegemonio sur la propraj maroj kaj transmare ne estis plenumo de iu dia ordono; neniuloke estis skribita ke ne alvenos la tago kiam tiu superregado devus cedi lokon al nova sistemo.

Okazis ke Germanio, reale, ne estis kontraŭfrontanta Anglujon. Angluo estis farinte nenion kontraŭ Germanio kaj ankaŭ ne disputadis al ĉi tiu ĝiajn malmultajn koloniojn. Aliflanke, evidentis ke estis neelpenseble ke Anglio rezignu sian hegemonion paceme. Do, ne estis malfacile antaŭvidi ke Anglio neeviteble fariĝus malamiko se iu pridubus sian mondan hegemonion senmotive. Krome, ĉu ne sufiĉis al Germanio la heredita malamikeco kun Francio kaj Rusio?







1914 - La jaro de la katastrofo

Intervjuo al Max Hastings

***Max Hastings**, naskiĝinta la 28an de decembro 1945, estas brita ĵurnalisto kaj historiisto. Li verkis kelkajn librojn pri la Dua Mond-Milito, kaj pasintan jaron aperis lia verko: **1914 – La jaro de la katastrofo**. Pri la temo de ĉi tiu libro oni faris al li intervjuon por ĵurnalo (**El Confidencial**, en la hispana lingvo, publikita la 30an de oktobro-2013, videbla ankaŭ en Interreto), kies Esperantan tradukaĵon ni prezentas ĉi tie.*

Kial vi decidis reviziti la Unuan Mond-Militon?
Evidentis ke okaze de la centjaro estus granda intereso pri 1914, sed mi ĉiam intencas rakonti al la publiko ion nekonatan, kaj mi trovis aferojn kiujn povus esti interesaj. La unua el ili estas ke ankoraŭ ekzistas la sento ke la Dua Mond-Milito estis bona milito, kiun oni devis batali, sed ke la Unua estis vana, ke ĝi utilis nenion. Tio ne estas vero, la milito estis katastrofa por Eŭropo, sed estis iu kialo por batali.

Oni diris ke ĝi estis iu milito por meti finon al ĉiuj militoj. Kio okazis por ke la rezulto ne estus tia?
Ja, estas tio kion oni diradis tiam al ĉiuj. Kiam okazis la Dua Mond-Milito, en Francio kaj Britio ekzistis sensacion de elreviĝo, ĉar fiaskis tio kion oni diris pri la Unua Mond-Milito. Kaj estas ankaŭ pro tio ke generiĝis tiu vidpunkto ke ekzistis iu milito malbona kaj alia bona.

En via libro vi asertas ke unu el la ĉefaj problemoj estis ke la finiĝo de la konflikto oni ne alprenis respondecojn.
En Britio oni opinias ke la Traktato de Versajlo de 1919 estis tre maljusta rilate al Germanio, sed verdire oni intencis fari ion tre malfacilan: rekonstrui la mondon. La pristudantoj de Versajlo asertas ke ne estas vero tio ke la traktato estis kruela kun Germanio. Ekzemple, rilate al la mono, la germanoj fine pagis al la francoj malpli ol tion kion la francoj pagis al la germanoj en 1871, krome ili estis devigitaj senmilitariĝi, kion ili ne plenumis. La plej bonaj akademianoj opiniaj ke la ekonomiaj problemoj de Germanio en la 20aj kaj 30aj jaroj kiuj provokis la poncenciiĝon de Hitlero estis rezulto de fuŝaj ekonomikaj politikoj de la postmilita registaro, ne de la Traktato de Versajlo.

Ĉu vi opinias ke la registaroj akceptis poste tiujn respondecojn?
Iu aŭstralia milit-ĵurnalisto iam raportis ke en Germanio en 1945 li ne trovis kulpo-senton, sed, jes ja, grandan senton je malvenko ĉar la germanoj povis vidi ke ilia lando estis frakasita. Kontraste, en 1918 oni ne estis batalinte ene de la lando, kaj pro tio ili ne havis realan senton de malvenko, kaj tial ankaŭ ne kulpo-senton.
Indas aserti ke estas similo inter la Germanio de 1914 kaj tiu nuntempa. Nuntempe Germanio estas granda demokratio kaj ne estas minaco de eŭropa milito, sed la kontinento havas saman problemon kiel antaŭe: kiamaniere vivi kun iu stato kiu estas multe pli riĉa kaj potenca ol ĉiu ajn?

Ĉu iu malsama postmilito estus evitinta la Duan Mond-Militon?
Estas prefere ke ni, la historiistoj, limiĝus al la faktoj, sed estas vero ke la Dua Mond-Milito rezultis el la fakto ke la germanoj ne estis akceptintaj la militan verdikton de la Unua, sed nenio en la historio estas ne-evitebla.

En la libroj oni ĉiam asertas ke la murdo de Francisko-Ferdinando de Aŭstrio estis la komenco de la Unua Mond-Milito.
Kompreneble tio estis la eksplodaĵo, sed la terorismo estis kronika malsano en Balkanio. Al la aŭstroj ne plaĉis Francisko-Ferdinando kaj konsideris tiun murdon kiel la plej konvenan pravigon kiun oni prezentis al ili por frakasi Serbion. Kio estas surpriza ne estas tio ke Aŭstrio volus frakasi ĝin, sed tio ke la germanoj kuraĝigus ilin fari tion. Iu nacio kiel Germanio, rafinita, kun ĉio ĝiafavore. Mi ne pensas ke la germanoj volus iun grandan militon tiumomente, sed ili estis pretaj riski ke tio okazu.

Kio estus okazinte se estus venkinta Germanio?
Estus katastrofe. En 1914 ĝi estis la plej evoluinta socio en Eŭropo. Sed ĝi havis iun gravan problemon, iun misfunkcia registaro kiu troviĝis 50 aŭ 100 jarojn malantaŭ la cetero de la lando. Kvankam estis iu socialista plimulto en la registaro ĝi ne havis realan povon, posedis ĝin la kajzero kaj la ministroj kiujn li mem elektadis. Ili volis superregadi Eŭropon kaj se ili estus venkintaj ili estus trudintaj ian pacon tre brutalan. La ironio de 1914 estas ke, se Germanio ne estus militinta, ĝi estus daŭriganta sian progresadon kaj mi estas certa ke post 20 jaroj ili estus superregantaj Eŭropon ĉiukaze.

Ĉu ni estas kondamnitaj ripeti niajn erarojn kaj ke okazu tiutipa konflikto estontece?
Mi ne pensas ke ni ree vidos mondajn militojn kiel tiuj de la 20-a jarcento, sed ni vidas mondajn krizojn, kaj, jes ja, ni vidas la liderojn de Eŭropo agadi en la krizo de la eŭro tiel blinde kaj stulte kiel faris en 1914. Ni vidis ke ili faris asertojn kiuj ni sciis ke ne estis veraj kaj ankaŭ ili sciis tion. Pro tio, kvankam tiuj aferoj ne tiel estas katastrofaj kiel la militoj, ni konstatis ke la registaroj kapablas konduti same ridind-maniere. La registaroj ne kapablas agnoski ke la politikoj kiujn ili estis aplikante dum kelkaj jaroj estis frenezaĵo.

Per viaj libroj ĉiam iu ajn soci-sektoro ofendiĝas; laŭ via opinio, kiu estos la plej ĝenata de *1914, la jaro de la katastrofo*?
Mi supozas ke, ne-eviteble, la germanoj. Sed mi intencas prezenti vidpunkton kiu komprenigu kial la personoj faris tion kion ili faris. Kelkfoje en Britio la kritikistoj diras ke mi malmulte respektadas la britajn legendojn. En la 21-a jarcento estas sensence verki librojn se ne estas por pririgardi la aferojn kiel eble plej honestece. En Hispanio nur nuntempe vi povas rigardi la Civil-Militon honestec-maniere.

Vi estis milit-ĵurnalisto, Ĉu vi sentas nostalgion je tiu profesio? Kiel vi vidas la nuntempan ĵurnalismon?
Mi tree ĝojas ne troviĝi tie. Pasintan semajnfinon mi vizitis iun el la familioj kiu posedas unu el la plej grandaj ĵurnaloj en Britio, kaj la problemo por ili estas kiamaniere gajni monon en la 21-a jarcento. Do mi estis tre bonŝanca labori kiam ni gajnis multe da mono. Kiam komenciĝis la Golf-Milito mi povis sendi dekdu personojn, nun mi devus sendi ilin perbuse.

Tio, se vi povus sendi dekduon.
Plejparto el la ĵurnaloj eĉ ne havas tiel multenombran laborantaron. Ĉiu generacio devas solvi siajn proprajn problemojn. Mi estis 39-jara kiam fariĝis eldonisto de ***Daily Telegraph***, ia konvena aĝo por alfronti la problemojn de iu generacio. Nun mi estas tro maljuna por tiu celo.

Vi neniam hezitis montri publike vian opinion pri politikaj temoj, ĉu vi suferis ian damaĝon pro tio?
La kritikoj pri ĉi tiu libro en Usono kaj Britio komence estis tre favoraj sed, subite, iu akademiano feroce atakis ĝin. Mi diris al iu amiko ke mi estis tre ofendita pro tio kaj li respondis al mi ke se mi verkas polemikajn librojn mi devas kompreni ke oni malkonsentu kun mi. Kiel historiisto kaj ĵurnalisto mi povas diri nur tion kion mi pensas. Ĉiam estos personoj kiuj malkonsentus kun mi, kaj mi devas esti ne tiel aroganta kiel ĝis pretendi ke nur mi pravas.



Intervjuo al Margaret O. MacMillan

***Margaret Olwen MacMillan** (Toronto, Kanado, 1943) estas historiistino –specialigita pri nuntempa historio– kaj profesorino en la Universitato de Oksfordo, Britio, kaj ankaŭ direktorino de la **ST. Antony's College.** Ŝi speciale dediĉiĝis al la studo de la brita imperio en la 19-a jarcento kaj komenco de la 20-a, samkiel la internaciaj rilatoj en la 20-a jarcento. Ŝi estas pranepinode la iama brita ĉefministro Davis Lloyd George.*

En oktobro de la pasinta jaro aperis ŝia libro: **1914. La milito kiu metis finon al la paco** *(Originala titolo, en la angla:* **The war that ended peace***), per kiu ŝi profunde analizas la kaŭzojn de la Unua Mond-Milito. La libro estis tradukita al la hispana lingvo kaj publikigita de eldonejo* **Turner** *kun la titolo:* **1914. De la paz a la guerra** *(De la paco al la milito). Komence ŝi volis verki libron centritan en la somero de 1914, kiam la murdo en Sarajevo de la aŭstria arkiduko Francisko Ferdinando provokis militon pri kies ebleco neniu estis antaŭpensinta. Sed baldaŭ ŝi komprenis ke estus necese komenci ekde 1900 por klarigi la procezon kiun kondukis al tia katastrofa milito kiu detruis por ĉiam la Eŭropon de la imperioj. Ni prezentas ĉi-tie esperantan tekston de intervjuo kiun faris al ŝi la hispana ĵurnalo* **ABC** *okaze de la publikigo de la menciita libro en nia lando.*

- Kiamaniere influis sur la okazaĵoj la fakto ke plejparto el la lideroj estis feriantaj?

La faktoro tempo ludis sian rolon, ĉar dum tiuj semajnoj ili havis aliajn zorgojn. La brita ministro pri Eksterlandaj Aferoj, Edward Grey, estis dedicîcâta al la observado de birdoj, la franca prezidanto estis ferianta en la balta marbordo. La britoj tiusomere estis zorgemaj ĉefe pri la irlanda afero. Al mi ŝajnis rimarkinda la malgranda atento kiun, ekzemple, «The Times» dediĉadis al la okazintaĵoj en Eŭropo. Maksimume, oni temis pri la senkronigo de la reĝo de Albanio. Kaj la publika opinio en francio estis centrita en la «afero Caillaux», la edzino de la ministro pri Financoj kiu murdis la direktoron de «Le Figaro».

- Ĉu oni ne atendis militon?

Ne, la ĝenerala opinio estis ke oni estis antaŭ kroma balkana krizo, simila al tiuj okazintaj dum la antaŭaj jaroj, kaj ĉiuj supozis ke la krizo estos superita. La disvolviĝo de la okazaĵoj estis grava. Kvankam oni estis plifortiginte la aliancojn –Germanio kun Aŭstrio-Hungario kaj Italio unuflanke, kaj Francio, Rusujo kaj Britio aliflanke–, kaj kvankam ĉiuj ili estis ellaborintaj detalajn milit-planojn, la eŭropanoj pensis ke ĉi tiu danĝero estis ne-konsiderinda.

-La plejsuperaj staboj havis tre detalajn planojn por la transportado de trupoj fervoje al kelkaj frontoj. Ĉu la primilita burokrataro igis la konflikton ne-eviteblan?

Mi ne kuraĝas uzi la terminon "ne-evitebla", sed sendube ĉi tiu estis iu el la faktoroj kiuj antaŭenpuŝis al la milito. En 1914 ĉiuj landoj havis ofensivajn planojn. Eĉ la francoj, kiuj posedis konsiderindajn defensivajn fortresojn. Ekzistis ia kulto al la ofensiva milito kiu bone kongruis kun la socia darvinismo de la epoko, laŭ kiu la konflikto kaj la konkurado inter nacioj estis konstitua parto de la natura ordo de la aferoj. La detalaj militaj planoj implicis la premon ekfunkciigi la maŝinaron, iu perdita tago signifus malavantaĝo. Kaj la planoj estis rigidaj. Kiam la kajzero Vilhemo demandis al sia stabestro, Helmut von Moltke, ĉu eblus ataki nur Rusujon, kaj ne Francion, la respondo estis nea. Al la caro Nikolao la 2-a okazis same kiam li sugestis ataki nur Aŭstrio-Hungarion kaj ne Germanion.

- La lider-personeco ludis gravan rolon, laŭ via libro. La plej rimarkinda estis tiu de la arkiduko Francisko Ferdinando mem, murdita la 28-an de junio de 1914. Ĉu oni mortigis la paceman homon kiun estus povinta eviti la Grandan Militon?

Estas ia granda ironio. Ni ne scias kion estus povinta okazi, sed antaŭe la arkiduko estis asertinta ke estus frenezaĵo ataki Serbion kaj tiamaniere provoki Rusion, sian defendanton. Li estis aŭtoritatema laŭ la malnova skolo kaj al mi

ne plaĉas multajn el liaj faroj, sed li povintus esti iu racia voĉo. Ĉirkaŭ la imperiestro Francisko Jozefo estis malmaltaj raciaj personoj. Li estis 84-jaraĝa, dum la printempo estis tre malsana, lia edzino, la imperiestrino Sissi, estis murdita, kaj li restis sola antaŭ la aŭstria armeestro, Conrad von Hötzendorf, kiu ĉiam estis militema homo. La aferoj povintus esti malsamaj ankaŭ se estus ankoraŭ vivinta la patro de la kajzero Vilhemo la 2-a, Federiko la 3-a (1831-1888). La patro de ĉi lasta, Vilhemo la 1-a, vivis 91 jarojn (1797-1888). Se Federiko la 3-a estus atinginta tiun aĝon, la Germanio de 1914 estus tre malsama, ĉar li havis multe pli liberalajn ideojn ol la aŭtoritatema kajzero Vilhemo.

- Ĉu ne estas ironia ke la reĝoj kaj imperiestroj antaŭenpuŝus la kontinenton al iu milito kiu entombigus ilian mondon?

Ili kontempladis la militon kiel ia elirejo. En multaj lokoj en Eŭropo la aristokrataro estis perdante poziciojn, povon, kaj multajn terojn. La prezoj de la agrokulturaj produktaĵoj en tiu epoko komencis multe malpliiĝi pro la alportado de produktaĵoj el la nova mondo, kiel Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Ili konsciis ke ilia vivmaniero estis minacita, kaj pensis ke la milito estis la maniero restarigi la konvenajn valorojn. La aristokrataro estis ankoraŭ tre ligitaj al la kamparo, kaj ne konfidis ke la urbaj soci-klasoj estus pretaj sin oferi por sia lando. La francaj militistoj, ekzemple, kalkulis ke 20 procento el la rekrutitoj ne prezentiĝos. Ne estis tiele. Fine dezertis nur 1 procento.

- La elitoj estis preparitaj por la milito, ĉu estis tiel ankaŭ la amasoj?

Multe pli ol supozite. La ideologio de la naciismo estis penetrinta en la germanan, britan, kaj francan sociojn tre profunde. Kiam eksplodis la milito, la publikaj opinioj de ĉiu lando estis konvinkitaj ke oni estis atakante ilin, kaj ke ili faris militon pro legitimaj kialoj. La nova publika opinio, la koloniaj prem-grupoj, aŭ tiuj de la mar-armeo kaj la ter-armeo, efektivigis premon sur la registaroj. Lord Salisbury, brita ĉefministro 1895-1902, diris ke estis kvazaŭ troviĝi sub la gvatado de azilon de lunatikoj.

- La el-lasilo de la konflikto estis premita en Sarajevo fare de iu anarkisto. La listo de murditaj regnestro estas impresiga: la franca prezidento Carnot, la reĝo Umberto de Italio, la usona prezidento William McKinley, Cánovas kaj Canalejas en Hispanio. Kiun rolon ludis la teroristoj?

Ili pligravigis la malstabilecon en Eŭropo. Estis momentoj de vera paniko, epokoj kiam la restoracioj de la centro de Parizo estis malplenaj pro la timo pri atencoj, kvankam ĉi tiu ne estis sendistingaj kiel tiuj de la nuntempa jihadismo. Estis influo de iuj sur aliaj. Juna Bosnio, la terorista organizaĵo de Princip, estis tre influita de la itala anarĥiismo. Mi ricevadas multajn rabiajn retpoŝtojn de serboj pro tio ke mi kvalifikis Princip-n kiel teroristo. Ili diras ke li estis batalanto por la libero.

- Kion vi respondas al ili?

Ke li estis teroristo ĉar li povus esti uzinta alitipajn metodojn, kvankam al plejparto el ili mi respondas nenion ĉar ili estas ofendaj, ili nomas min mensogulinon, aĉulinon… En iuj serbaj naciismaj rondoj, Princip daŭre estas nacia heroo.

- Ĉu estis justa kulpigi Germanion?

La klaŭzo de la Tratato de Versajlo de 1919 ne temas pri kulpo sed pri respondeco, kiel la bazo por la milit-kompensoj. Komence la du ĉefaj beneficatoj devus esti Francio kaj Belgio kaj, estante justaj, en tiuj du kazoj Germanio estis respondeca ataki ilin. Novaj historiaj esploroj pruvadis ke, kiam la germanoj avancadis kaj malplenigadis Belgion el brutaro, nutraĵoj kaj oro, ili devigis multajn belgojn plenumi pun-laborojn en Germanio.

- Sed, ĉu komencis Germanio la militon?

Germanio kaj Aŭstrio-Hungario tre kontribuis, ambaŭ, al tio ke Eŭropo faru lastan paŝon al la abismo. Pli ol la ceteraj nacioj, ĉar ili estis pli pretaj riski militon. Kiam Aŭstrio-Hungario faris la ultimaton al Serbio estis tre konscia pri la risko ke Rusio alkuru helpi Belgradon. Kaj, kiam Germanio kuraĝigis Aŭstrio-Hungarion, tre bone sciis kion povus okazi. Tamen, mi pensas ke ankaŭ Rusujo respondecas ĉar ĝi ne estis devigita mobiliziĝi en ciuj frontoj. Iuj asertas ke ankaŭ Francio iome respondecas pro tio ke ĝi enpuŝis ĝian aliancan Rusujon al la militon, sed mi pensas ke ne ekzistas sufiĉe da informo pri la konversacioj de tiu somero inter la franca prezidento, Raymond Poincaré, kaj la caro.

- Ĉu daŭre estas valida la germana afero?

Ĝi estas viva ekde la ŭnuiĝo de la lando en 1870. Ĝia geografio estas enorma, ĝia homa kapitalo estas enorma, ĝiaj substrukturoj, la prilabora etiko, ĉio ĉi igas ke Germanio estu tre potenca. Sed la nuntempa Germanio estas tre diferenca. Hugo Stinnes, iu granda germana antaŭ-milita industriisto, bedaŭris la frenezon de la militistoj kiuj senĉese paroladis pri la superregado de Eŭropo. Li diradis: se ni atendos, fine ni superegos la kontinenton ĉiukaze. Kaj jen ĉi tio okazis, sed post ĉirkaŭiro de du mond-militoj.



Primilita rideto
Pri kiuj venenaj gasoj vi temas? Mi pensis ke oni provizis al ni ĉi tiujn maskojn pro la troa kaj senkontrola furzado de Serĝento Peter.
Kio igas vin pensi ke ĉi tiu afero glitis for el niaj manoj?
Ne, sinjorino! Mi ripetas al vi ke ĉi tie ne estas la friz-salono de Majstrino Sara.
Kia terura perspektivo! Mi fariĝas senlabora. Finiĝas la Unua Mond-Milito kaj ne estos Dua ĝis la jaro 1939.
Ŝajnas ke hodiaŭ ni havas relative trankvilan tagon.
Jes, almenaŭ la etoso estas pli milda ol tiu de mia geedza vivo.